Esperanto en servo de la monda paco



paco

Organo de la MEM-Sekcio de Germana Demokratia Respubliko



1978

Hans Richter

Konvencia malarmado – kion ĝi utilas al ni?

Komentario pri principoj, problemoj kaj perspektivoj de la Vienaj intertraktoj

Dum preskaŭ kvin jaroj renkontiĝadas en la Viena „Hofburg" diplomatoj kaj armeekspertoj el socialismaj kaj kapitalismaj ŝtatoj por intertrakti pri la redukto de trupoj kaj armiloj en Mezeŭropo. Celo de la intertrakto estas, senteble malintensivigi la militecan konfrontiĝon en Mezeŭropo kaj tiamaniere kontribui, kompletigi la politikan malstreĉiĝon per la militeca. Tia evoluo ne nur estus laŭ la interesoj de la popoloj eŭropaj, sed ĝi ankaŭ efike helpus, favore influi la sorton de la tuta homaro.

Malgraŭ la nun jam kvinjara daŭro de la intertraktado mankas ĝis nun menciindaj pozitivaj rezultoj. Kio estas la kaŭzoj, ke la Vienaj intertraktoj ne progresas?

Sendube apartenas la redukto de trupoj kaj armiloj – kaj ĝenerale la malarmado – al la plej komplikaj internaciaj problemoj, ĉar tia redukto senpere tuŝas la naciajn sekurecinteresojn kaj la defendkapablojn de la intertraktantoj. Konekse al tio ekzistas ege malfacilaj militecaj, scienc-teknikaj, strategiaj kaj aliaj problemoj, rilatantaj unu al la alia. Ili ĉiuj estu konsiderataj kaj solvataj. Tamen, la ĉefan kaŭzon por la stagnado de la Vienaj intertraktoj oni ne serĉu en militec-teknikaj problemoj, sed en la fakto, ke la delegacioj de la kapitalismaj ŝtatoj ignoras la bazajn principojn de tiu intertraktado kaj de la alstrebata konvencio, kvankam oni pri ili interkonsentiĝis en preparaj konsultiĝoj.

Tiuj bazaj principoj enhavas:

- La estimon de la nelimigata sekureco de ĉiuj partoprenantoj kaj la nepermeson de unuflankaj militecaj avantaĝoj.
- La garantion de la ekvivalenta reduktado fare de la rekte partoprenantaj ŝtatoj (Sovetio, GDR, Pollando, ĈSSR, GFR, Belgio, Luksemburgo, Nederlando, Usono, Kanado kaj Grandbritio).
- La reduktadon de ĉiuspecaj trupoj kaj armiloj en Mezeŭropo escepte de la martrupoj, kromigitaj laŭ reciproka akordo.

La socialismaj ŝtatoj rigore sekvas tiujn principojn. Ilia intertrakt-plano baziĝas sur la fakto, ke en Mezeŭropo ekzistas proksimuma ekvilibro rilate al la amplekso de militfortoj kaj militrimedoj. El tio sekvas, ke sukcesa kaj de ĉiuj partoprenantoj akceptebla intertrakta strategio celu nur al tia ĉi redukto de trupoj kaj armiloj, kiu konservos la nunan militecan fortrilaton sur malpli alta ŝtupo. Nur tia redukto ne donus al iu el la intertrakt-partneroj unuflankan militecan avantaĝon kaj ne damaĝus la sekurecintereson de unu flanko. Ĉiuj proponoj, donitaj de la socialismaj ŝtatoj, konformas al tiu reala baza pozicio.

Kapitalisma nombro-akrobataĵo

Kompare al tio la proponoj de NATO-ŝtatoj estas ja nuraj variantoj de tiu unusola temo: Redukto de trupoj kaj armiloj malavantaĝe al Sovetio kaj la aliaj ŝtatoj de Varsovia Alianco. Nereala elirpunkto de la diskutado de NATO-ŝtatoj estas la aserto: la socialismaj landoj havas en Mezeŭropo gravan plion da tertrupoj, precipe da tankoj. El tio ili derivas la postulon, ke la trupoj de la Varsovia Alianco en Mezeŭropo reduktiĝu je preskaŭ la triobla kompare al NATO-trupoj. Laŭ tiu ĉi postulo ekzemple Sovetio eltiru tankarmeon de 68 000 soldatoj kaj 1 700 bataltankoj el la redukto-regiono, dume Usono volas „maldensigi" siajn eŭropajn trupojn nur je 29 000 soldatoj, sed sen armiloj kaj ekipaĵoj. Eĉ aŭtoroj de kapitalismaj ĵurnaloj dubas, ĉu tia propono estas akceptebla. Tiel ekzemple en „Europa-Archiv" el julio 1977 oni atentigas pri la fakto, ke la usonanoj povus elekti siajn reduktendajn soldatojn „el la provizpersonaro kaj anstataŭigi tiujn per civilaj dungitoj".

Por kredebligi la „rajtigon" por la okcidentaj postuloj, en la imperiisma gazetaro oni tute ne skrupulas. La GFR-gazeto „Die Welt" (la mondo) skribis la 12-an de decembro 1975 pri 15 500 orientaj tankoj, kiuj povus batali kontraŭ 5 000 okcidentaj. En la sama gazeto de la 15-a de devembro, do nur tri tagojn poste, legeblis jam pri 16 000 orientaj tankoj. Kaj nur du tagojn poste, la 17-an de decembro, oni citis en „Die Welt" GFR-defendministron Leber, kiu parolis pri 18 000 orientaj konfronte al 6 500 okcidentaj tankoj. La KSU- (Kristana Sociala Unio) deputito de la federacia parlamento Zimmermann prezentis je la tria de januaro 1977 eĉ 26 500 tankojn de la Varsovia Alianco.

Tian nombro-akrobataĵon oni certe ne povas rigardi serioza, eĉ ne bonvole. Ĝi servu ja nur por la celo, aperigi antaŭ la loĝantaro de okcidenta Eŭropo la timigfantomon „minacado el la oriento" kaj pravigi samtempe la postulon de la NATO-ŝtatoj en Vieno pri nesimetria reduktado.

Kiu la pacon vere volas

La nombro-spekuladoj de la kapitalisma publicilaro desegnas kaj politike kaj milite falskonturan bildon de la faktoj kaj ne taŭgas por helpi al intertraktaj progresoj.

Sed kiel ajn laŭte la asertoj pri „ruĝa danĝero" estas, same tiom nepruveblaj ili estas. La teorio de Marksismo-Leninismo kaj la tuta praktiko de la socialisma politiko, pasinta kaj nuna, pruvas, ke la socialismo bezonas pacon kaj estigas ĝin. Kontraŭe, estis ĉiam imperiismaj fortoj, kiuj tiregis la popolojn en militojn.

Ĉu ekzemple la juna sovetia ŝtato inscenigis la intervenadajn militojn kontraŭ si mem? Ĉu Sovetio ekflamigis la duan mondmiliton? Ĉu Sovetio konstruis la unuajn atombombojn kaj uzis ilin kontraŭ japanaj urboj? Ĉu Sovetio iniciatis la militojn en Koreo kaj Vjetnamio? Ĉu ekzistas eĉ nur unu ekzemplo, ke iu ŝtato de la socialisma landaro atakis kapitalisman ŝtaton? Nepre ne! Kontraŭe; la linio de vere paca socialisma politiko ekas per la dekreto pri la paco en 1917 kaj pluas tra la pacprogramoj de la XXIV-a kaj XXV-a Partiokongreso de la Komunista Partio de Sovetio ĝis la plej junaj sovetiaj paciniciatoj publicitaj omaĝe al la sesdeka datreveno de la Granda socialisma oktobra revolucio. Konfronte al tiuj faktoj ankaŭ reale juĝantaj politikistoj el kapitalismaj landoj ne povas ne agnoski la realaĵojn. Tiel George F. Kennan, iama ambasadoro de Usono en Moskvo kaj certa defendanto de kapitalismo, diris en televida intervjuo: „Estas mia persona opinio – kaj mi opinias, ke ankaŭ tiu de la plej multaj homoj bone konantaj la rusojn – ke ekde 1948 neniam estis tempopunkto, dum kiu ili havis la deziron aŭ serioze konsideris invadi Okcidenteŭropon."

Estas programkaraktere, se la ĝenerala sekretario de KPSU, L. I. Brejnev, deklaras en la nomo de KPSU kaj de la tuta sovetia popolo: „Nia lando neniam surpaŝos la vojon de la agreso kaj neniam levos la glavon kontraŭ aliaj popoloj."

Kio estas militeca ekvilibro?

La antisovetia tezo pri la „minacado el la oriento" ne eltenas politikan esploron. Ankaŭ de milita starpunkto la tielnomata supereco de la socialisma militalianco en unusola armilspeco – la tanktrupoj – ne taŭgas kiel argumento por laŭaserta „prema malekvilibro malavantaĝe al NATO". La unuflanka akcentado de difinita armilspeco ignoras la ĝenerale agnoskitan fakton, ke la militeca fortrilato estas kompleksa grando. Akcepti ekvilibron nur tiam, kiam sur ambaŭ flankoj en ĉiu ajn milita specio konfrontiĝas rigore samaj fortoj, ne atentas tiun realaĵon. La nuntempa militeca fortrilato en Mezeŭropo estas karakterizata per tio, ke avantaĝo de unu flanko estas kompensata per avantaĝo de la alia flanko en alia sfero, sen ke la militeca ekvilibro estas ĝenata.

Okcidentaj rondoj provas ŝajnigi, ke la kverelobjekto en Vieno estas nur la „orientaj tankamasoj". Sed ĉe korekta superrigardo de la problemaro de la militeca fortrilato oni ne pretervidu, ke NATO esperas por si ŝancojn, esti supera sur la kampo de la aerfortoj kaj de la taktika atomarmilo. Ne senkaŭze NATO-ŝtatoj en la Viena intertraktado persistas en sia postulado, flankenlasi la aerfortojn kaj la nukleajn armilojn. Sed estas ja evidente: oni ne povas serioze paroli pri redukto de trupoj kaj armiloj, se tiuj gravaj komponentoj de milita potenco restos ekster la kadro de estonta interkonsento. Ĝuste en Mezeŭropo ja ekzistas forta koncentriĝo de nukleaj armiloj kaj konvenaj tranportiloj. Krome estas konate, ke tiuj ĉi armeopartoj, kiuj estas ekipitaj per nukleaj armiloj, konsistigas la ĉefajn atakfortojn de la NATO-armeoj en Mezeŭropo.

Senkaŭzaj NATO-asertoj

Post tiu necesa superrigardo evidentiĝas, ke la aserto de la NATO-ŝtatoj pri la laŭdire ekzistanta misproporcio inter la armeoj de NATO kaj Varsovia Alianco estas nepruvebla. Tion montris tre precize ankaŭ tiuj nombroj, kiujn oni interŝanĝis en Vieno. Laŭ oficialaj informoj la ŝtatoj de la Varsovia Alianco disponas en la redukt-teritorio pri batalfortoj en nombro de 987 300 soldatoj, el ili 805 000 de la tertrupoj. La nombro de la NATO-trupoj estas 981 000 soldatoj, el ili 791 000 de la tertrupoj. Per tio konfirmiĝas, ke la intertraktada koncepto de la socialismaj ŝtatoj en Vieno baziĝas sur la sole reala bazo de la ekvilibro je trupoj kaj armiloj en Mezeŭropo. Oni povus supozi, ke la NATO-ŝtatoj nur iru ankoraŭ unu paŝon, la paŝon ekde la agnosko de la realaĵo al la preteco redukti siajn batalfortojn samvalore. Sed ĝuste tiun paŝon prokrastas la okcidentaj konferencanoj. Ili obstine provas, akiri por si unuflankajn militecajn avantaĝojn kaj ofendas per tio la bazan principon pri la samgrada sekureco. La obstina starado sur tiu pozicio estas la kaŭzo, ke en Vieno praktikaj rezultoj ĝis nun ne atingitas.

Vidante la destruktivan sintenon de la okcidentaj partoprenantoj objektivaj observantoj de la Vienaj intertraktoj prave demandas, kial la NATO-ŝtatoj ne almenaŭ konsentas al la propono de la socialismaj partoprenantoj, ne pligrandigi la batalfortojn dum la daŭro de la intertraktado. Ĉe la nuna stato de la intertraktado tia sindevigo kontribuus ebenigi la vojon al efektiva reduktado.

Armil-industriaj ŝarkoj timas pro siaj profitoj

La obstineco de la okcidentaj partoprenantoj sentebliĝas la fortan premon fare de la agresivaj fortoj de la imperiismo, de la militistoj kaj de la politikistoj adorantaj la kontraŭsovetismon. Certaj rondoj en la NATO-ŝtatoj evidente ankoraŭ ne rezignis pri siaj planoj, helpe de siaj divizioj fari politikon kontraŭ la socialismo. Pro tio ili ŝajnigas malarmemon en certaj subsferoj kaj samtempe klopodas daŭrigi la vetarmadon kaj aliigi la fortrilaton avantaĝe al si. Ilia forta rezisto kontraŭ iuj ajn efektivaj paŝoj rekte al la redukto de la armado havas ankaŭ ekonomiajn kaŭzojn. Dum en socialismaj landoj neniu povas reĉiĝi pro invento kaj produktado de novaj armiloj, por decidaj rondoj de la monopolburĝaro la armado estas ĉiam ankoraŭ la „granda negoco". La profitoj de la armilfirmaoj estas preskaŭ la trioblo de la meznombro en la usona industrio. En GFR armilkonzernoj enspezas profitojn, kiuj estas kvar- ĝis kvinoble pli altaj ol la baza akciokapitalo.

Socialismaj ŝtatoj urĝas al solvoj

Pro la necedema sinteno de la okcidentaj partoprenantoj la nuna stato de la Vienaj intertraktoj ne esperigas je baldaŭa pretigo de konvencio pri redukto de trupoj kaj armiloj en Mezeŭropo. Sed la socialismaj ŝtatoj ne kontentiĝas pri la fakto, ke la eŭropaj popoloj kvazaŭ sidadas sur konstante kreskantaj armilmontoj. Ili ankaŭ estonte luktos por progresoj en Vieno kaj ankaŭ montros kompromispretecon. Sovetio kaj la aliaj ŝtatoj de la socialisma ŝtatalianco dum la XXII-a plenkunsido de UNO denove manifestaciis sian decidemon, ĉion fari laŭ siaj fortoj por movi la Vienan intertraktadon trans la neefikan punkton. La redukto de trupoj kaj armiloj en Mezeŭropo estas kaj restos grava ero de la ampleksa malarmada programo de la Varsovia Alianco; ĝi restos necesa paŝo al la solvo de la plej urĝa tasko nuna: ĉesigo de vetarmado kaj komenco de malarmado, per tio forigo de la danĝero pri nova mondmilito.

La urĝeco de tiu malarmado evidentiĝas ankaŭ, se oni konsideras, ke jam la elspezoj por ordinaraj (konvenciaj) armiloj atingas egan altecon kaj estas grandegaj ŝarĝoj por la naciaj ekonomioj. Se ekzemple en Mezeŭropo trupoj kaj armiloj descendus al 50 procentoj, liberiĝus 20 ĝis 25 miliardoj da dolaroj po jaro. Pri tio la socialismaj landoj treege interesiĝas, tiuj financaĵoj povus servi por pli rapide altigi la vivnivelon de la laboruloj. Samtempe kreskus la eblecoj senteble pligrandigi la solidaraĵojn por tiuj popoloj, kiuj luktas por sia libereco en ankoraŭ koloniaj landoj, aŭ por tiuj en evoluaj landoj.

La popoloj eldevigu la malarmadon!

Sed evidente la vojo al malarmado kaj ankaŭ al redukto de trupoj kaj armiloj en Mezeŭropo estas ankoraŭ longa kaj plena de obstakloj. Fortaj kontraŭstaroj de la malamikoj de malstreĉiĝo estos ankoraŭ venkendaj. Tio postulas la komunajn penojn de ĉiuj pacamuloj en oriento kaj okcidento.

En tiu luktado estos necese, decide fronti kontraŭ tiuj, kiuj asertas, ke la malarmado estas nesolvebla tasko. Tiaj asertoj celas elvoki pesimismon kaj paralizi la decidemon de la popoloj, efiki por paco kaj malarmado. La vivo mem refutas la tezon pri la iluzia karaktero de la batalo por malarmado. Tion pruvas ekzemple la fakto, ke ĝis nun oni subskribis pli ol 20 du- aŭ multflankajn interkonsentojn cele al la ĉesigo de vetarmado aŭ cele al malarmado.

La ĝisnunaj sukcesoj en la luktado por kontraktoj inter socialismaj kaj kapitalismaj ŝtatoj favore al la paco donas al ni la esperon, ke ankaŭ en Vieno venkos la agnosko de realaĵoj, ke la okcidentaj partoprenantoj ekhavos la bonvolon politikan kaj deklaros sin pretaj redukti siajn trupojn kaj armilojn. Sed tiel longe, kiel tio ne estas, tiel longe, kiel NATO daŭrigas la vetarmadon, tiel longe la socialismaj ŝtatoj devas fari ĉiujn necesajn paŝojn en la kadro de la Varsovia Alianco por garantii la sekurecon de siaj popoloj ĉiam kaj solide.


(El DDR-Revue 1/78)
tradukis: W. Hofmann

Amaraj spertoj de la homaro

Po 100 mortintoj dividiĝis...

Grafik: Zentralbild

dum la germana-franca milito 1870/71




98 soldatoj — 2 civiluloj

dum la unua mondmilito




52 soldatoj — 48 civiluloj

dum la dua mondmilito



24 soldatoj — 76 civiluloj

dum la milito en Vjetnamio



2 soldatoj — 98 civiluloj

Kostoj de la armado - argumentoj por la malarmado

Dum la I-a mondkongreso de la batalantoj por la paco, la fondkongreso de la Mondpaca Movado, deklaris la eminenta sciencisto kaj humanisto, prof. d-ro Frederic Joliot-Curie, unua prezidanto de la Mondpaca Konsilantaro: „Por tio, kio kostas unusola militŝipo, oni povus konstruigi kaj laborigi dum cent jaroj 10 esplorinstitutojn por la batalo kontraŭ tiaj skurĝoj de la homaro kiel ekzemple la kancero kaj la tuberkulozo."

Nuntempe sumiĝas – sekve de la vetarmado akcelita de la imperiismo – la elspezoj por armado kaj vivrimedoj de la trupoj en la mondo laŭ UNO-taksoj je pojare 300 miliardoj da dolaroj, tio estas dum du minutoj pli ol 1 miliono da dolaroj!

Post redukto de armilfortoj kaj armadoj nur en Mezeŭropo je 50 procentoj restus tamen ankoraŭ 1 miliono da soldatoj. Sed oni liberigus minimume 20 ĝis 25 miliardoj da dolaroj po jaro. Oni povus uzi tiujn liberajn financajojn kaj kapacitojn por:

- la konstruo de modernaj lernejoj, en kiuj povus lerni 4 ĝis 5 milionoj da lernantoj;
- la kreo de pli ol 1 miliono da laborejoj por la konstruo de tiuj lernejoj;
- la dungo de proksimume 25 000 instruistoj por 25 jaroj kun plena salajro;
- la konstruo de modernaj malsanulejoj kun kapacito de 600 000 ĝis 800 000 pacientoj;
- la konstruo de 400 000 ĝis 500 000 infanludejoj;
- la konstruo de 15 ĝis 20 grandaj elektrocentraloj kun povumo de po 2 milionoj da kilovattoj.

(El DDR-Revue 1/78)
tradukis: W. Hofmann

Lina Kostenko

Parabolo pri rivero

Ekzistis iam la river' Diala.
Kaj caro persa kun la nomo Kir.
Lotos blankiĝis, samkiel piala*)
Kaj fajro ludis bord, kiel fakir'.
Ĉi tio – la armeo en transiro.
Subite dronis la ĉeval' de l'car'.
Kaj Kir ordonis en moment' retiron.
Li juĝis la riveron. Jena far':
Kondamnis li – ne estu plu Diala.
Deklaris mortverdikton al river'.
Ordonis car' trafosi tuj kanalojn,
Ekstermi arbojn, herbojn sur la ter'.
Post ŝunto de la akvo diversflanken
Rivero mortis. Ne ekzistis plu.
Trairis la armeo ĝin senmanke.
Jarcentoj pasis. Daŭris evolu'.
La sablo supertuŝis la kanalojn.
Revenis la fluej' al sia sfer'.
Ne estas Kir. Sed estas la Diala.
Ne estas car'. Sed estas la river'.

*) piala – taso

El la ukraina: Aleksandr Logvin

La neŭtrona bombo

Antaŭparolo de Romesh Chandra, prezidanto de la Monda Packonsilantaro

La homoj de la mondo tre bone komprenas, kian signifon havas la insisto de Pentagono daŭrigi la produktadon de la neŭtrona bombo. La sinistra enhavo de la propaganda kampanjo efektivigata de Pentagono kaj de la tuta militistara-industria komplekso de Usono pli kaj pli klariĝis.

Oni asertas, ke estas „pura bombo", ĉar ĝi mortigas nur estaĵojn – kaj laŭ belega, pura maniero –, ne videblas amaso da sango kaj ostoj, kaj ĉiuj konstruaĵoj estas sekuraj kaj restas sendifektaj. Estas „malkara" bombo, pri tio neniu devas zorgi, ĉar ĝia produktado ne ŝarĝos la impostulojn per supermezure grandaj pezoj. Jen la mirakla bombo, kiu mortigas por miliono da dolaroj pli multe da homoj ol iu ajn alia amasdetruilo.

Estas „sekura" bombo, ĉar ĝi estas provizita per la aserto de Pentagono, ke ĝi povas esti uzata en ĉiu geografia regiono kun tia intenseco, ke oni ne bezonas timi seriozan kontraŭbaton. Sekve la danĝero de la eksplodo de kernarmila milito eĉ ne ekzistas. Kiu ne kredas tion, al tiu la supera komandantaro de Pentagono volonte disponigos subskribitan deklaron pri garantio.

Estas la terura cinikismo de tiu propaganda kampanjo, kiu motivis la homojn postuli la malpermeson de tiu monstra armilo kaj de ĉiuj aliaj amasdetruaj armiloj.

La deklaro de Pentagono daŭrigi pri la neŭtrona bombo, rigardate en la ĝusta lumo, devas esti konsiderata kiel konfeso pri la pliintensigo de la vetarmado. Jam doniĝis oficialaj informoj pri ĉiujara 3-procenta plialtigo de la militistaj elspezoj de Usono kaj de ĉiuj aliaj NATO-landoj.

La homoj rigardas la neŭtronan bombon ne nur bestaĉa armilo kaj krome ne nur tia armilo, kiu povas eksplodigi mondincendion, sed same tia armilo, kiu minacas la malstreĉiĝon kaj ĉiujn sukcesojn de la malstreĉiĝo dum la lastaj jaroj.

La mondampleksa kampanjo por la malpermeso de la neŭtrona bombo, iniciatita de la Monda Packonsilantaro en aŭgusto 1977, estas la plej potenca amasa movado de la lasta tempo kontraŭ amasdetruaj armiloj kaj por la ĉesigo de la vetarmado. La alvoko de la Monda Packonsilantaro estis subtenita laŭ aktiva maniero flanke de multnombraj internaciaj kaj naciaj organizaĵoj, kaj ĝi praktike reprezentas milionojn da homoj sur ĉiuj kontinentoj.

Apartan signifon havas la demonstracioj, mitingoj kaj subskribaj agadoj en Usono. En pli ol cent urboj distribuitaj en la tuta lando la komitatoj de la Monda Packonsilantaro kuniĝis kun aliaj organizaĵoj al protesto, kiu estas sufiĉe laŭta por esti aŭdata klare kaj kompreneble eĉ en la sidejoj de la potenco en Vaŝingtono. En la kongreso, en la senato kaj en la domo de reprezentantoj pli kaj pli multe da kongresanoj kaj senatanoj komencas reagi al la postulo de la homoj haltigi la terurajn planojn de Pentagono pri la produktado kaj disvastigo de la neŭtrona bombo tra la tuta mondo.

En la NATO-landoj la protestmovado kreskis. En ĉiu lando la agadoj estas precipe direktitaj al la postulo, ke la registaro publike deklaru sian reziston kontraŭ la deponado de neŭtronaj bomboj sur sia teritorio kaj ke prezidento Carter rezignu pri sia danĝera politiko de la akcelado de la vetarmado.

En la socialismaj landoj la agado kontraŭ la neŭtrona bombo ampleksas la tutan loĝantaron, kaj ĝi estas daŭrigata en pli kaj pli novaj formoj.

En Azio, Afriko kaj Latinameriko la protestagadoj kontraŭ la neŭtrona bombo forte kreskis en kelkaj landoj.

La Monda Packonsilantaro alvokis al la daŭrigo kaj plifortigo de la protestagadoj por la malpermeso de la neŭtrona bombo.

La movado kontraŭ la neŭtrona bombo estas ligita kun plifortigitaj agadoj por la subskribado de la nova Stokholma Alvoko kaj ties postuloj al ĉesigo de la vetarmado, al malpermeso de ĉiuj nukleaj kaj aliaj amasdetruaj armiloj, por la ĝenerala kaj kompleta malarmado kaj por la kunvoko de monda konferenco pri malarmado.

Per la agadoj por la malpermeso de la neŭtrona bombo la popoloj subtenas la kunvokon de speciala sesio de la plena asembleo de UNO por la malarmado (Majo/junio 1978), kiu estu paŝo direkte al la malarmado.

La homoj de la mondo havas la forton malpermesi la neŭtronan bombon kaj ĉesigi la vetarmadon.

Neŭtrona bombo
Kiel ĝi efikas?
Kio estas riskata?

La decido de la usona registaro de julio 1977 pri la evoluigo de la neŭtrona bombo estigis ondon de protesto en la mondo. La gvidantoj kaj reprezentantoj de plej malsamaj politikaj partioj, parlamentanoj, eklezaj agantoj, sciencistoj, verkistoj, laboristoj, kamparanoj, homoj el ĉiuj sferoj kaj de plej malsamaj mondkonceptoj teruriĝis pri tiu decido kaj postulis retiri ĝin kaj proskribi la bombon por ĉiam.

La aserto de la usona registaro, ke la bombo estas „pura, pli humana ol aliaj atomarmiloj" kaj destinita nur por mortigi homojn, ne detruante samtempe la posedaĵon, ne kapablis repremi la mondvastan proteston kontraŭ tiu instrumento de amasmurdo. Male: Ĝi plifortiĝis.

La monda publiko komprenis tian aserton senekzempla cinikismo, kiu kontraŭdiras al ĉiu logiko kaj humaneco. La elstara brita gazeto, la Londona „Times", esprimas tiun senton per la vortoj: „Ĝi estas sarkasme priskribita kiel kapitalisma superarmilo, kiu taksas la objektojn pli alte ol la homojn."

La federacia afergvidanto de la Socialdemokratia Partio de Germanio, Egon Bahr, nomis la bombon „simbolo de la perversio de la pensado".

D-ro Ernest Sternglass, profesoro por radiofiziko en la universitato de Pittsburgh (Usono), nomis en letero al la „New York Times" la bombon „granda erarigo". Deputitoj de la usona kongreso urĝis prezidenton Carter „malaprobi la produktadon kaj enkondukon de la bombo".

La iama ĉefo por la projektado de specialaj armiloj kaj anstataŭanta direktoro de CIA, Herbert Scoville filo insistas, „denove remeti la neŭtronan bombon en la bretaron". Kaj la respublikana usona senatano Mark Hatfield avertas kontraŭ la konstruado de la bombo: „Tio havas pli grandan signifon ol ĉiu alia decido, de kiam Harry Truman decidis praktiki la (atom-) bombon (kontraŭ Japanio)."

La indigno, kiu ekestis per la decido pri la evoluigo de la bombo, postulas precizan ekzamenon de tiu nova minaco, kontraŭ kiu unuiĝis milionoj, sendepende de ideologio, konfesio aŭ raso.

Kio estas la neŭtrona bombo?

Ĝi estas nova nuklea amasdetrua armilo kaj efikas simile kiel ĉiuj aliaj kernarmiloj destinitaj por la amasa mortigo de homoj. Ĝi estas eĉ pli danĝera ol ĉiuj kernarmiloj ĝis nun evuligitaj kaj aplikitaj, inkluzive la atom- kaj hidrogenbombojn.
Fakuloj laborantaj en la kampo de la kerntekniko vidas la specialan danĝerecon de la neŭtrona bombo antaŭ ĉio en tio, ke estas pli simple apliki ĝin kaj ke laŭ mortiga efiko ĝi havas eĉ pli abomenajn kaj grandajn sekvojn ol konvenciaj kernarmiloj.
Pri komparo de la neŭtrona bombo kun la A- kaj H-bombo la mondfama brita atomfizikisto profesoro Eric Burhop, iama kunlaboranto pri la usona atombomba projekto dum la dua mondmilito kaj nuna prezidanto de la Monda Federacio de la Sciencaj Laboristoj, diras:
„Ĉe ordinara atoma aŭ hidrogena bombo la energio estas liberigita ege rapide, por tiel diri momente. Granda kvanto da neŭtronoj estas emisiita, sed ilia efiko estas kovrata per aliaj: per la forta premondo, kiu tute detruas konstruaĵojn en tre granda ĉirkaŭo kaj mortigas aŭ vive entombigas la homojn troviĝantajn en la domoj; per la fulmeca varmradiado, kiu bruligas tiujn, kiuj estas trafataj de ĝi en la stratoj en simile granda ĉirkaŭo; per la daŭra radioaktiva precipitaĵo, kiu disvastiĝas en eĉ pli granda teritorio pro la enorma eksploda efiko. Tiuj efikoj transombras la efekton de la intensa neŭtronradiado, kiu efikas mortige nur ĝis du kilometroj de distanco."
„En la neŭtrona bombo la energio estas liberigata multe pli malrapide. Kiel bombo ĝi estas komparebla al humida piroteknikaĵo. Sed okazas la samaj kernreagoj, kiuj estigas neŭtronojn kaj radioaktivajn kromproduktojn. Tiuj ĉi estiĝas en kompareble grandaj kvantoj, sed vere distribuitaj al pli longa tempospaco. Ĉar ne okazas forta eksplodo, la radioaktivaj kromproduktoj restas en la senpera proksimo de la eksplodloko. Ili ne disvastiĝas en granda areo kaj ne montriĝas radioaktiva precipitaĵo. La neŭtrona radiado, tamen, etendiĝas same foren kiel ĉe konvenciaj atomaj kaj hidrogenaj bomboj kaj sekvigas, ke homoj, kiuj troviĝas en distanco de unu ĝis du kilometroj de la eksplodloko, suferas terurajn kaj ordinare mortigajn lezojn. Krom en la dejeta centro la neŭtrona bombo mortigas ne tuj, sed igas la homojn trafitajn de ĝi mortadi en malrapida, latenta, ofte terure turmenta morto post tagoj, semajnoj, monatoj aŭ eĉ jaroj, laŭ tio, en kia distanco ili troviĝis disde la dejetloko. Se temas pri virinoj gravedaj en la momento de la radiado, estas granda probableco, ke ili abortos. Se ili vivas sufiĉe longe kaj gravediĝas post la radiado, ekzistas pli alta probableco, ke iliaj idoj naskiĝos kun denaskaj difektoj. La reston de sia vivo ili pasigos sammaniere kiel la atombombaj viktimoj en Japanio, el kiuj kelkaj mizere trakadukiĝas eĉ ĝis la hodiaŭa tago, kun vundoj tiel teruraj, ke eĉ iliaj plej proksimaj parencoj estas kaptitaj de hororo kaj naŭzo, kiam ili vidas ilin.
Sed fabrikoj, negocejoj kaj loĝejoj – se ili situas ne tuj en la proksimo de la dejetloko – restas sendifektitaj.
Post kiam la malamiko forigis la loĝantaron de urbo helpe de tiu ‚fina solvo', li povas enmarŝi kaj tute komforte okupi ĝin." D-ro B. T. Feld, profesoro ĉe la teknika instituto de Masaŝuseo, kaj ĝisnuna ĝenerala sekretario de Pugwash, havas tamen la opinion, ke la atakinto ne kapablos tuj utiligi la „konkeritan posedaĵon" laŭ la priskribita maniero, kiel tio estas propagandata de la adeptoj de la neŭtrona bombo. Kial? „Unue", diris profesoro Feld, „ankoraŭ ekzistas perceptebla radioaktiva precipitaĵo el la dissolvo de la fendiĝo. Krome la premondo kaj la varmego ne povas esti tute forigitaj, ĉar oni devas liberigi sufiĉan fendenergion, por levi la temperaturon de la termonuklea meterio al la nivelo, kiun oni bezonas por la ekokazigo de fandprocezo. Plue neŭtronoj estas eventuale absorbataj de la grundo aŭ de aliaj materioj troviĝantaj proksime, same eĉ en la aero povas resti perceptebla kvanto de longe konserviĝanta radioaktiveco, kiu ne ebligas la utiligon de la konkerita posedaĵo en tia mezuro, kia estas supozata de la adeptoj de la neŭtrona bombo."
Sed propradire la plej granda danĝero minacanta per la neŭtrona bombo troviĝas ekstere de la kuro de fizikaj leĝecoj. Ĝi konsistas en tio, ke ĝiaj spiritaj, politikaj kaj militistaj patroj ludas per la ideo kapabli fari limigitajn militojn per tiu armilo, ne devante tuj timi masivan atoman kontraŭbaton. La eblaj formoj en la apliko de la neŭtrona armilo akcelas tiajn konsiderojn malestimajn al la homoj. La neŭtrona armilo ja provas ankaŭ esti dejetata de sur aeroplano, sed antaŭ ĉio estas antaŭvidate enigi ĝin en ĝian celon per arteleriaj obusoj aŭ raketoj – fakto, kiu ege plisimpligas ĝian aplikon kompare al tiu de atoma aŭ hidrogena bombo. Ekzemple pere de porta raketo ‚Lance' oni povas uzi ĝin kontraŭ celojn, kiuj situas en distanco de nur ĝis 110 kilometroj, aŭ per 8-colaj arteleriaj obusoj oni povas pafi ĝin kontraŭ celoj, kiuj distancas ĝis 32 kilometroj. Krome oni povas eksplodigi ĝin en difinita alto super donita celo. La efiko de la amasmortigo ja estas la sama en ĉiuj okazoj, sed la grado de la detruo de materiaj objektoj malpligrandiĝas kaj la tempospaco ĝis la ebleco de la okupado de senhomigita teritorio malplilongiĝas.

Kiel mortigas la neŭtrona bombo?

Ĉiuj ellaboraĵoj kaj konsideroj venas al la konkludo aŭ deiras de tio, ke la neŭtrona bombo estas kruela amasdetruilo. Studaĵo de la usona revuo „Time" diras, ke ĉiuj, kiuj troviĝas interne de la radio de la bombo, tuj trovas la morton, dum aliaj ekstere de tiu radio suferos pro la alta grado de la radiado, kio finfine sekvigos la morton.
Oficiala publikaĵo de la atomenergia komisiono kaj de la defenda ministerio de Usono kun la titolo „La efiko de la atomarmiloj" priskribas kelkajn el tiuj sekvoj de la bomboj por homoj.
Krom la tuja amasa detruado de homa vivo ĝi estigas diversajn postefikojn, kiuj kondukos al turmentoplena morto. La usona raporto priskribas la hororon estiĝantan ĉe la uzado de kernarmiloj: „Kiel oni konstatis, la homoj suferis je ŝoko de diferenca grado, kiu daŭris eventuale kelkajn horojn, akompanita aŭ tuj sekvita de vomemo kaj vomado kaj poste de lakso dum la unua tago aŭ du tagoj post la eksplodo; tuj poste montriĝis febro. La laksoj estis oftaj kaj laŭ ilia karaktero gravaj, unue akvecaj kaj poste ofte sangaj ... Kvankam dum la unuaj tagoj ne sentiĝis doloroj, la pacientoj sentis vomemon akompanitan de klara deprimiteco, de anima senforteco. Al la fruaj stadioj de la grava radiada malsano povas sekvi tiel nomata latenta tempo de du ĝis tri tagoj, dum kiuj la paciento estas libera de simptomoj, kvankam en la organismo efektiviĝas profunde efikantaj ŝanĝiĝoj. Post tiu periodo denove montriĝas la samaj simptomoj, kaj la malsano tiam ree evoluas akute, akompanita de delirioj kaj komao, kaj en multaj okazoj la morto venas dum du semajnoj."
„Al la pluaj simptomoj, kiujn oni observis, apartenas sekundaraj infektiĝoj kaj inklino al spontaneaj internaj sangadoj ĉirkaŭ la fino de la unua semajno. Krome ŝvelaĵoj de la kolo kaj inflamoj estas ne maloftaj. Ĉirkaŭ la fino de la dua semajno povas montriĝi harperdado, ĉefe perdado de la kapharaoro ... Malpligrandiĝo kaj degenera ŝanĝiĝo de la testikoj kaj ovarioj; ulceriĝo de la tonsiloj kaj de la mukozo de la dikintesto ... Karakteriza altiĝo de la korpotemperaturo (febro) ..., kiu povas daŭri ĝis la tago de la morto."
Profesoro Burhop mencias ankoraŭ pliajn sekvojn en sia studaĵo pri la bombo. Li diras: „Aldonaj simptomoj estas forta inflamo de la buŝa kavo kaj de la kolo, paleco, naza sangado, rapida malgrasiĝo, forta malpliiĝo de la

nombro de blankaj sangoglobetoj per ‚ekstrema mjela atrofio', en kies loko formiĝas en kelkaj okazoj ‚gelateneca sedimento'. La detruo de la blankaj sangoglobetoj signifas, ke la organismo ne plu kapablas defendi sin kontraŭ infektadoj, tiel ke ‚aliokaze sendanĝeraj bakterioj, kiuj kutime ekzistas en la digesta aparato aŭ sur la haŭto, eniĝas en la sangofluon kaj povas konduki al sangovenenado en morte evoluanta infektiĝo'."

Tiuj sekvoj de la neŭtronbomba radiado kondukas Burhop al jena opinio: „Tiuj viktimoj estas plej feliĉaj, kiuj mortas en la paso de du ĝis kvar semajnoj. Tiuj, kiuj troviĝis en distanco de unu ĝis du kilometroj, povas trakadukiĝi dum jaroj sub tiaspecaj turmentoj." Kaj li resumas: „Tia estas la armilo, por kies fabrikado prezidento Carter donis verdan lumon."

Kelkiu eble ankoraŭ nun opinias, ke per la neŭtrona bombo Carter nur volas pli efike fortimigi la orienton kaj envere li tute ne intencas ekestigi la neŭtronan inferon. Sed la jam realigitaj planludoj de la NATO-militistoj devus averti eĉ la fidemulojn.

Pri la fidindeco de la fortimiga argumento de la neŭtronbombaj adeptoj disputas profesoro Max Steenbeck (GDR): „Kiu asertas, ke la neŭtrona bombo estas la ideala rimedo por malkapabligi al batalo malamikajn tankojn penetrintajn en la propran landon, tiu opinias ja neesenca la morton de la propra civila loĝantaro fuĝinta en la protektejojn. ‚Uzebla' la neŭtrona bombo estas nur, se oni mem penetris en la landon de la malamiko kaj ĉi tie volas haltigi tankatakon de la defendantoj. Per tio ja pereas ‚nur' malamika civila loĝantaro. Pri domoj, fabrikoj kaj armiloj, male, oni ja ĝuste intencas, ke ili falu en la manojn de la konkeranto nedetruitaj."

Kaj la soveta kernfizikisto M. Markov starigas al konsidero: „La perfektigo de la kernarmiloj kaj de la vetarmado jam delonge estas sensencaj. La diferencoj en la grado de armiteco inter la grandaj fortoj starantaj unu kontraŭ la alia egaliĝas same rapide kiel la temperaturoj de neegale varmigita metalpeco. Ĉiu perfektigo de la amasdetruaj armiloj kaj la vetarmado povas nur plialtigi la ‚militistan temperaturon' de la planedo kaj la danĝeron de tutmonda katastrofo."

Tiun danĝeron ankaŭ ne trompforigas la asertoj de la potencialaj neŭtronmilitistoj, ke oni „plipurigis" la nuklean militon.

Ĉu la neŭtrona bombo estas „pura"?

Nia deirpunkto por la respondo al tiu demando devus esti: Ĉu iu armilo aŭ iu instrumento, kiu mortigas homojn, tute egale ĉu unuope aŭ cente aŭ mile, povas esti „pura"? Nur cinikuloj aŭ spirite perversiĝintaj homoj povas rigardi pura la mortigadon, kiel ajn, ĉu rapide aŭ malrapide kaj dolorige, ĝi okazu.



Doktoro honoris caŭsa de pentagono por la invento de la „pura" bombo.
Fotomûntajo: Klaus Georg

La brita semajna revuo „The Economist" rigardas la bombon „eksterordinare ‚malpura' armilo", kiu tuj mortigas tiujn, kiuj troviĝas interne de la mortiga radio, kaj kiu efikas, ke multaj el la aliaj viktimoj mortos „latente okazantan, kruelan morton".

La „malpureco" de la bombo – por uzi la perversan logikon de malsanaj komparoj – rezultas el tio, ke ĝi eligas konsiderinde pli grandan parton de trapenetraj neŭtronaj radioj, ol normale estas atendeble el kerneksplodo. D-ro Ernest Sternglass (Usono) diras al tiu problemo:

„La aserto, ke la neŭtrona bombo estas preferinda al la kutimaj taktikaj kernarmiloj, ĉar ĝi reduktas ties radiadan efekton al la militistaro kaj sekve estas pli akceptebla por la uzo en dense loĝataj regionoj, kiel ekzemple en okcidenta Eŭropo, tiu aserto estas kaj malĝusta kaj eraríga.

... Kvankam estas trafe, ke la korpa damaĝo por urboj situantaj en la proksimo povos esti forte reduktita, oni tamen devos en vero forte multobligi la entutan nombron da mortintoj, malsanuloj kaj de genetikaj damaĝoj en estontaj generacioj po kilotuno."

La asertoj de la usona militista propaganda maŝino, ke la bombo estas „pura", samtempe direktas la atenton al la tiel nomata posedaĵkonservanta eco de la bombo, asertante, ke temas pri „defendarmilo", kiun oni uzas nur por defendo kaj ne por la komenco de agreso. Usona militista parolanto, provanta mallaŭtigi la protestojn kontraŭ la bombo, diris en la usona revuo „Time": „Se en Okcidenta Germanio ni estos starigitaj en situacion similan al tiu de Vjetnamio kaj ni estos devigitaj uzi taktikajn kernarmilojn, ni detruos Germanion por savi ĝin. La uzotaj kernarmiloj detruos la okcidentgermanajn urbojn kaj fabrikojn, kaj la viktimoj en la civila loĝantaro sumiĝos al milionoj. Sed per la neŭtrona bombo ni savos Germanion, ne detruante ĝin."

Tiaj asertoj estas fakte erarigaj kaj malveraj. Lando defendanta siajn urbojn kaj industrion kontraŭ agresanto, devus rigardi sinmortiga la uzon de la neŭtrona bombo, ĉar ĝia apliko tiuokaze mortigus multe pli multe da defendantoj ol da agresantoj.

Sekve la bombo fariĝas la armilo „par excellence" (precipe taŭga) de la agresanto, kiu intencas transpreni urbojn kaj industrion de alia lando funkcikapablaj. La bombo mortigas la loĝantaron por la agresanto, sed ĝi konservas la materiajn havaĵojn, tiel ke tiuj ĉi povos esti uzataj de la agresanto post la okupo.

„Pura" ĉe tiu bombo estas nur la negoco, kiun la armada industrio de Usono promesas al si el ĝia produktado kaj el nova ciklo de la vetarmado per ĝi ebligita. Laŭtvoĉe prezentitaj postuloj pri homaj rajtoj ne kaŝas tion. La danĝero de la neŭtrona bombo devus unuigi la pacamantojn de tiu mondo en la batalo pri la unua homa rajto, la rajto je vivo, kaj kontraŭ „pura" morto.

La neŭtrona bombo – atenco kontraŭ la malstreĉiĝo

Prave la homoj ĉie sur nia planedo indignas pro la barbara intenco al mortigo, kiun oni volas plenumi per la nova amasdetrua armilo, la neŭtrona bombo.

La grundo de nia tero estas saturita de la sango de sennombraj viktimoj de la militoj. Sole en tiu ĉi jarcento la imperiismo implikis la homaron en du mondmilitojn – la plej barbarajn kaj oferplenajn de la historio. La bildo de la viktimoj de Hiroŝima kaj Nagasaki kaj de la mortintoj kaj kripluloj de la vjetnama milito estas neforigeblaj.

Per la evoluigo kaj konstruado de la neŭtrona bombo novaj danĝeroj minacas la homaron. Hororiga estas la vizio, vidi turmente morti niajn infanojn,



USONO: Protesto kontraŭ la neŭtrona bombo.
Foto: Zentralbild

montras, ke Usono okulumas kun la ideo fari loke limigitajn militojn. Diskutitaj estas fulmaj militoj, kiuj lasas al la milita kontraŭulo ankoraŭ nur la eblon rezigni pri la perdita teritorio, ne kontraŭbatante per la tuta arsenalo de la atomaj kaj hidrogenaj bomboj kaj per tio riski la ekziston de ĉiu civilizacio. Tiu militado estas ebla en ĉiu parto de la tero, de sur ĉiu usona militbazo, bombaviadilo, submarŝipo, aviadila ŝipo de la usonaj militfortoj. Azio, Afriko, Aŭstralio kaj Latinameriko estus principe same imageblaj kiel sceno de la neŭtrona murdado kiel Eŭropo.
Kiel pruvas la historio, oni ne povas ekskludi, ke post kelke da tempo ankaŭ agresemaj ŝtatoj kiel Sudafriko kaj Israelo povus havigi al si la posedon de la bombo.
Oni devas ne havi iluzion pri tio, ke la apliko de la neŭtrona armilo signifus la komencon de mondampleksa kernmilito. Limigita kernmilito ne estos!

virinojn kaj nin mem per la neŭtrona bombo. Sed hodiaŭ la popoloj ne plu staras senhelpaj kontraŭ la milito. La ŝanĝiĝinta situacio en la mondo ekestigis realajn eblojn por ĉiam ĉesigi la sinistran diablan ciklon „milito – postmilita tempo – pormilitaj preparoj – nova milito".
Sed gardemo estas necesa, ĉar ĉiam plu ekzistas influhavaj rondoj, kiuj alstrebas la revenon en tiun diablan ciklon.

La neŭtrona bombo pliprobabligas la atoman militon

Ĉiu nova invento kaj evoluigo de armiloj plenigas nin per nova zorgo, eĉ se tio okazas sub la moto „pli racie", „pli komforte" kaj „pli humane". La progesoj de la amasdetrua teknologio estas akuta danĝero, kun kiu ni estas konfrontitaj en kreskanta mezuro.
Necesas entrepreni ĉiujn fortostreĉojn por proskribi kaj eviti kernarmilan militon.
Nuntempe nia tero similas al termonuklea pulvujo. La tiel nomata „over-kill-capacity" sufiĉus por dezertigi nian planedon ne nur unufoje, sed... dekfoje kaj ekstermi ĉiun vivon. Neniam ni forgesu: la apokalipsaj bildoj povas realiĝi eĉ hodiaŭ. Kiu estas la forto, kiu kapablas preventi tion? Milionoj kaj pliaj milionoj da homoj de ĉiuj kontinentoj. Ili ne plu agadas izolitaj unu disde la alia, sed pli kaj pli efike unuigas siajn fortojn.
Hodiaŭ ili aktive sin engaĝas por la konservado kaj sekurigo de la mondpaco. En la monda pacmovado ili laboras, por ke la atoma milito fariĝu neebla. La voĉo de la pacamantoj havigis al si aŭskultadon. De post la unua Stokholma alvoko tiu milionoble laŭtigita volo al evito de atoma milito ne plu povas esti simple ignorata. La dua alvoko el Stokholmo sekvigis, ke la homoj de bona volo en oriento kaj okcidento, nordo kaj sudo povas ekscii kun kontentigo: La atoma milito ne nur ne eksplodis, sed estas morale proskribita. Neniu en la mondo rajtas okulumi kun la ideo de atoma milito aŭ eĉ nur toleri tian ideon. Kaj neniu, ne perdante sian kredindecon, povas ankoraŭ kredigi al la mondo, ke la disvastigo kaj modernigo de la nuklea potencialo, kiel Usono faras tion per la neŭtrona bombo, estas akordigebla kun la fundamenta rajto de la homoj je vivo en paco.
Dum la lasta kampanjo de prezidenta elekto ŝajnis, kvazaŭ eĉ en la usona administracio ekzistus kaj povus daŭri la volo al malpliigo kaj evito de atommilita danĝero. Sed nun Pentagono prezentas al la indigna mondo la neŭtronan bombon kaj pliajn novajn armilsistemojn.

Limigita kernmilito ne estos!

La strategoj de Pentagono speciale laŭdas la lokalizeblan punktefikon de la neŭtrona bombo. Al tiu eco oni taksis forkapti la proteston kontraŭ la bombo. La aprezo de la punktsolvo

La neŭtrona bombo – ido de la malvarma milito

Ilian bazan koncepton J. R. Oppenheimer, unu el la „patroj" de la atomarmilo, formulis jene: „Nur se la atombombo povas esti uzebla tiagrade, ke ĝi fariĝas normala konsistiga parto de militistaj operacioj, ĝi vere estos granda helpo por la elbatalado de militoj, kaj ne nur avertos la homaron eviti ilin."
Ekde 1950 renomaj usonaj militistoj kaj sciencistoj el la Pentagon-laboratorioj strebas trovi „solvon", t.e. vesti la atomarmilojn per la uniformo de „konvencia armilo".
Hodiaŭ Usono posedas tiun armilon. Per ĝi ili volas kontraŭstari al ampleksa kaj nelimigita politiko de malstreĉiĝo kaj de mondvasta malarmado. La batalo de la pacamaj mondaj fortoj pri la kompletigo de la politika malstreĉiĝo per la militista – ununura vojo por neinversigebligi la malstreĉiĝon – estas konscie sabotata. Tio estas la provo denove revivigi la malvarman militon.
La publiko estas terurita kaj indigna pro la planita apliko de la neŭtrona armilo fare de Usono. Eĉ militistoj el ŝtatoj aliancitaj al Usono ekkonas la aventurecon de la planoj. La itala generalo Nino Pasti klarigas la zorgojn: Unue la neŭtrona bombo estas tute ne necesa, sed „eltrovita de la militinstigantoj", due la bombo kondukas al la detruo de „nur" Eŭropo, kaj lastlaste la apliko de la neŭtrona bombo same kiel tiu de ĉiuj aliaj kernarmiloj estus decidita ekskluzive de Usono. „Koncize – la italoj povus esti likvidataj laŭ decido de la usonanoj."
Alie dirite, tiel analizas la Moskva revuo „Nova Tempo", „la nova armilo fariĝas nova varianto de la malnova

usona NATO-politiko sub la primitiva, sed konvinka moto ‚Not our boys!' (Ne niaj knaboj!)."

Tiukonekse ankaŭ la rolo de NATO kiel politika kaj militista organizaĵo estas ne de duaranga signifo. Laŭtiĝis voĉoj, ke la decido pri la neŭtrona armilo estas ekskluzive afero de Usono. Tiel la dana Ministro Andersson, tiel ankaŭ la pozicio de la koaliciaj partioj en la Federacia Respubliko Germanio (ekzemple la deputito de la federacia parlamento Jürgen Mollemann: „La decido pri la konstruado de la neŭtrona armilo estas pure nacia decido de la usona prezidento"). Sed oni ne povas pretervidi la fakton, ke tiu armilo estas „elektita" por NATO. El tio ankaŭ rezultas la enorma respondeco, kiun ĉiuj NATO-registaroj prenas sur sin.

La neŭtrona bombo akcelas la vetarmadon

La enkonduko de la neŭtrona bombo provokas pluan armadan vetkonkuron. La tuta postmilita historio de la vetarmado montras, ke la provizora antaŭeco de unu mondpotenco perdiĝas dum relative mallonga tempo. Tiel estis pri la atombombo, tiel estis pri la hidrogena bombo. Ankaŭ pri la neŭtrona bombo okazus same aŭ, kiel esprimis tion publicisto, „je la fino la ekvilibro de la teruro tiam tamen estus restarigita – nur sur pli alta, pli multekosta nivelo".

Ke la nivelo fariĝas pli multekosta, estas ekster dubo.

(Trad. d-ro Karl Schulze el broŝuro de Monda Packonsilantaro)

Alvoko de la Monda Packonsilantaro:

En la nomo de la vivo: Malpermesu la neŭtronan bombon!

La buroo de la prezidio de la Monda Packonsilantaro, kunveninta en Berlino de la 9-a ĝis la 12-a de septembro 1977 por sesio, salutas la protestmovadon en la tuta mondo kontraŭ la neŭtrona bombo – tiu torturilo, kiu estas cinike prezentata de la usona registaro kiel tiel nomata pura armilo.

Tiuj masivaj protestoj kontraŭ la envicigo de la flugilraketo kaj de aliaj novaj armiloj en la armilan arsenalon de Usono estas kreskantaj laŭ amplekso kaj intenso. Tiu serioza zorgo de la homaro respeguliĝas en la larĝa spektro de aktivecoj, kiujn iniciatis la urĝa alvoko de la Monda Packonsilantaro efektivigi komence de aŭgusto semajnon kontraŭ la neŭtrona bombo. La buroo averte atentigas, ke la konstruado de la neŭtrona bombo ĵetegus la mondon en kvalite novan stadion de la vetarmado, kiu pligrandigas la danĝeron pri la unua apliko de kernarmiloj.

La esenco de la malstreĉiĝo, la sukceso de SALT II kaj de aliaj malarmadaj traktadoj inter Usono kaj Sovetunio, la eŭropa sekureco kaj la mondpaco estas riskataj per tio kaj per pliaj paŝoj de la usona registaro el plej nova tempo. La intenco unue loki la neŭtronan bombon en Eŭropo estas malobservo al la devo „agadi por la paco kaj la sekureco" sur tiu kontinento, devo solene transprenita de la subskribintoj de la fina akto de Helsinki; ĝi prezentiĝas kiel serioza danĝero por la sukcesa efektivigo de la konferenco de Beogrado.

Pro tio la buroo urĝe alvokas efektivigi ĉie en la mondo dum la tempo de la unua ĝis la dekkvina de oktobro **batalagadojn kontraŭ la neŭtrona bombo kaj ĉiuj aliaj amasdetruaj armiloj.**

Tiuj aktivecoj ankaŭ servu la subtenon al la speciala sesio de la Unuiĝintaj Nacioj pri malarmadaj problemoj kaj la daŭrigon de la kampanjo por la nova Stokholma alvoko, en kiu estas postulataj la ĉesigo de la vetarmado, ĝenerala kaj kompleta malarmado, la malpermeso de amasdetruaj armiloj flanke de ĉiuj landoj kaj la urĝa kunvoko de mondkonferenco pri malarmado flanke de la Unuiĝintaj Nacioj.

La buroo alvokas ĉiujn naciajn packomitatojn, politikajn partiojn kaj aliajn naciajn, regionajn kaj internaciajn movadojn kaj organizaĵojn organizi jenajn aktivecojn por la alarmado de la publiko konsidere al la novaj danĝeroj:

Amasmanifestacioj, mitingoj, demonstracioj, delegacioj, peticioj al parlamentanoj kaj membroj de leĝdonaj korporacioj, registaroj kaj ŝtatestroj, flugfolioj, publicaĵoj kaj larĝa utiligo de la amasmedioj. Ni alvokas direkti



Kunsido de la buroo de la Monda Packonsilantaro en Berlin, 9. 9. 1977. Civitanoj el GDR transdonas al Romesh Chandra protestrezoluciojn kontraŭ la neŭtrona bombo.

Foto: Zentralbild

protestleterojn speciale al la prezidento de Usono, en kiuj oni postulas ĉesigi la evoluigon de la neŭtrona bombo.
Proskribu la neŭtronan bombon!
Haltigu la eskaladon de la vetarmado flanke de Pentagono!
Proskribu ĉiujn novajn amasdetruajn armilojn!
En la nomo de la humaneco – la neŭtrona bombo devas ne esti produktata, la vetarmado devas esti haltigata! La pacamaj fortoj de la mondo, la monda publiko havas la forton atingi tion, se ili agas decide – agas nun!

Opinioj pri la neŭtrona bombo

D-ro Linus Pauling, nobelpremiito (Usono)
Mi opinias, ke la produktado de tiu neŭtrona bombo kaj ĝia disponigo al la armeoj prezentas por la militistaj gvidantoj tenton apliki ĝin. La uzo de tiaj nukleaj armiloj preskaŭ certe kondukus al mondmilito, en kiu la teruraj hidrogenaj bomboj deponitaj en la kernarmilaj arsenaloj estus aplikataj.

Profesoro D-ro Bredow (Federacia Respubliko Germanio)
Kiu tiel frivole okulumas kun la ideo de limigita unua aplikado de nukleaj armiloj, kiu volas kvazaŭ bongustigi ilian efikon kiel simple plifortigitan artilerion de konvencia speco, tiu probabligas la nuklean militon.

Herbert Scoville, iama anstataŭanta direktoro de CIA
La nova armilo ne plihumanigas la atoman militon, sed pliprobabligas ĝin.

Prof. B. T. Feld, (Usono)
Per la kontribuo al la iluzio, ke kernarmiloj estas uzeblaj, per la subfosado de la barilo kontraŭ la unua apliko de kernarmiloj, per tio, ke oni fidas ilin en kreskanta mezuro kaj malplialtigas la sojlon de ilia enkonduko en ebla konflikto, la apliko de la neŭtrona bombo povus altgrade pligrandigi la ŝancojn pri kernmilito, kies ĉiukondiĉa evitado devas esti la racia bazo por la diplomatio de la grandpotencoj.

Lord Chalfont, (Grandbritio)
Laŭ mia opinio neniu akuzos min esti obsedita antimilitaristo aŭ ne kapabli ekkoni la diversajn danĝerojn por la sekureco kaj la daŭra ekzisto de la libera mondo. Kion mi volas diri pri la neŭtrona bombo, tio espereble estos rigardata kiel racie kaj objektive... La neŭtrona bombo estas planita por la apliko sur la batalejo... Estas fatala konsekvenco, ke tiu armilo forviŝas la diferencon inter nukleaj kaj konvenciaj armiloj... Se foje la sojlo estos transpaŝita, ne plu ekzistos iu ebleco, ne konduki la batalon kiel atoman tenisludon...

Hugh Jenkins, deputito de la brita labor-partio
Se oni foje enkondukis la ideon de tiel nomata aplikebla atomarmilo, egale ĉu ĝi nomiĝas taktika aŭ neŭtrona armilo, tiam la teorio pri la fortimigo per la posedo de atomarmiloj kolapsas. La ideo de la konstruado kaj eventuala apliko de tiu armilo... konfrontas la homaron denove kun la riskoj de la sesdekaj jaroj, kiuj, tamen, ĉi-foje estas miloble pli grandaj.

Karin Söder, ministro pri eksteraj aferoj (Svedio)
Temas pri senekzemple kruela armilo. Ni estas kontraŭ tiu intenco ankaŭ pro tio, ĉar la kreado de novaj amasdetruaj armiloj forcas la armadan vetkonkuron. Tiu fakto devas igi nin intensigi la batalon kontraŭ la atoma armado.

Prof. Erik Burhop, (Grandbritio), prezidanto de la Monda Federacio de Sciencaj Laboristoj
Tiu paŝo nur kondukos al plifortigo de la vetarmado kaj malplifaciligos interkonsenton pri malarmado... La neŭtrona bombo estas antaŭ ĉio armilo de la agresanto, kiu strebas al tio, sendifektitaj ekposedi urbojn kaj industriajn objektojn de aliaj landoj. La decido por la konstruo de la neŭtrona armilo signifas la malobservon al unu el la bazaj rajtoj de la homoj en la tuta mondo, de la rajto vivi libera de la danĝero de nuklea milito. Tiu paŝo pensigas multajn homojn pri tio, kio estas la vera intenco de la NATO-ŝtatoj, sur kies teritorio povus esti lokita tiu amasdetrua armilo. La popolo de Usono same kiel la popoloj de la NATO-ŝtatoj devas malebligi la lokadon de tiu terura armilo.

Pavel Tŝerenkov, (Sovetunio), fizikisto kaj nobelpremiito
La tuta babilado pri limigita efiko de la neŭtrona bombo kaj la provoj prezenti ĝin humana, estas konscia trompo. Tiu ĉi servas al la celo bremsi la procezon de la internacia malstreĉiĝo, revivigi la atmosferon de la malvarma milito kaj iom post iom legalizi la aplikon de atomaj armiloj.

Ŝejko Abdul-Hamed as-Saeh, profesoro pri islama teologio, universitato Amano, Jordanio, iama ministro pri religiaj aferoj kaj sanktaj lokoj
La produktado de tia bombo direktiĝas kontraŭ la diro de Dio, ke ni estimu la homon, kaj ĝi direktiĝas kontraŭ la homajn rajtojn. Ĝi minacas la mondon per danĝero kaj enorma detruo. Tio postulas de ni mobilizi ĉiujn fortojn por bridi tiun danĝeron.

(El la broŝuro de la Monda Packonsilantaro „Neŭtrona bombo – Ne!"
tradukis: D-ro Karl Schulze, Berlin)

Aleksandr Logvin

Koŝmara sonĝo

Bono de la homoj – en la vivo... La vivo devas kaj povas esti senĉesa ĝojo.

Leo Tolstoj

Mi trovas min en naskoloko,
La sama de la praepoko –
Dometoj blankaj en ĝardenoj...
Sed kie homoj? Ho bonvenaj!
Ĉirkaŭe ĝemo, plendo, krio...
Kio okazis? Mia dio!
Nek birdokant', nek homparolo...
Jen mortaj: homo... oriolo...
Infanoj... floroj... papilioj...
Ĉi morto – post neŭtronradioj!
Kruelan bombon de sufero
Ne hom' inventis – Lucifero!
Imagis li, ke viv' – nenio...
Freneza idioto, kio, kio
Estas pli bela ol la vivo?!
Ĉiame vivo! Sole vivo!
Por ĝi – por amo, ĝoj, spirito –
For la neŭtronon! For militon!
En nomo de la homoj, geamikoj,
En nomo de la Mond-Patrino
Ni jurpromesu ĝis la fino
Batali por la viv' reala
Kontraŭ perforto ĉi brutala!
Nek tago sen la maltrankvilo
Pro senhomeca la armilo...
La hom' – trezoro de la Tero –
Ne simpla albumena ero...
La homo – kerno de progreso!
Neŭtrono – monstro de agreso!
La cel' de l'homo, far de l'homo –
Defendi sin kaj sian domon!
Ĉe Pentagona bombamaso
Korĝoje grakas korvo grasa
Kaj Carter, Carter inter ili
Preparas sin en mond' jubili...
Malbenon de la hom' kaj dio
Al Pentagona histerio!
En mia koro ardas forto
Kontraŭ neŭtrono, kontraŭ morto!
Mi prenas bombon de neŭtrono
Kaj ĵetas ĝin al Pentagono!
Post la eksplodo... Mi vekiĝis.
Feliĉo, ke nur sonĝe tio iĝis.
Sed ni ne metu en forgeson,
Ĉi tiun krimon, ĉi agreson!
Por ke neŭtrona bomb' ne krevu –
Pacbatalantoj, levu, levu
Proteston, lukton en akordo
Kontraŭ milita aĉa hordo!

Konsideru la vorteton „Nur“!

De Peter Edel, verkisto kaj pentristo; kiel kontraŭfaŝisma rezistulo li devis travivi la terurаĵojn de la nazia barbaraĵo en la koncentrejoj Auschwitz, Sachsenhausen kaj Mauthausen.

Nur –. Sendanĝera vorteto, ofte uzata. Tiel ofte kiel la bona vorto homo. Kunligita per diabla maniero, ĝi efikas terurige. „**Nur** homoj“, tiel ni legas, estas celataj per la neŭtrona bombo. Tiuj, kiuj ne protestas kontraŭ tia NUR, inter ili kelkaj NATO-ekspertoj, kiuj interparolis okaze de la datreveno de la atombomba ĵetigo sur Hiroŝiman antaŭ siaj televiziaj kameroj specialiste, honeste kaj indiferente pri avantaĝoj kaj malavantaĝoj de la esence „humana“, tute „ne tiel malbona“ armilo, per ridetantaj mienoj, kelkfoje vigle ŝercante, kvazaŭ temus pri kiel eble plej profitodona uzado de lavmaŝino, ili terure memorigis min pri aliaj ekspertizistoj, kiuj same indiferente elkalkulis la kremaciejajn kapacitojn de la pereigejoj Majdanek, Treblinka kaj Aŭschwitz. **Nur** ses milionoj da gasmurditoj, forbruligitoj. **Nur** preskaŭ tricentmilo da homoj, kiuj disradiiĝis per la unua atomfulmo. **Nur** kelkmiloj da vjetnamoj, gepatroj kaj infanoj, kiuj pereis en napalma fajro. **Nur** sennombraj sennomuloj, kiuj eĉ hodiaŭ suferas pro la sekvoj de la hiroŝima bombo, devas mizere morti. **Nur** homoj!

Tamen ja scias la indiferentaj kalkulantoj, ke ĉiu, ankaŭ la plej terura armilo, devige kreas kontraŭarmilon. Ĉis kie ili ankoraŭ volas daŭrigi? Tiel, kiel iliaj samspecanoj miskalkulis dum kaj post la dua mondmilito, sekvante la manion, povi por ĉiam praktikadi ĉantaĝan hegemonion per la bombo direktita kontraŭ Sovetunio, same tiel ili ĉifoje miskalkulos. La malhomeca NUR estos memortenata de la homoj, kiuj faras ĉion por neniigi la teruran planon per sia amasigita pacpotenco.

Sed dum tio la administrantoj de la usona prezidanto kaj la Pentagon-strategiistoj ekkomunikas ke „oni troviĝas nur je la komenco“ de tute nova armada sistemo. Cinike, malkaŝe malestimante la homojn ili provokas barbaran disvastigon kaj samtempe parolas pri homdigno kaj homrajto. Ili ne hontas ĉitage primoketi milionojn da homoj kiel „sensciajn“ kaj „delogitajn“, ĉar ili defendas la plej elementan bazrajton – la volo vivi en paco – kaj tiusence unuece asociiĝas kontraŭ tiuj, kiuj minacas la vivon. Tio ja estus „nur denove la kutima“, iu „komuniste direktita kampanjo“.

Tiuj, kiuj tiel skribas kaj parolas, lasu diri al si de la malmultaj, kiuj povis transvivi la plej grandan hitleran amaspereigejon: La „kampanjo“ direktita de la pacvolo de homoj de ĉiuj landoj estas por ni identa kun la internacia ĵuro de Buchenwald, kaj estas memkompreneble ke en la plej antaŭaj vicoj kiel ĉiam tiel ankaŭ nun staras niaj kamaradoj. Mi ne konas pli necesan kampanjon ol ĉi tiun kaj mi konfesas min ano de la serioza, konsterne aktuala averto, kiun Bertolt Brecht metis dum la popola kongreso por la paco en Vieno je 1952a jaro:

„... La priskribojn, kiujn la novjorkano ricevis pri la teruroj de la atombombo, ŝajne ektimigis lin nur iomete... La tutmondaj teruroj de la kvardekaj jaroj ŝajnas forgesitaj. La hieraŭa pluvo ne malsekigas nin, multaj diras. Tiu indiferentiĝo estas, kion ni devas kontraŭbatali, ĝia plej ekstrema rango estas la morto... Ni ĉiam denove diru la milfoje diritan, por ke ĝi ne estu unufoje tro malmulte dirita! Ni renovigu la avertojn, kaj eĉ se ili jam estas kiel cindro en nia buŝo! Ĉar al la homaro minacas militoj, kontraŭ kiuj la pasintaj estas kiel mizeraj provoj, kaj ili venos sen iu ajn dubo, se al tiuj, kiuj ilin tute publike preparas, ne estos disbatitaj la manoj.“

Malmolaj, koleraj vortoj, certe. Sed konsideru la vorteton „Nur“!

Trad. M. Lennartz
(El DDR-Revue 1/78)

Tudor Denektin

Porpaca flugfolio

Bonan Pacon!
Jen salut' atendinta jarmilojn
esti turnata de homo al homo!
Pacon al tuta surtera spiraro,
Pacon al ĉiu domo!

Pacon sur tero,
Pacon sub maro
kaj en aero!

Pacon al tero
kaj al subtero –
nia komuna
kaj nuna
aŭ je l'estonto
loĝejo!

Pacon al ĉiu
ĉeestanta la mondon
kaj ĉeestonta!

Pacon al akvo – tutmonda
lulilo de l'vivo surtera!
Pacon sub akvo, al fiŝoj,
ke la ŝtalfiŝoj ne plu elĵetu
la nigran frajon naskantan funebron!

Pacon al blua tabulo ĉiela
de l'vivlernejo tutmonda!
Pacon al flugantaro,
ke la ŝtalbirdoj ne plu verkadu
sur tia tabulo per nigro
la morton kaj malfeliĉon!

Pacon
por brili ĉiam la suno
de l'vivo,
por lumigi la teron
la homa kreivo!

Nur unu batalon akcepti:
la porhoman batalon
pri l'pliriĉigo de l'tero,
pri l'plibonigo de l'vivo,
pri l'pliheligo de la sereno,
sub unika reganto de l'mondo –
la organizo de l'unuiĝontaj
Animo, Menso, Interkompreno –
por fariĝi la homrevo reala
kaj la Pac' ĝenerala
tiam estiĝu
supergeneralo
en tia batalo!

Pacon al nia
homara loĝejo
kaj iĝu la Tria-
for-de-la-Suno:
Pacejo!
Pacon al tuta mondo!
Bonan Pacon,
geamikoj de la estonto!

Manfred Arnold

Paco sur tero!

Paco sur tero!
Revo malnova de l'homo,
  neŝancelebla espero
ekde homara komenco!
  Kial ĉiama minaco?
Estis ja pli da militoj
  ol periodoj de paco.
Ĉu do kruela kaj fia
  estas la homa naturo,
ke li ne povas ekzisti
  pace, sen ĉiu teruro?

Paco sur tero,
iam predikis la pastroj
  kontraŭ la militmizero.
Spite de tio regadis
  tiam precipe la glavoj!
Kial en lukto mortbatis
  unu alian la sklavoj?
Estis ja sklavposedantoj,
  kiuj al tio instigis!
Por ke pliigu propraĵon,
  ili kun fort' militigis.

Paco sur tero,
do eklezio proklamis
  ankaŭ en mezepok'-ero.
Ĉu kamparano mizera
  aŭ metiisto doloron
sur batalkampo preferis
  pli ol paceman laboron?
Estis ja feŭdaj sinjoroj,
  kiuj devigis la virojn
murdi iliajn kunulojn
  por pligrandigi akirojn!

Paco sur tero!
Kiu do kulpis sur mondo
  pri la konstanta danĝero?
Ĉu la ministro enviis
  al sia propra klasano
en eksterlando malgrandan
  sekan peceton da pano?
Estis imperialistoj,
  kiuj en grandajn militojn
ilin elsendis dufoje
  por plialtigi profitojn!

Paco sur tero!
Vortoj unuaj de l'juna
  sovetpotenco, prospero
kaj liberigo samtempe.
  Socialismo ekagis!
Homoj de tiam la pacon
  cel' atingebla imagis.
Estas videbla de tiam
  ankaŭ en homaj rilatoj:
Paco kaj socialismo
  estas devene gefratoj!

Paco sur tero!
Realigebla estonto,
  sed nefarebla afero
sen malindulga batalo
  kontraŭ danĝeraj rezistoj
de malamikoj de l'homo,
  kontraŭ la militaristoj!
Se vi deziras la pacon,
  pledu por ĝi ĉiutage!
Helpu al ĝia sukceso,
  helpu kaj vorte kaj age!

1978 renkontiĝos en Havano la junularo de la mondo.

Foto: Zentralbild

Maksim Tank

Tosto por amikeco

Se kune ĉiuj ni eklevos
La blankajn, flavajn, nigrajn manojn,
Ni povos ĝis plej foraj altoj
Eĉ movi sunon flaman.

Se ni kunplektos ĉiujn polmojn
De l'nigraj, blankaj, flavaj manoj,
Ni zonos per vivanta krono
Planedon nian la malsanan.

Se ĉiuj ni mallevos pugnojn
De l'flavaj, nigraj, blankaj manoj,
Tuj renversiĝos la katenoj
Kaj mondon skuos uragano.

Do, levu ni l'kalikojn plenajn
De vinoj ŝaŭmaj, diafanaj
Por la eterna amikeco
De l'blankaj, flavaj, nigraj manoj.

Elbelarusigis B. Berin

Ĉu la germana faŝismo ankoraŭ vivas?

Post la milito la generaloj de la aliancaj okupaciaj armeoj transprenis la administradon en la okupitaj regionoj. En la parto, okupita de la armeo de Sovetio, la ĉefa celo estis, senradikigi la faŝismon. En la kromaj partoj, inkluzive de tiuj partoj de Berlin, okupitaj de okcidentaj armeoj, la celo estis, malebligi socialismajn tendencojn.
La plej energiaj kontraŭsocialistoj estis la faŝistoj, sed iliaj metodoj estis tro barbaraj, ke oni ilin povis toleri publike.
Kiuj sin sentis kulpaj pro faŝismaj krimagoj kompreneble forlasis la orientan parton de Germanio. Ankaŭ en la okcidentaj regionoj estis esplorite, kiu kulpis, sed la esploradon plenumis simpatiantoj de la faŝismo, certe ne kontraŭuloj de ili. Multaj kulpuloj sin kaŝis per falsigitaj dokumentoj kaj ne estis troveblaj. La tiama ĥaoso faciligis tiun ĉi metodon.
Dum en la sovetia okupacia zono (Poste Germana Demokratia Respubliko = GDR) ĉiu pedagogo, ĉiu policano, ĉiu administracia oficisto, ĉiu policano estis senoficigita, kaj ricevis alian laboron, la oficistoj en FRG restis en siaj postenoj kaj pritraktis ĉion laŭ la vidpunktoj, postulitaj dum la faŝismo. En Federacia Respubliko Germanio (FRG) ĝenerale oni argumentis, ke kriminto en la servo de la faŝismaj armeo aŭ bandoj, ne povis agi alie, ĉar la tiamaj leĝoj postulis tion. Kaj post kiam mortbato estis rajtperditaj, dum murdado ĉiam estis punebla, eĉ la prokuroroj fariĝis advokatoj por la militkrimintoj kaj ofendis la atestantojn el aliaj landoj, kiuj atestis la personon de la krimintoj. Tiam estis dube ĉu post jaroj la akuzitaj estas rekoneblaj.
La membreco en la partio de Hitler ne estis kaŭzo, senoficigi aŭ profesoron aŭ instruiston. Ili ankaŭ rajtis fariĝi policanoj. Kvankam internaciaj leĝoj postulis, ke novofondigo de faŝismaj organizoj estas malpermesita, la krimula organizo SS formigis helporganizon, por subteni la iamajn membrojn de tiu ĉi plej bruteca organizo. En Romo la arestita iama faŝisma komandinto de tiu ĉi urbo, kondamnita je dumviva karcero, estis liberigita. Liberigis lin – lia edzino. Tiu ĉi homo lasis ekzekuti pli ol tricent homojn, kiuj ĉiuj estis senkulpaj. Li eĉ lasis mortpafi pli multajn ol postulis la barbaraj leĝoj de Hitler. Kaj nun lia edzino – kiu fariĝis lia edzino post 24 jaroj da karcero kaj kiu konis liajn krimojn – liberigis lin. Ŝi mensoge asertis, ke ŝi faris tion sen fremda subteno.
Tiu ĉi okazo alarmis ĉiujn kontraŭfaŝistojn kaj aliajn homojn en la landoj, kiuj suferis sub german-faŝisma okupado. Ili vekiĝis kaj demandas: Kiel potenca nun estas la faŝismo en Germanio? La faŝismo estas tiel potenca, kiel potencaj estas la germanaj industrikapitanoj, kiuj financis la partion de Hitler, kaj kiuj nun propagandas: Hitler tre rapide forigis la senlaborecon.
La ekonomia krizo nun estas uzata, por revoki la faŝismon sur la internacian scenejon. Oni reklamas, Hitler forigis la senlaborecon, sed oni prisilentas, kiom da homoj pro ties politiko devis morti dum la ĝis nun senekzempla milito. Nun oni malkaŝe propagandas por la faŝismo. Filmoj kaj libroj pri kaj de Hitler influu la homojn kaj entuziasmigu ilin. Dum homoj estas senoficigitaj, ĉar ili estas membroj aŭ simpatias kun la socialismo, dum denunciantoj revaloriĝas kaj estas bezonataj, la faŝismo eklevas la kapon kaj ekpropagandas, ŝirmata de la (ŝajn-) demokrata polico de FRG.
Fakuloj deklaras, ke en la jaro 1980 800 000 gejunuloj en FRG estos senlaboraj. Membroj de faŝisma partio ne estos inter ili. Kaj nun la registaro de FRG lamentas: Denove oni pentras la portreton de la malbona germano! Sed kiu nur kaj senescepte rigardas maldekstren kaj subpremas la komunismon, ne miru, ke kreskas la reakcio. Kaj ĉar la mondo nun scias, kiel danĝera la germana faŝismo estis, des pli kolektiĝos inter la homaro la fortoj, kiuj alarmas kaj avertas antaŭ danĝero, kies naskejo estas FRG.

Rudolf Zimmermann

Krzysztof Kąkolewski


Dialogo inter hamburganoj

En la jaro 1942 al la geto de Lodzo oni transportis en brutvagonoj germanajn judojn, eksoficirojn kaj kavalirojn de la Fera Kruco el la tempo de la unua mondmilito. Inter ili troviĝis hamburga komercisto, eksterserva majoro Buchbinder kun la edzino. Hannelore Buchbinder, fraŭlina nomo von Kreutzberger, venis ĉi tien – se oni rajtus uzi tiun ĉi vorton – libervole, volante akompani sian edzon ĝis fino. Ŝi rezistis al la malespero de siaj fratinoj kaj al tri alvokoj al gestapo, sed tie ĉi jam momente post la malŝarĝo de la transporto ŝi sciis, ke ŝi forlasos la edzon. Ŝi eltenis du tagojn dank' al la impreso, ke ĉio ĉi okazas ne al ŝi, ke ŝi estas nur spektanto. La trian tagon la impreso plifortiĝis kaj komencis ŝajni al ŝi, ke Hannelore Buchbinder estas nur ŝia konatino, kiu povas multe helpi al ŝi uzante siajn hamburgajn influojn. Tiam ŝi iris en la direkto al la geta limo. Ŝi elektis grandulon kun ostentacie malvarma, malestima vizaĝo, tro malgranda helmo, pafista insigno, armitan per karabeno. Kiam ŝi transpaŝis la permesitan distancon, li demetis sian karabenon el la ŝultro. Ŝi diris ordonvoĉe:
– Bonvolu mortpafi min.
La soldato ne komprenis en la unua momento, estis por li nekredeble, ke iu aŭdacas paroli al li, sed tuj li trankviliĝis kaj levis la kolbon kontraŭ ŝin.
Ŝi ne retiriĝis, li kolbopuŝis ŝin.
– Ne ci ordonas tie ĉi. Oni likvidos cin en ĝusta tempo.
– Mi estas arjanino.
– Ne mensogu, pediko. Ĉi tie estas nur judoj.
– Mia fraŭlina nomo estas von Kreutzberger.
– Pro tia mensogaĉo ci meritas piedfrapon. Krojcbergeroj estas el Hamburgo, same kiel mi.
– Do vi estas hamburgano? Mi pruvos ĉion. Ni loĝas en Blankensee. Parko, meze duetaĝa domo. Duoncirkla alirejo, somere oni starigas tie palmojn. Tri plenkreskaj infanoj. Nia firmao troviĝas en la haveno, post la morto de la patro transprenis ĝin la frato.
– Tion ĉi scias ĉiu en Hamburgo.
– Mi havas du fratinojn. Unu iom lamas post motorcikla akcidento. Ŝia edzo estis motorsportisto. Li pereis en batalo en Norvegio.
– Du hamburganoj en Lodzo – ĝoje ekkriis la soldato – kie ili nun ne estas troveblaj! Tio ĉi tute ŝanĝas la aferon. Por samurbanino mi povas tion fari.
Li malsuprenigis la karabenon, faris ŝarĝomovon. La kuglo elpafita deproksime trafis ŝin kun granda forto.

Tradukis T. J. Michalski

Hans Veigl

„Ni forbruligu judojn!"



El „Der Spiegel" 36/77 (FRG): Ŝmiraĵoj sur la juda tombejo en Mainz/FRG

„Ili estas nek teroristoj nek ties simpatiantoj. Ĉar ili neniam demonstracias por paco, malarmado kaj demokratio ili ne devas timi profesian malpermeson aŭ Federacian Konstituciopolicon kaj konsistigas tiun rezervistaron, kiun la terorprofitantoj en Okcidenta Germanio denove povus ekuzi: por la marŝado ĝis la gasmortigo.

La okcidentgermana federacia armeo, plej forta kaj plej moderna en okcidenta Eŭropo, jam ekde sia fondo flegas strangajn tradiciojn. Estas ankoraŭ en la memoro la partopreno de la tiama armea inspektisto Hildebrandt ĉe Franco-parado en Madrido, la militistaj kontaktoj de altrangaj FRG-oficiroj al la sudafrika rasista reĝimo, la propagandoparolado de la ĉilia vickolonelo Kraushaar ĉe la hamburga gvidakademio kaj la okazaĵo pri la nazia kolonelo Rudel.

Laŭdire ankaŭ tiu kamaradara vespero la 16-an de februaro en la pasinta jaro ĉe la altlernejo de la federacia armeo en Munkeno ne pasis neordinare. La humoro estis jam sufiĉe progresinta, kiam grupo da oficiroj en leŭtenanta rango – ĉiu el ili kun ekzamene atestita taŭgeco kiel superulo – ekbruligis fajron. Tiam laŭ deklaro de atestanto unu diris: ‚Ni forbruligu judojn!' Responde al tio oni ĵetis en la fajron kartonpecojn, ŝmiritajn per la vorto ‚judoj'. ‚Sieg Heil'-vokoj estis elbuŝigitaj kaj la nazia kanto ‚Die Fahne hoch . . .' estis ekkantita.

Same la superuloj prisilentis okazaĵon de la 21-a de aprilo de la pasinta jaro ĉe la munkena altlernejo de la federacia armeo: Leŭtenanto estis ornaminta sian seminarian verkaĵon per hokokrucoj. La rektoro prijuĝis la okazaĵon ‚stultknaba malsaĝaĵo' kaj ree ne informis la defendoministerion en Bonno.

Do ministro Leber en aŭtuno devis ekscii nur el la gazeto ‚Frankfurter Rundschau' tion, kion liaj edukoficiroj antaŭe nomis ‚ne simptoma' kaj ‚ne tiom grava'. Dum la ministro ankoraŭ profundiĝis en la legaĵon, rondiris jam novaj sciigoj pri la agoj de la junoficiroj: Dum studvojaĝo al Vieno, en la alta sento, ke morgaŭ apartenus al ili la tuta mondo, en la Judostrateto (nomo de strato en Vieno) ili komandis: ‚Judoj elpaŝu por pafmortigo!'

Kiel dirite, nenio neordinara por munkenaj oficirlernantoj . . . Preterpase ankoraŭ estu notate, ke en tiu lernejo la malkaŝa plakatigo de la faŝista gazeto ‚National- und Soldaten-Zeitung' fariĝis ŝatokupo por studentoj kaj docentoj. Intertempe konatiĝis reago de la defendoministerio en Bonno: al ĉiuj koncernaj oficiroj oni malpermesis doni iajn deklarojn. La stabkuracisto Rüdiger Beck cetere devas forlasi la federacian armeon antaŭtempe. Argumento por tiu ĉi puno flanke de la armea gvidantaro estas la partopreno de Beck en aranĝo okaze de kontraŭmilita tago."

(El DDR-Revue 1/78)
Trad.: D. Dungert

Kurt Tucholsky

La du Germanioj

Ĉe l'trono-ŝtupoj staras ni,
fidelo nia: neskuebla.
Ni pretas tuj al hura-kri',
se tio iel estas ebla – !

La granda tranĉo, kiu disigas tiun ĉi landon, ne estas la rezulto de partiaj programoj. La partioj ja nur esprimas la spiritajn kaj ekonomiajn konstituciojn. La tranĉo, tiu granda, disiga linio male iras tra ĉiuj: ankaŭ tra la stratoj de la nepolitikuloj, de la simpatiantoj, de tiuj, kiuj ne estas partiece ligitaj, tra la stratetoj de la virinoj kaj infanoj, se ili jam povas pensi – tra ĉiuj.

Ekzistas du Germanioj. Ne: blanka kaj nigra – ruĝeta kaj profunde malhela, sed: reakcia, malbona kaj progresema, estontespera. Kaj tiel aspektas tiuj ĉi Germanioj.

Je unu flanko la plej granda parto de la reganta klaso kaj konsiderinda parto de la burĝaro kaj eĉ pli de la etburĝaro. La morala kvalito de tiuj ĉi rondoj estas vere timiga en la nuna Germanio. Ne, ke ili estas same senmoralaj kiel la antikvaj Rom-anoj – tute ne, ili preskaŭ ĉiuj estas filistroj – malgrandaj naturoj, kiuj nur konas monon kaj reputacion, kiuj ne taksas la internan valoron, sed la fasadon. Al ĉiuj estas komuna la neskuebla kredo al la kruda potenco. „Oni starigu ilin al la muro!" – tio estas ilia recepto por solvi sociajn problemojn. Krom tio ili kredas, ke la pli ofte baniĝinta homo estas entute la pli bona homo (kvankam la higieno de la germana mezkvalita civitano ĝenerale ne estas kontentiga). „Malriĉa" kaj „malbona" laŭ ili konformas. Ĉar tio estas karakteriza por la postmilita tempo: La kompleta burĝaro estas kaptita de malamo kontraŭ la proletaro, kiun oni antaŭe ne povis imagi. La klasofiero ŝanĝiĝis al inkandesko de malamo, abomeno kaj malŝato kontraŭ ĉiuj, kiuj ne apartenas al la sama ekonomia klaso. Ĉar la unuan fojon tiuj entreprenistoj sin sentis minacataj en sia plej sankta privilegio: en la ekspluatado. Ja ne nur minacata per la postuloj de la laboristaro vipita de la prezaltiĝoj – sed antaŭ ĉio principe minacata. La popolo ne plu kredas al la Biblio – kaj' ĝi ne plu kredas Dia volo la profiton de la kapitalistoj.

La senta krudeco de tiu klaso ne estas superebla. Oni devas aŭdi, kiel ankoraŭ hodiaŭ la bonstataj burĝaj societoj

parolas pri la morta Rosa Luxemburg, pri Eisner, pri Liebknecht. Oni tute ne kaŝas la ĝojon pri tio, ke tiuj homoj estis murditaj. „Dankon al Dio!"
Plej tragedie estas, ke inter la burĝaro ne ekzistas opozicia junularo. Estas vere la unua fojo dum nia historio, ke la idaro de tuta lando, kreskinta inter tiuj ĉi klasanoj, ne volas konkeri la ĉielon, sed deziras „trankvilon kaj ordon". Trankvilo kaj ordo? – Estas tiu ordo, kiu apartigas per belaj ferforĝitaj kradoj la malsatulon, kiu malsatmortas sur la ŝoseo, disde la komforte matenmanĝanta burĝo malantaŭ la krado. Kaj se ne taŭgas tia krado, ili ankoraŭ havas alian.

Ekzistas ankaŭ tie esceptoj. Estas komprenebla, la kolosa malkonfido, kiun havas la laborista klaso kontraŭ proksimiĝantaj intelektuloj. Sed jam vivas impona nombro da studentoj, instruistoj kaj akademianoj ĉiuspecaj, kiuj efektive volas eliĝi el la medio, en kiun ili naskiĝis – kaj kiuj vere kaj sincere staras je la alia flanko. – Oni ilin ne reŝovu.

Je la alia flanko staras la proletaro. Hodiaŭ ne unuiĝinta, sed disigita. Kun la plej grava malamiko en si mem; kun la inklino, sin asimili al la etburĝoj (aŭ: imiti la etburĝojn) kaj fariĝi ĝuste kiel ili. (Oni bezonas en tiu kampo parton de butikistoj, kiuj certe liveris spertojn al ĉiu klaskonscia laboristo.) Jen estas vera danĝero venkenda. Ĝuste en tiu ĉi Germanio, ĝuste sub tiuj kompatindaj vivokondiĉoj, en tiaj ĉambroj troplenaj de homoj, en tiuj kavernoj por tuberkulozo, mi ree kaj ree trovis tiom da bonkoreco, tiom da idealismo kaj tiom da sentkapablo, ke la frazaĵo „la revolucio nur estas prisalajra movado" certe ne estas trafa. Mirinde kaj estiminde estas, ke la laboristo post sia okhora labortago, kiun ili nun volas eĉ nuligi, ankoraŭ havas tempon kaj energion, zorgi pri kulturaj aferoj. Je la alia flanko staras la malmola monokla vizaĝo. (Ankaŭ ekzistas kelkaj sen tia vitraĵo.) Tiu konvinkiteco pri si mem, tiu senta krudeco, tiu manko de fantazio imagi la situacion de sia samlandano – tio estas senekzempla kaj tute laŭ la maniero de la eksimperiestro Wilhelm.

Per sentimentaleco kaj apelacioj al la „noblaj flankoj de la homo" ni ne sukcesos. Tio estas pasinta. Tio okazas laŭ eternaj leĝoj – kaj jen kio necesas: batalo – batalo kaj senkompromisa energio kaj senlaca klopodado! Je la alia flanko, en la alia Germanio, staras la suboficiro, la majoro, la kvarangula kranio de kaŝuba-slava mikssraso, kiu posedas ĉiujn malbonajn ecojn de siaj prapatroj, sed ne ties bonajn. Nia Germanio havas nur ĉefe unu amikon, nia respubliko preskaŭ nur tiun unu: la laboriston.

Trad. Rudolf Zimmermann / d-ro Karl Schulze

Pola esperantistino travivis la koncentrejon de Oŝwiecim

Mi travivis inferon

de Edwarda Kaminska

Estas konata fakto, ke nun la iamaj SS-anoj (1) tute malkaŝe celas al tria mondmilito, ke ili denove volas dronigi la homaron en sango. Ilia fama ĉiama „Marŝo al Oriento" kaj la germana naziismo bedaŭrinde ne mortis kune kun Hitler. Pro tio mi deziras priskribi la travivitan inferon en Oŝwiecim kaj Ravensbrück por rememorigi pri la teruraĵoj kaj la rimedoj, kiujn uzis la murdistoj por neniigi milionojn da senkulpaj homoj.

N-ro 55034

Vekiĝinte sabate la 20-an de septembro 1943 frumatene, mi tute ne supozis, ke tiu ĉi tago ludos skuan rolon en mia vivo. Tamen al tiu, kiu vivis tiam en okupita lando, ĉiumomente minacis danĝera vizito de la Gestapo (2). Gestapo eltiris min el mia hejmo por du turmentaj jaroj, kiujn mi travivis en teruraj cirkonstancoj.
Oni forkaptis min for de mia edzo, kiu en la momento ne estis hejme kaj de la 3-jara filineto Halina, kies senespera voko ripete kaj daŭre resonadis en miaj oreloj: „Patrinjo, patrinjo, kiam vi revenos?"
Tiam mi estis certa, ke oni mortpafos min. Kiom mi timis! Mi ja ne supozis, ke venos tempo, kiam mi sopiros esti mortpafita por eviti morton en gaskamero kaj forno.
En vagonojn por brutaro oni enpremis nin 249 polajn patriotojn – virojn kaj virinojn. Multajn Gestapo prenis en nuraj litvestoj meze en la nokto.
La sekvintan tagon la trajno atingis la neniigejon Oŝwiecim-Birkenau. Ian iluzion pri nia sorto ni ne plu havis. Multon ni aŭdis pri la infero en Oŝwiecim, sed kion poste ni devis travivi, neniu el ni iam imagis. Sana menso ne kapablas tion koncepti. Sur malpura planko ni kuŝis la tutan nokton. Apenaŭ iu parolis. Ĉies pensoj reiris al la tagoj de libereco kaj feliĉo, al la karuloj en la hejmlando. Ni apatie konsciis, ke la vivo estas malantaŭ ni, ke ne atendas nin io alia krom humiligo, mizero kaj morto. Dormi ne eblis. Fiinsektoj abunde pikis niajn korpojn. Malespere ni provis ilin ĉasi, kaj niaj fingroj estis sangoruĝaj pro dispremitaj puloj, cimoj kaj pedikoj.
Kelkaj SS – viroj kun virinoj venis por meti dolorigan stampon sur niajn brakojn. Doloro kaj sufero ekde tiam estis niaj fidelaj akompanantoj. Ekde tiam ni ĉesis esti homoj. Ĉiu ricevis numeron. Sub mia numero 55034 oni faris triangulon – nur poste mi eksciis, ke ĝi signifas mortverdikton... Poste oni fortranĉis niajn harojn por ke ili estu uzitaj per la militindustrio. Forpreninte de ni la normalajn vestojn, oni donis kompense ĉifonajn kaj aĉajn. Judaj virinoj estis apartigitaj de la nejudaj. Ĉar mi laŭdevene estas hebreino, mi troviĝis en barako, kie mi subite ekaŭdis kriojn kvazaŭ de sovaĝuloj. Unuamomente mi kredis, ke temas pri frenezulinoj kaj mi timplene alpaŝis la barakon. Ĉu mi devas vivaĉi ĉi tie? Ne, neniam, mi proteste diris, ke prefere mi mortigos min, tie ja ne povas esti loko por normalaj homoj. Bategoj sur mian kapon estis tuja respondo. Ofte aplikata puno estis genue stari, tenante la brakojn super la kapo. En tiu pozo mi devis resti dum du longaj horoj ĉar mi diris, ke mi ne povas vivi inter frenezuloj.
Sen kapharoj, vestita en ĉifona vesto, sen ŝuoj mi tiel genuis sur la malseka kota tero... estis ĵus pluvinte.
Se mi volus priskribi mian dormejon, mi plej trafe devus kompari ĝin kun kaĝoj por kunikloj. Ĝi havis tri etaĝojn, el kiuj ĉiu unuope entenis dek homojn. La kaĝoj estis tiel malaltaj, ke

ne eblis sidi, eĉ ne kliniĝe. Ofte okazis, ke elirmalpermeso estis ordonita kaj tiam ni eĉ ne rajtis forlasi la dormlokon. Malsato senfortigis nin, sed eĉ pli multe turmentis nin manko de akvo. Krome, ni suferis pro malpuro kaj parazitaj insektoj. Dum tuta semajno ni ne povis lavi nin. Multaj iĝis viktimoj de ĉiaj malsanoj. Eksplodis epidemioj kaj la medicina helpo estis minimuma. Lakso furiozis. Al la necesejo estis marŝo de unu kilometro. Ĝi estis tiom multe vizitata, ke oni devis antaŭ ĝi batali por sukcesi eniri. Kompreneble se oni povis atendi... Unu kaj alia ne sukcesis ne fari sian neceson antaŭ la eniro. Ili estis kruele traktataj de la gardistinoj. Du etaj necesejoj estis disponigataj al cent personoj. Sole nia kvarantenejo entenis dekmil kaptitinojn. En Oŝwiecim-Birkenaŭ amasiĝis homoj el plej diversaj nacioj. Vere Babelo, kie unu ne komprenis la alian. Sed kie oni insultis ĉiun kaj kverelis pro la privilegio unue eniri la necesejon. Kompreneble, interestis multaj kontraŭsociaj elementoj, ŝtelemaj kaj krimaj. Homoj politike agintaj, intelektaj kaj kleraj neniom signifis. Alvide de la primitivaj postuloj de la vivo, ĉiuj egalis, la sorto estis komuna kaj por hebreoj kaj por nehebreoj – tamen kun diferenco, ke nejudinoj estis indulgataj ĉe la elektado de viktimoj por fajrohekatomboj.

ZOFIA RAKONTAS

Inter la junulinoj troviĝis knabino, kiu vekis mian intereson. Eble pro tio mi ekŝatis ŝin, ĉar ŝi estis esperantistino? Krome, Zofia estis helpema, ĉarma kaj preskaŭ ĉiam bonhumora, kvazaŭ la minacanta danĝero ne koncernus ŝian personon. Ni kuŝis najbare en malsanuleja barako.

Malgraŭ la ĉiama bonhumoro, Zofia obstine ripetadis, ke ŝi la militon ne travivos.

„Se vi tiamaniere pensos, vi certe ĝin ne travivos, oni devas malgraŭ ĉio kredi kaj batali ĝis la lasta momento de restado en la koncentrejo. Por morti ĉiam estas tempo", mi klarigis ofte al ŝi.

Iun tagon oni sortimentis. Multajn la „komisiono" elektis por gasumi. Inter aliaj troviĝis kompreneble ankaŭ ni du. Mi uzis ĉiujn rimedojn por trovi savon, sed Zofia volis nenion entrepreni. Ŝi estis dirinta, ke nun ŝia antaŭsento pri morto efektiviĝos.

„Fino kun la vivo", ŝi diris amare.

Post streĉa diskuto Zofia promesis al mi, ke ŝi provos batali por saviĝi.

Kiam matene alvenis la ŝarĝaŭtomobiloj por forpreni la viktimojn, niaj vizaĝoj estis „ordigitaj", kaj ni tute ne aspektis kiel malsanulinoj: ankaŭ ni pentris nin. Ĝis la lasta momento ni tenis nin mano ĉe mano. Kiam oni elvokis la nomon de Zofia, ŝi kisis min dirante:

„Adiaŭ, mia kara amikino, ĝis revido neniam."

„Zofia", mi vokis senespere, „ne forgesu la donitan promeson batali ĝis la fino, ne estu rezignacia! Esperantisto ĉiam esperu kaj agu!"

Min sukcesis savi la pola kuracistino Konieczna, sed la penso pri la aliaj pereintoj ne donis al mi trankvilon...

La ŝarĝaŭtomobiloj jam estis forveturintaj kun la lastaj virinoj. Ekregis terura silento, kiel post enterigo de plej proksimaj personoj. Sufoka doloro premis la koron. Mi estis kuŝanta sur la lito, meditante pri la homa sorto. Subite io moviĝis apud mi kaj la bone konata voĉo aŭdiĝis en Esperanto:

„Edwarda, jen, via amikino revenis de la infero. Mi sukcesis saviĝi."

„Zofia, vi estas vivanta?"

„Jes, mi profitis vian konsilon kaj serĉis savon tiom longe ĝis kiam mi ĝin trovis."

La eta grupo de restintaj virinoj ĉirkaŭis nin tuj. Zofia daŭrigis sian rakonton:

„Kiam oni venigis nin per la ŝarĝaŭtomobiloj, la plej multa nombro da virinoj jam ne plu vivis. La vivantajn oni povus dividi je tri partoj: unu parto estis tute rezignacia kaj senproteste iris laŭ la ordono en la kremaciejon. La dua parto kriegis, ploris kaj batis per kapo la muron, ili eĉ provis kontraŭstari. Tiuj trovis morton antaŭ la gaskamero. La tria grupo intense serĉis ian rimedon por saviĝi. Kvankam mi ne emis batali por afero perdita laŭ mia opinio kaj volonte aliĝus al la rezignaciuloj, en miaj oreloj senĉese sonis, Edwarda, viaj vortoj, ke mi rezignu kaj batalu ĝis la fino!"

Subite mi rimarkis Johanon, mian kolegon de infanaj jaroj. Ni ambaŭ lernis kune en lernejo. Li sukcesis min esperantigi. Dum la lasta renkontiĝo antaŭ la milito, Johano konfesis al mi sian amon. Nia unua kiso estis samtempe la lasta. Mi lin jam delonge amis, sed ŝajnis al mi, ke li estas indiferenta je mi. Kiam do efektiviĝis mia deziro, ke Johano ankaŭ min ekamu ne nur kiel amiko, li devis iri militservi kaj ni perdis kontakton. Nun mi lin denove vidis, sed en kiuj cirkonstancoj! La milda Johano pelas plorantajn malfortajn virinojn en unu lokon antaŭ la pordo de la gasĉambro... Terure! Troviĝinte proksime de li, mi kaŝis min, ĉar tiam mi tamen preferis morton. La elreviĝo je mia plej kara knabo, pri kiu mi senĉese dum tago kaj nokto pensis, ne donis al mi trankvilon. Observante lin, mi rimarkis, ke lia konduto ne estas tamen la sama, kiel alies. Neniun li batis, la vizaĝo estis pala, doloro speguliĝas en la okuloj. Turniĝinte flanken, li subite rimarkis min. La efiko estis eksterordinara.



Virina koncentrejo Ravensbrück: Monumento.

Foto: E. Schäfer

„Zofia mia, ĉu ankaŭ vi estas en tiu terura loko?", demandis Johano.

„Kial mi estu escepto? Mi estas destinita al morto", mi respondis.

Li forte ĉirkaŭprenis min, apoginte mian kapon sur sia brako. Mi laŭte ploris, abundaj larmoj malsekigis lian ĉemizon. Kia doloriga afero! Mia Johano, la bela ŝajne senkulpa knabo en „Sonder-kommando"! (3). Johano kvazaŭ divenis miajn pensojn. Li certigis min, ke li neniun batis, ke oni devigis lin, ke pro „mola koro" li ofte ricevadas batojn de la germanoj.

„Fidu al mi, kara", li diris, mi kunlaboras kun sovetaj, polaj, francaj kaj eĉ germanaj grupoj, kiuj agas subtere. Ĉiu el ni havas specialan taskon. Nun ne estas tempo por klarigi, ĉar mi devas vin savi, sed fidu al via Johano, kiu preferas morti ol makuli siajn manojn. Mi estas antaŭ ĉio esperantisto!"

„Was ist los?" (4), kriegis SS-ano, alproksimiĝinte al ni.

Johano tenis min daŭre en siaj brakoj.

„Ŝi estas mia fratino, sinjoro Oberscharführer" (5), diris Johano.

„Mia tuta familio pereis en tiu ĉi kremaciejo. Nun mi preferas morti kune kun ŝi ol resti sola. Mi petas vin lasu ŝin viva. Ŝi estas sana kaj povas fari ankoraŭ utilan laboron. Se ne, ni iros kune en la gasĉambron."

Post pripenso la SS-ano konsentis, di-

rente, ke fine ni ambaŭ trovos tie ĉi eternan trankvilon.
„Tiamaniere mi estas inter vi, kara, sed kiom longe, mi ne scias. Nun mi kredas, ke oni povas en la lasta momento saviĝi. Ni ne perdu la esperon, kara."
Zofia travivis la militon.

„SAMIDEANO" HEINRICH

Mi atente serĉis kontakton kun esperantistoj, mian intereson vekis eksterlandanoj, ĉar kun ili estis malfacile interkompreniĝi.
La „kontakto" kun SS-ano venis en maniero tute neatendita. Unu fojon nia grupo estis devigata porti ŝtonojn. Mia amikino malsanis je tifo, kiel cetere la plejmulto dum la aŭtuno 1943. Pro malforto Maria kelkfoje falis teren.
„Maria, levu vin, ĉar la SS-ano venas. Vi ne rajtas kuŝi. Li mortpafos vin", mi petis malespere, levante ŝin de la argila tero.
„Amikino mia", ŝi murmuris, „lasu min. Mi ne plu povas labori tiel peze. Ho, kiel mi soifas, almenaŭ unu guton da akvo!"
Mi ŝteliris al proksima lageto, eble mi sukcesos preni iom da akvo. Maria povu almenaŭ malsekigi la lipojn. Sed malfeliĉe rimarkis min la gardisto. Li alkuris al mi, granda luphundo akompananta lin sin ĵetis al miaj ŝultroj kun laŭta bojado. Mi ŝtoniĝis pro timo, sed feliĉe la hundo ne mordis min. Tio estis malofta okazo, ĉar la ĉi tieaj hundoj estis speciale edukitaj je voko de gardistoj mordi sian viktimon.
„Du verfluchtes Schwein" (6), ekkriis la SS-ano. „Kiajn promenojn – vi arangas?"
„Mi intencis preni iom da akvo", mi respondis, „por mia amikino."
„Via amikino", li ripetis moke, „ŝi jam ne plu taŭgas por labori, do por vivi. Forprenu ŝin!" li diris ordone al sia helpanto.
„Ne!" mi krivokis, kovrante la amikinon per mia korpo.
Fortegaj batoj falis responde sur mian korpon.
„Ĉu vi tute ne havas kompaton al homo bezonanta helpon?"
Mia kuraĝo kostis al mi multon, ĉar la SS-ano ruĝiĝis je la vizaĝo pro kolero kaj denove min batis.
„Ne batu ŝin, mi petas vin, sinjoro. Kompaton!", petvokis Maria.
De malantaŭe proksimiĝis al ni germana oficiro. La soldato estis denove min batonta, sed vidante la oficiron, li salutis, tenante la manon ĉe sia kapo. Mia amikino dume leviĝis. Ĉiuj virinoj rapide daŭrigis sian laboron. Ni ĉiuj antaŭsentis ion malbonan. Mia situacio estis ne enviinda.
La oficiro demandis, kio okazis. Mi kuraĝis rigardi lin kaj . . ., sendube, tio estis Heinrich, esperantisto, mia longjara korespondanto, kun kiu mi post tri jara letera konateco renkontiĝis dum Universala Konreso. Malgraŭ la stranga situacio mi kuraĝiĝis:
„Saluton, sinjoro Heinrich!", mi diris.
La oficiro eksaltis kiel risorto. Lia miro estis granda. Antaŭ ĉio mia kuraĝo, due Esperanto, bone konata de li.
„Kiu vi estas?", li demandis mirigite.
„Mi estas Edwarda Kaminska. Tian vi iam konis, vian korespondantinon el Varsovio. Nun numero 55034, kiu signifas nenion. Mi certe ne plu similas al via antaŭa konatulino."
„Mi tute ne povas rekoni vin, se vi scias mian antaŭnomon, kaj parolas Esperante, mi kredas, ke vi iam konis min", li diris.
„Jes, mi tute ne similas al tiu ‚ĉarmulino'", kiel vi nomis min. Tio ja antaŭ nelonge okazis, kaj nun vi ne plu rekonas min?"
Heinrich rigardis min kaj lia vizaĝo ŝanĝiĝis. Fine li diris:
„La voĉo similas al tiu de Edwarda, sed mi tute ne povas kredi, ke tio estas vi. Ke oni povas tiel ŝanĝiĝi . . ."
„Via iam kara ‚Edwarka' nun taŭgas nur al gasĉambro, ĉu ne?", mi demandis lin. „Rigardu tiujn ĉi virinojn. Ili estas nun nenion taŭgaj, sed antaŭ nelonge ili estis plenvaloraj homoj. Ili plejparte estas edukitaj inoj, sed nun oni volas forpeli de ili ĉiun homan senton. Ni deziras nur manĝi kaj ne iri en fornegon. Bonvolu diri al mi, sinjoro, ĉu laŭ via opinio vi ĝuste agas?", mi danĝere diskutis kun li.
„Mi nur plenumas la ordonon de Führer", li respondis.
„Kiacele vi do estas esperantisto? Ĉu vi serĉas kontakton kun alilandanoj? Zamenhof kreis Esperanton celante al paca unuiĝo de la homaro. Nazifaŝistoj rompas la homan dignon."
„Ni devas discipline plenumi niajn taskojn, eĉ se ne ĉiuj ordonoj plaĉas al ni. Nun ja estas milito, soldato ne povas kontraŭstari."
La oficiro komencis jam malpacienciĝi.
„Feliĉe ne ĉiuj germanoj opinias la samon", mi diris. „Tion atestas la multaj malliberigitaj germanoj kun politikaj signoj sur la brako. Ili preferas vivaĉi en koncentrejoj ol partopreni en krimaj agoj. Eble mi tuj pereos de viaj manoj, per kiuj vi iam kore salutis min, sed sciu mian opinion."
„Edwarda", li diris konfuzita, „mi penos savi vin. Estu trankvila. En kiu barako vi nun estas?"
„Mi troviĝas en mortkoncentrejo, kaj mi ne atendas savon de malica homo. Se mi ne estus via konatulino mi eble ne vivus ĝis morgaŭ, ĉar mi intencis doni iom da akvo al mia malfeliĉa soifanta amikino."
Prenante ŝtonon en la manojn, mi daŭrigis kun miaj koleginoj nian vojon . . .
Post ĉiutaga nomvokado frumatene po kvin inoj ricevis duonan litron da io, kio gustis kiel medikamento, sed oni nomis ĝin „teo", kun malgranda peco da argilsimila pano. Tio estis ĉio ĝis la tagmanĝo. Post la kontrol-kolektiĝo ni estis pelataj sur iun kampon, kie herbo delonge ne kreskis. Somere senindulge la suno rostis la nudan argilan teron, kaj ni ege soifadis pro manko de akvo. Soifo, malsanoj kaj suferoj – ni pli similis bestojn ol homojn. Je la 14-a ni ricevis duonan litron da malgrasa supo, pri kiu oni povus kontentiĝi, se oni sukcesus trovi peceton da terpomo. Kuleron ni ne havis kaj la supo estis tiom aĉa, kaj nia naŭzo – tiom granda, ke la nura danĝero de morto pro malsato kapablis supervenki nian senton de abomeno. Post ioma tempo ankaŭ mi lernis avide engluti ĉion manĝeblan, kiel la aliaj. La vespera manĝo konsistis el eta peco da pano kaj kelkaj glutoj da abomena teo. Dufoje semajne ni ricevis kolbason de stranga gusto. Porkojn oni certe nek bredis, nek buĉis por ni.

EN LA FAŬKO DE LA MORTO

Plej terura travivaĵo estis en la unua tempo de mia restado en Oŝwiecim la tago, kiam oni aranĝis sortimentadon por la fornoj. Oni ekaŭdis fajfsignalon. La virinoj, kiuj jam longe vivis en la koncentrejo, ekkondutis strange, aperis sovaĝa timo en iliaj okuloj – timo, kiun baldaŭ ankaŭ mi eksentis. Ĉiuj tiuj komencis ŝminki siajn vangojn kaj lipojn. Unuamomente mi pensis, ke ili freneziĝis, sed temis nur pri beligo de la aĉe aspektantaj korpoj por havi etan ŝancon trovi indulgon kaj savon antaŭ la ekzamenaj rigardoj de la ekzekutistoj. Tute senvestitaj, ni devis vicmarŝi preter la kontrolantoj. SS-ano Taube kaj ties kunulino Drexler, – pri kiu oni diradis, ke ŝi estas eĉ pli malica ol li.
„Ni estas tute sanaj", kriis la kompatindulinoj, kiuj devis paŝi flanken. „Ni volas vivi!"
Ili laŭte kriis kaj ploris senespere, kaj brutaj bastonoj traktis iliajn nudajn korpojn . . .
Mi memoras epizodon: 15-jara knabino, vidinte, ke oni sortimentis ŝian patrinon por la gasĉambro, alkuris al ŝi kaj ĉirkaŭbrakante diris kvietige:
„Panjo, ne timu, mi sekvos vin. Ni mortos kune. Oni ne povas vivi eterne. Iam oni ja devas morti."
Raportführer Taube volis retiri la knabinon, la patrino petis, ke ŝi reiru, sed la filino nun eĉ pli kroĉiĝis al ŝi, sekvante la ceterajn al la mortbarako.
Pri unu afero mi miris: kial la SS-anoj retenis plurmil homojn kondamnitajn al gasmorto en la 25-1 barako, anstataŭ tuj forbruligi ilin. Verŝajne estis speciala plezuro por tiuj sadistoj teni la kompatindajn inojn dum certa

tempo por vidi, kiel ili kondutos, atendante la baldaŭan morton. La sortimentitaj al morto ne plu vizitis necesejon, sed faris sian neceson, tie kie ili staris kaj kuŝis. Apatiaj kaj rezignaciaj, ili eĉ rifuzis la manĝaĵon, sed trinki ili volis. Korŝire ili kripetis pri akvo tra la fenestro, sed neniu ilin povis helpi.

En novembro 1943, anstataŭ ĝojiga fino de la milito, komenciĝis teruraj epidemioj. En ĉiu barako estis ĉirkaŭ 70 % da malsanulinoj en diversaj lingvoj petantaj pri iom da akvo. Kiam oni je la kvara frumatene elpelis ĉiujn for de la barakoj, virinoj svenadis pro malforto. La barakestrinoj kaj iliaj helpantinoj, t. n. „Stubendienst" – (ĉambroservo), alpaŝadis de unu malsanulino al alia kaj tiom longe batis (ĉiam sur la kapon), ĝis kiam la malfeliĉulinoj teren falis.

Ekmalsanis ankaŭ mi je tifo, sed malgraŭ la febro, ni ĉiuj devis porti pezajn ŝtonojn sur longa vojo. Estis vera krucvojo plena de sango kaj larmoj por multaj, kiuj falis por neniam leviĝi. Nia plej granda danĝero estis la rezignacio. Ankaŭ mi subiĝis al la danĝero rezignacii, sed venkis mia volo al vivo. Tiam mi ofte iris al la ambulanco, petante, ke oni enprenu min en la malsanulejon. Fine mi sukcesis, dank' al de mi konata kuracistino d-ro Konieczna. Jam miaj fortoj estis elĉerpitaj pro la febro, kaj mi estis mortlaca. Oni metis min en liton kune kun tri aliaj malsanulinoj. Sen ĉemizo, sen littuko, sen kuseno mi kuŝis sur pajlosako sen ia ajn prizorgo, helpo kaj medikamentoj. Aroj da grandaj pedikoj pikis mian mizeran korpon.

Kuŝante tie dum longaj monatoj, mi havis la eblon observi la ĉiutagan vivon en la malsanuleja barako. Ĉiuvespere komenciĝis vigla movado. Kutime la germanoj vespere ne vizitis la barakojn, ĉar tiam venis ofte novaj transportoj, kiujn ili plejparte sendis rekte en la gasĉambron. Ili do havis multe da „laboro". La gardistinoj profitis la okazon por kuiri al si vespermanĝon je ega envio de la malsanulinoj, kiuj penis almenaŭ akiri ŝtele iom da akvo. Kiam la gardistinoj satmanĝis, oni estingis la lumon. De ĉiuj flankoj aŭdiĝis plendoj. Juna ĉeĥoslovakino kiu baldaŭ poste venenis sin per luminalo, senĉese ripetis la vortojn de la kuracistino, ke se ŝi uzus iom pli da polvo, ŝi ne plu vekiĝus. Mia najbarino, tro malforta por peti pri nokta vazo, frapis per la manoj, same kiel oni aplaŭdas en teatro...

La nokto longiĝas senfine. Ies monotonaj paŝoj tedis ege: patrino de ĝemeloj iras tien kaj reen portante en la brakoj unu el la infanoj, kiuj jam agoniis. La pasintan semajnon mortis la knabineto, nun fino de la esperoj. Ĉe urinsiteloj kelkaj malsanulinoj ŝmiris siajn mizerajn korpojn per urino uzata, kiel medikamento kontraŭ skabio, kiu lastatempe terure disvastiĝis. Operacio ege doloriga, estas do aŭdataj plendoj pri la senkompata sorto. De ekstere aŭdiĝis krioj kaj plendoj, pafado... Jen komenciĝis la nokta „danco" kun hebreaj transportoj. Nia barako estis lumigata kiel dumtage. Ni jam parkere sciis pri la procedo de la noktaj transportoj. „Sonderkommando" krivokante envicigis la alveturantojn, kaj multaj el ili eksentis baldaŭ sur siaj brakoj la batojn de bastonoj. La viktimoj devige senvestiĝis, ĵetante la vestojn amase, ĉar la SS-anoj indulgis la vestojn... La homojn ili ne domaĝis, sed la vestojn ili zorge gardis.

SORTIMENTADO

Ĉiutage, kiam ni vekiĝis matene, la unua turmenta demando estis, ĉu „tio" okazos hodiaŭ. Povas esti, ke la ekzekutistoj venos ĉiumomente, kaj ni ekaŭdos la severan voĉon de la barakestrino, ke la hebreinoj ellitiĝu. Samtempe ni havis la esperplenan iluzion, ke eble tamen ili ne venos kaj ne okazos sortimentado. Tiamaniere ni estus gajnintaj unu tagon. Bedaŭrinde, la malfeliĉo, kiun ni antaŭsentis ekde kelkaj tagoj, venis. En la koncentrejo oni ne povis esti certa pri la vivo.

Jen subite, kiel fulmotondro ni ekaŭdis la teruran verdikton: „Komisiono venas, ordo en la barako!"

En niajn korojn enŝteliĝis terura malcerteco. Ni ja spertis multfoje, kion signifis similaj vizitoj. Streĉe atendante, ni parolis pri diversaj indiferentaj aferoj, sed samtempe cerbumo turmentis: „Komisiono. Kion ĝi signifas – bonon aŭ malbonon? Eble fine venis la feliĉa horo de la libereco?" Nia granda deziro estis, ke prizorgu nin la Ruĝa Kruco. Oni diris eĉ hieraŭ, ke ĝi ĵus prenis la protekton super ni. Eble la komisiono rilatis kun ĝi?

Subite elektris nin sciigo, ke la komisiono venis en nian direkton. Jen...

Dek belaj altkreskaj viroj en SS-uniformoj haltis ĉe la pordo. Dum morta silento ambaŭflanke de la barako rigardis al la trietaĝaj „litoj" palaj mizeraj vizaĝoj. La spiro haltis en niaj brustoj. Post kelkaj minutoj ili foriris. Ni respiris pli facile, sed bedaŭrinde, mallonge daŭris nia ĝojo. Post momento unu el ili revenis, ion ordoninte. Nia iluzio malaperis. Tio tute ne estis simpla vizito, sed tamen – sortimentado! Kiel konfirmon ni ekaŭdis la vokon.

„Ĉiuj hebreinoj malsupren!"

„Okazos sortimentado", plendis juna knabino. „Mi havas tiom da skabioj sur la tuta korpo. Jam fino!"

Skabio kaj malsanulejo – jen du hitleristaj insidoj, kiuj senĉese minacis al ni. Troviĝinte en malsanulejo, malfacile estis ĝin forlasi, ĉar oni tuj infektiĝis je diversaj malsanoj, antaŭ ĉio je skabio, kun kiu estis nur unu vojo – en la kremaciejon!

Post kelkaj minutoj revenis SS-anoj kun dikaj bastonoj, inter ili troviĝis kompreneble la murdisto Rapportführer Taube. Lia specialaĵo estis mortigado de infanoj kaj virinoj. Komenciĝis preciza kontrolado. Oni pelis nin ĉiujn kiel brutaron en unu lokon. Fariĝis terura paniko... Iu, kiu volis imagi la konduton de la „sinjora popolo" kaj la malesperan reagon de la malfeliĉaj inoj, tiu rememorigu al si ĉasadon kontraŭ hundoj, en kies okuloj estas freneza timo kaj kies plenda bojado longe sonas en la oreloj. La virinoj tuj komencis pinĉi siajn vangojn kaj pentri sin. Kelkaj uzis eĉ pudron por kaŝi la postsignojn de la skabio.

Nudaj korpoj, amasiĝintaj en unu loko, marŝis antaŭ la komisiono kaj multaj viktimoj havis bluan strion sur la ŝultroj de SS-ana bastono. En tiu tago mi havis malbonajn antaŭsentojn. Mi intuicie sentis, ke minacis al mi granda danĝero. Por savi min, mi komencis serĉi kaŝejon. Dum kelka tempo mi intermiksis min inter la laborantaj virinoj, sed la ege malgrasaj kaj palaj piedoj povis atentigi la persekutantajn – des pli, ke mia robo pendis sur mi, kiel sako...

Revenis la sinjoroj de nia vivo kaj morto. Ni orientiĝis, ke hodiaŭ la rikolto estos abunda, ĉar inter ili troviĝis la konata d-ro Mengele kiu speciale elektadis junajn kaj sanajn knabinojn por neniigi ilin. D-ro Mengele estis bonhumora kaj muzikema viro. Ĉiam dum sortimentado li kantis arion de iu opero, movante la fingron en la takto de la muziko. Tiu ĉi kruela viro, kies konscienco estas ŝarĝita je miloj da senkulpaj homoj, vivas nun trankvile, kaŝata de siaj amikoj. Ĉu la justeco atingos lin?

Nudaj personoj kun numeroj surbrake silente traŝovis sin, kaj en la okuloj speguliĝis freneza timo. Se niaj okuloj scipovus krii, eble la homoj vivantaj en libereco ekaŭdus nian savpeton kaj per la kontraŭago metus finon al la senĉesaj murdoj.

Ankaŭ mia numero estis notita... Fino. Mi devas morti, nenia savo ekzistas. La sortimentado finiĝis. Mi estis la lasta viktimo. Kondamnitaj estis kelkcent, feliĉe savitaj restis nur kelkaj personoj. De la tuta regiono dekmil malsanaj inoj devus esti gazumataj. La SS-viroj finis la laboron kaj foriris.

Nun la kompatindaj virinoj ekkonsciiĝis pri la situacio. De ĉiu flanko oni aŭdis senesperajn vokojn al helpo, kompato kaj savo. Nenio tamen plu povis savi nin.

Mi sentis min strange. Ŝajnis al mi, ke ne temas pri mia persono. Mi nerve komencis konsideri, kian savon trovi. Mi ja devas vivi! Ĉis nun mi ankoraŭ ne povis kompreni, kial ĝuste mi devas vivi kaj ne la junaj, resaniĝintaj knabinoj. Eble pro tio nun mi starigis al mi la taskon helpi al la malmultaj savitoj, rakonti pri la kruelaj hitleristaj krimoj, okazintaj en germanaj koncentrejoj. Skribante nun tiujn ĉi vortojn, mi ne povas trovi trankvilon, persekutas min senĉese stranga sento. Tra la ridoj de la min ĉirkaŭantaj homoj, mi kvazaŭ aŭdas ofte la frenezajn kriojn de infanoj, gejunuloj kaj senkulpaj virinoj vokantaj helpon kaj savon. Mi aŭdas la bruon de la ŝarĝaŭtomobiloj, per kiuj la krimuloj intense superbruis la senesperan helpovokadon de la viktimoj, baraktantaj kontraŭ la morto.

Kiam mi tute elĉerpita kuŝis sur la lito, miaj najbarinoj, plejparte junaj knabinoj, invitis min je lasta antaŭmorta festeno. Oni kunmetis siajn mizerajn ŝparojn. Mirinda estis la escepta harmonio, kiu regis tiun ĉi nokton inter judinoj. Kutime pro la tragika situacio kaj ĝeneralaj persekutoj ekregis reciproka malŝato, unu evitis la alian. La ega bedaŭro, ke oni devas tiel nehome suferi, rezultigis, ke ni ĉesis kredi je la valoro de nia popolo. Kio vi estas? Nenio – estaĵo, kiu devas perei desur la supraĵo de la tero. Pro tia reciproka malinklino la kunvivado ne estis agrabla. Dum tiu ĉi lasta nokto la komuna malfeliĉo unuigis nin. Ni intencis teni nin kune; tiel estos pli facile morti.

La lasta nokto ege longiĝis. Ni tute ne povis dormi. De ĉiuj flankoj aŭdiĝis ploroj kaj plendoj. El la malsupra lito itala judino, kiu estis jam preskaŭ sana, bojis kiel hundo:

„Mi ne volas morti, u-u!"

Plej trankvilaj estis la junaj knabinoj. Ili ne plendis laŭte. Ilia malespero estis silenta.

„Domaĝas morti. La mondo estas tiel bela, kaj ni tre malmulte ĝuis la vivon, sed kion fari, ne eblas saviĝi.

Mezaĝa virino furioze kriegis:

„Kial mi mortu? Kion mi kulpas? Mi estas tute sana. Banditoj, murdistoj! Dio, kie vi estas, vi tute ne ekzistas, alie vi helpus al ni senkulpaj."

Kiam oni registris mian numeron por gasumigo, mi tuj sciigis pri la fakto al d-ro Konieczna, kiu certigis min, ke ŝi faros sian eblon, sed la sukceso ne estas certa. Post turmenta medito mi decidis: se ne eblos saviĝi, mi pendigos min en la lasta momento. Ili ne havos min viva, por ke mi mortu kiel besto.

Frumatene alvenis ŝarĝaŭtomobiloj. Venis komandanto Hess, Taube, d-ro Mengele. Komenciĝis, kiel kutime, la ŝarĝado sur aŭtomobilojn. Pli malsanajn oni tutsimple ĵetis kiel ŝtonojn internen. La ceteraj kuŝis en morta timo. La teruron pliigis la akra voĉo de la blokestrino. La SS-anoj havis multe da laboro. Kelkaj viktimoj provis kontraŭstari. Tiam estis uzataj dikaj bastonoj kaj brile puraj germanaj botoj...

Mi streĉe atendis la elvokon de mia nomo, sed okazis vera miraklo – la pola kuracistino sukcesis savi min el la faŭko de la morto. Kuŝante poste en la preskaŭ malplena barako, mi sentis konsciencriproĉojn, ĉar mi rajtis vivi, dume aliaj pli junaj inoj, kiuj malmulte ĝuis la vivon, devis morti en la gaskamero.

VENAS TRANSPORTOJ

Majon 1944 senĉese alvenis vagonaroj longaj – transportoj el Hungario. Centmiloj da viroj, virinoj kaj infanoj, freŝaj, sanaj kaj tute nesciaj pri sia tujsekva sorto. Plej terure estis, ke la alvenintoj, vidante la judojn servantaj ilin, ege ekĝojis kaj turnis sin al ili pri diversaj aferoj, kiuj, kompare kun la minacanta danĝero, estis malgravaj. Multaj el ili baldaŭ eksentis sur siaj ŝultroj, batojn. Dum kelkaj tagoj venadis transportoj el Budapeŝto. Alvenis la tuta inteligentularo. La viroj malpacienciĝis, ke ili tro longe staris ĉe la stacio ne elvagoniĝante. La demandataj judoj de „Sonderkommando" rigardis sin reciproke. Fine iu el ili diris:

„Ne rapidu. Tien ĉi ĉiam tro frue iros."

„Kion vi volas diri per tio?", demandis per timplena voĉo juna knabino.

„Mi volas diri, ke vi venis al terura koncentrejo", oni respondis al la alvenintoj.

„Elvagoniĝu!", aŭdiĝis krioj.

„Forlasu la vagonojn!"

La homoj forlasis la trajnon – iuj trankvile, aliaj furioze kaptis siajn pakaĵojn, por ke, Dio gardu, al ili nenio perdiĝu. Du personoj eĉ kverelis pri valizo. Unu el la „Sonderkommando" eltiris la valizon el la manoj de kverelantoj kaj diris per sufokita voĉo:

„Idiotoj! Stultuloj! Zorgu pri via vivo kaj pri la vivo de viaj proksimuloj! Mi garantias al vi, ke la valizo certe vin transvivos!"

„Los, los, weiter, schneller!" (Ek, ek, iru pluen, pli rapide!) – la ŝajne trankvilaj fidindaj judoj komencis svingi per bastonoj antaŭ la vizaĝoj de la malfeliĉuloj.

La infanojn oni ĵetis vivantajn aparte en fosegojn, kiuj senhalte brulis en la malproksima arbaro kaj dume iliaj gepatroj gasumiĝis kaj brulis en kvin fornoj. Ni volus krii: „Homoj, kriu, savu vin! Nenion vi havas por perdi, sed vi povas gajni la vivon! Vidu tiujn ĉi fornojn, kiuj nun brulas, elpuŝante el si nigrajn fumvolvaĵojn kovrantajn la ĉielon: la odoro de rostita homa karno estas odoro de viaj antaŭintoj, kiujn oni nun bruligas. Ili eble estas viaj amikoj kaj parencoj!"

La transporto enviciĝis duope. La homoj ĉesis protesti pro la perdo de sia havaĵo. En la fino de la vico juna virino ŝarĝita per pakaĵoj ordonis al sia filineto teni sin ĉe la patrina robo. La infano trotetis maltrankvile apud la patrino. Ho, kial la patrino ne ĵetas al ĉiuj diabloj la pakaĵon kaj nealpremas al si la infanon, ne kisas ĝin la lastan fojon? Post momento la murdistoj forrabos ĝin, antaŭ ol ŝi orientiĝos. Estos jam malfrue. Oni bruligos ĝin vivan, same kiel la aliajn infanojn.

En sia naiveco la malliberigitoj kunportis kun si litaĵon, kusenojn, kovrilojn, konservaĵojn, viandon, konfitaĵojn, bakaĵojn, kaj grason. Ĉirkaŭe staris infanveturiloj, sur kies litaĵo estis ankoraŭ premsignoj de la ĵus kuŝintaj infanaj korpetoj.

Post kelkaj horoj ĉio estis ordigita, kaj kiam la „Sonderkommando" finis sian laboron, estis jam neniu viva estaĵo, krom eta grupo da ĝemeloj. La ĝemeloj estis „indulgitaj", ĉar ilin bezonis la fama murdisto d-ro Mengele por siaj eksperimentoj. Konsternitaj, la geknaboj demandis, ĉu estas alia elirejo, ĉar kvankam ili jam staras longan tempon tie, oni ne rimarkis iun ajn forlasi la enirejon. Similaj demandoj estas kutime ignorataj – kion oni povas respondi? Nur montri la fumantajn kamentubojn... Por ni atestantoj de tiu ĉiutaga teruraĵo estis malfacile elteni. Pro malespero ni nur mordis niajn fingrojn. Ni timis freneziĝi, la nervoj ne plu eltenis.

Oktobron 1944 oni transportis min al la Koncentrejo Ravensbrück. Ekestis tempo de novaj suferoj. Hodiaŭ mi miras, ke homo eĉ povas elteni tiom multe.

Je la tria horo nokte – meze en la malvarmega vintro – ni devis kolektiĝi por nomvokado kaj kalkulado. Mizere vestitaj, sen ŝtrumpoj, ni staris dum horoj dekope. Frostegis al ni. Multaj malsanis. Jen tiu kaj alia falis teren, mortis. Neniu bedaŭris, neniu ploris – tiel ni jam kutimis vidi kadavrojn ĉirkaŭe. Regis terura malsatego. Manĝi kaj vivnutri nin per terpomŝeloj ni jam delonge alkutimiĝis. Ni ankaŭ lernis serĉi nutraĵon en la rubejo. Ni estis tiom malfortaj, ke ni apenaŭ povis movi nin. La okuloj brulis febre en la kavoj. Ni estis komplete apatiaj koncerne vivon kaj morton. Ni eĉ ĉesis batali por la manĝo kaj vegetis en ia ajn espero.

LA SAVINTO

Por ni jam estis tute klare, ke la germanoj perdas la militon. Niaj gardistoj

de tago al tago iĝis pli maltrankvilaj. La Ruĝa Armeo, atendata kun sopiro, rapide alproksimiĝis en nia direkto. Estis aŭdataj eksplodoj, kanonoj tondris. Preskaŭ ĉiunokte traflugis eskadroj de bombaviadiloj, kiuj zumis kiel muŝoj. Por ni tiu ĉi zumado sonis kiel plej bela muziko. Tiu mistera sono de niaj bonvenaj gastoj dum la silenta nokto ege timigis niajn gardistojn, je nia plezuro. Kiam ni estis laborintaj dum nokta ŝanĝo, ni senpacience atendadis la vizitontajn aviadilojn. Ni neniam timis. Niaj amikoj ja sciis, ke en Ravensbrück troviĝas germana koncentrejo. Cetere nia vivo havis malgrandan valoron – ĉiumomente ni povis esti murditaj de hitleraj manaĉoj. Oni diris ke la germanoj en lasta momento neniigos la koncentrejon – signon de ilia krima agado dum la milito...

Unu el miaj amikinoj proponis al mi gvidi grupeton da virinoj, kiuj estas pretaj fuĝi en direkto de la Ruĝa Armeo. Mi volonte konsentis. Ni decidis profiti ĉiun okazon por savi nin. Tiu okazo baldaŭ venis tute neatendite. Iun tagon venis blankaj aŭtomobiloj de la Sveda Ruĝa Kruco por venigi al sia lando francajn inojn. En la koncentrejo jam regis kaoso. Ni do profitis la okazon kaj anoncis nin kiel polajn francinojn. Oni akceptis nin, kaj ni, kiuj tute ne sciis la francan lingvon, triumfe marŝis kun la veraj francinoj al la libereco. Post maltrankvila kaj duboplena nokto ni fine transiris la pordegon de la koncentrejo, kaj per blankaj aŭtomobiloj ni veturis tra Germanio kaj Danio al Svedio. Mi devas aldoni, ke kune kun ni 200 polinoj sukcesis veni. Al ili ni tuj aliĝis ĉar ni preferis esti kun niaj samlandaninoj. En la lasta momento la komandanto permesis eldoni la plej malsanajn polinojn. Multaj survoje mortis.

En Svedio mi baldaŭ sukcesis kontaktiĝi kun esperantistoj dank' al k-do Anders Roos, kiu anoncis en la rifuĝejo, ke li serĉas esperantistinojn. Mi kompreneble tuj anoncis min kaj ekde tiu tempo la karaj sinceraj novakiritaj geamikoj anstataŭis al mi mian familion, pri kiu mi nenion sciis. La svedaj esperantistoj multe helpis al mi. Antaŭ ĉio kaj plej grava estis la denove akirita kredo je la homaro.

Mi traveturis preskaŭ la tutan landon, kie mi prelegis en diversaj organizaĵoj pri niaj travivaĵoj en hitleraj koncentrejoj. Aŭskultis esperantistoj kaj neesperantistoj. La salonegoj estis plenplenaj, multaj gazetoj skribis raportojn pri la prelegoj. La tempon, kiun mi pasigis en la amikeca kaj helpema rondo de la svedaj esperantistoj, mi profunde gardos en mia koro!

Reviviginte mian memoron al la malfeliĉa tempo, kiun mi devige pasigis en la teruraj koncentrejoj de Oŝwiecim kaj Ravensbrück, mi kun dankemo pensas pri la savinto, la potenca Ruĝa Armeo, kiu alportis al ni ĉiuj liberecon, oferante malavare sian sangon sur la batalkampo. Kun ĝi nia pola kaj ĉiuj frataj armeoj iris brako ĉe brako ĝis la venka fino!

Notoj:

[1]) SS-anoj – membroj de la Schutzstaffel – politaĉmentoj konsistantaj el membroj de la hitleris ta partio.

[2]) Gestapo – sekreta politika polico.

[3]) „Sonder-Kommando" – speciala grupo, konsistanta el junaj judoj kaj okupata por gasumi kaj bruligi siajn samnacianojn.

[4]) „Was ist los?" – Kio okazas?

[5]) Oberscharführer – ĉefgrupestro.

[6]) „Du verfluchtes Schwein" – Malbenita porko.

(Represo de speciala eldonajo de „Internaciisto", Vieno, n-ro 25)

Lunaĉarski-Muzeo dankas kaj invitas

En la jaro 1975-a la soveta lando kaj kun ĝi la tuta progresema homaro festis gravan datrevenon – 100 jaroj de naskiĝtago de Anatoli Lunaĉarski, unua Popola komisaro por klereco de la juna Soveta Respubliko, naskita en oktobro 1917, eminenta literatoro, publicisto, senlaca batalanto por la mondpaco. Okaze de tiu ĉi datreveno en la numero de „Paco", kiu aperis en Germana Demokratia Respubliko, estis publikita la skizo pri la vivo kaj agado de glora filo de Komunista Partio Lunaĉarski kaj pri la memora muzeo, kiu ekzistas en Moskvo. Samtempe en numeroj de „der esperantist" estis publikitaj eldiroj de A. Lunaĉarski pri Esperanto.

Antaŭnelonge la skribanto de tiuj ĉi linioj denove vizitis la memoran Muzeon de A. Lunaĉarski kaj transdonis al la Muzeo numerojn de „Paco" kaj „der esperantist" kaj krom tio fotokopiojn de paĝoj el la revuo „Arbeiter-Esperantist", kiujn faris por ni la veterano de germana esperantista movado k-do Helmut Fuchs. Sur tiuj paĝoj estas publikigitaj la saluto de A. Lunaĉarski al la tutmonda kongreso de proletaj esperantistoj 1926 en Leningrado kaj eldiroj de eminentaj agantoj de la komunisma movado pri Esperanto. Akceptinte tiujn ĉi materialojn, la estrino de la Muzeo, Elena Dunajeva, diris:

Ni petas transdoni per „der esperantist" kaj „Paco" nian dankon al Laborrondo de Esperanto en Kulturligo de GDR kaj al la esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko pro la atento al la hela memoro pri A. Lunaĉarski, pro la publikigado de materialoj pri li. Povas esti, ke tiuj ĉi materialoj konsistigos fundamenton de nova sekcio en la scienca biblioteko de nia Muzeo, kiu portos la titolon „A. Lunaĉarski kaj la internacia lingvo Esperanto". Povas esti ankaŭ, ke iuj el tiuj ĉi materialoj eniros en la novan estontan ekspozicion de la Muzeo.

Nuntempe nia memora muzeo de A. Lunaĉarski estas fermita – daŭrigas laboro pro restaŭro kaj organizo de nova ekspozicio, kiu pli larĝe ol la estinta ekspozicio, reprezentos la etapojn de la granda vivo kaj partia, ŝtata, diplomata kaj literatura agadoj de A. Lunaĉarski.

En la sekvonta jaro nia Muzeo denove malfermos sian pordon por la vizitantoj. Ni estus tre ĝojaj, se esperantistoj de Germana Demokratia Respubliko, kiuj vizitos Moskvon, vizitus ankaŭ la Muzeon de A. Lunaĉarski, kiun la esperantistoj rajte rigardas kiel sian bonan amikon.

G. Korotkeviĉ, Moskvo

Intervjuo kun
ROMESH CHANDRA

Dum la tempo de 10.–12. 9. 1977 en Berlin (GDR) okazis grava konferenco de la Buroo de la Monda Packonsilantaro. D-ro Detlev Blanke, membro de la Internacia Komitato de MEM kaj sekretario de la MEM-Komitato de GDR, partoprenis kiel gasto kaj havis la eblecon intervjui la prezidanton de la Monda Packonsilantaro, s-ron Romesh Chandra.

Jen la intervjuo.

Demando: La Monda Pacmovado kaj la Monda Packonsilantaro pli kaj pli gajnas internacian signifon kaj politikan pezon en la batalo por paco kaj sekureco. Kio karakterizas ilian nuntempan evoluon?

R. Chandra: Mi opinias, ke post la Monda Asembleo de la Packonstruantoj en Varsovio la Monda Packonsilantaro atingis novan etapon. La tuta Asembleo montris, ke la Monda Pacmovado nuntempe okupiĝas tutlarĝe pri la homaj pacinteresoj. Mi hodiaŭ povas diri, ke la Monda Packonsilantaro aktuale okupiĝas pri ĉiu demando, pri kiu okupiĝas la Unuiĝintaj Nacioj, kaj, mi ŝatus diri, eĉ pli la Monda Packonsilantaro traktas ĉiun problemon, kiu rekte rilatas ĉiun viron aŭ virinon ĉie sur la mondo. Nia ĉefa celo estas krei amasan movadon, kiu faras la malstreĉiĝo-proceson nenuligebla kaj blokas la klopodojn de tiuj fortoj, kiuj, strebante al obstaklado de la malstreĉiĝo, volas reveni al la malvarma milito. Antaŭ ĉio necesas amasa movado por la ĉesigo de la vetarmado. Plej lastatempe la kampanjo kontraŭ la neŭtrona bombo atingis grandan amplekson, kompare al aliaj agadoj rilate al unuopaj aspektoj de la vetarmado. Kaj tiu kampanjo ekkaptis kaj estonte ekkaptos ĉiam pli da homoj por solvi la kerntaskon, fari la malstreĉiĝon universala proceso.

Demando: Kiuj ĉefaj taskoj staras antaŭ la Monda Packonsilantaro por la sekvonta tempo?

R. Chandra: La Monda Packonsilantaro fiksis en sia programo vicon da taskoj okupiĝantaj ĉefrange pri la vetarmado. Sed ankaŭ temas pri tiaj problemoj kiel evoluado kaj sendependeco, batalo por la homaj rajtoj, la rajto de ĉiuj popoloj batali por la ĉesigo de la koloniismo – kiel en Afriko –, la batalo por la forigo de la fokusoj de militdanĝeroj, plue grandaj solidaraj agadoj por Ĉilio, Urugvajo, Brazilio, Paragvajo kaj aliaj landoj, por la viktimoj de la faŝismo kaj neofaŝismo. Mi kredas, ke



Foto: Zentralbild

ni prave povas diri, la Monda Packonsilantaro estas nuntempe la plej granda internacia solidareca movado.

Demando: Kiujn eblecojn vi vidos, ankoraŭ pli forte utiligi la multajn internaciajn rilatojn kaj kapablojn de la esperantista pacmovado por la mondvasta batalo por paco, sekureco kaj malstreĉigo?

R. Chandra: Mi kredas, ke la esperantista pacmovado jam ludas tre gravan rolon kunigante ĉiujn kiuj sin engaĝas por paco kaj por Esperanto.
Tio estas iel tute natura. Ekzistas la neceso reciproke interkompreniĝi. Kaj, se vi pro tio diras „Esperanto por la paco", ni kredas, ke vi mencias du vortojn, kiuj konsiderinde signifas la saman.

Demando: en 1973 vi subskribis en la nomo de la Monda Packonsilantaro en Moskvo deklaron pri kunlaboro kun la Mondpaca Esperantista Movado (MEM). Kiel vi prijuĝas la ĝisnunan kunagadon de MEM ĉe la realigado de la taskoj de la Monda Packonsilantaro?
Kiujn eblecojn vi vidas por plua pliprofundigo de la kunlaborado inter ambaŭ organizajoj, en la intereso de mondvasta pacbatalo?

R. Chandra: Mi estas tre fiera, ke ni povis subskribi la komunan interkonsenton kun MEM kaj mi kredas, ke ni povis realigi ĝin dum la jaroj en la spirito de vera kunlaboro. Ni ĝojas pri la partopreno de reprezentantoj de MEM en la laboro de la Monda Packonsilantaro, ĉe ĉiuj aktivecoj sur ĉiuj interesataj kampoj. Kaj ni aŭdis ĝoje pri MEM-aktivecoj, kiuj plifortigas nin kaj utilas al ni. Mi kredas, ke en la nuntempa situacio devas kunveni kaj intime kunlabori ĉiuj neregistaraj organizaĵoj laborantaj por la paco. Kaj mi persone esperas, ke ni tre baldaŭ havos eblecon por plia duflanka renkontiĝo kun la gvidantaro de MEM, por pritrakti komune la ambaŭflankan laboron, laboro por kiu mi deziras ĉion bonan.

Intervjuis d-ro Detlev Blanke, Berlin

Ni konsilas se eble larĝan represon de la intervjuo.
Estas necese sendi 2 ekzemplerojn de la publikita intervjuo al Monda Packonsilantaro
s-ro Romesh Chandra, prezidanto
s-ro Fritz Rathig, sekretario
Informationszentrum d. WFR, Helsinki,
PO Box 18114, Finnlando.
La interparolo kun s-ro Chandra kaj kun aliaj reprezentantoj de la MPK klare montris grandan simpation por nia MEM-agado. Oni volonte ricevos diverslingvajn deklarojn kontraŭ la neŭtrona bombo kaj pri aliaj aktualaj problemoj, pri kiuj okupiĝas MPK. Kompreneble estus utile, aldoni por MPK tradukon en iu el la lingvoj franca, germana, angla. Ekzistas eblecoj, ke la „Kuriero de la paco", eldonata de MPK en kelkaj lingvoj represos informojn pri la konkretaj porpacaj aktivecoj de MEM. Ankaŭ fotoj estas bonvenaj.
La anglalingva originala sonbendo troviĝas ĉe la intervjuinto.

80 JAROJ BERTOLT

La 10-an de februaro 1978 la mondkonata dramisto Bertolt Brecht estus fariĝinta 80-jara.
La dramisto kaj literatoro apartenas sendube al la plej influaj granduloj de la moderna mondliteraturo. En GDR entute okazis lige al la jubileo pli ol 90 artaj aŭ sciencaj aranĝoj pri Brecht kaj lia verko kun partoprenantoj el 42 landoj. Sendube la Esperanta eldono de la „Trigroŝa Romano" de Edition Leipzig (koopere kun Bleicher-Verlag, FRG), en la traduko de d-ro Karl Schulze, estas bonvena kaj digna omaĝo al la Brecht-jaro.

BERTOLT BRECHT

Kanto pri la necerteco de la homaj cirkonstancoj

(Unua trigroŝa finalo)

Polly:

Ĉu tro altas la dezir'
foje en la vivo-tristo
ne nur esti amstatisto,
sed fordoni sin al vir'?

Peachum (kun biblio en la manoj):

De l'homo rajto estas ja surtere
feliĉa esti en la kurta viv',
de l'mond' plezuros partopreni vere,
ŝirmite al malsato kaj soif'.
Jen ja la nuda homa rajt' surtere.
Sed bedaŭrinde mi neniam aŭdis,
ke tiu rajt' ekzistas en real'.
Nu, kiu ne realan rajton laŭdus,
sed cirkonstancoj spitas al ideal'.

Sinjorino Peachum:

Tre mi ŝatus vin dorloti,
ŝatus doni al vi ĉion,
vere homan idilion,
jen ja celo por klopodi.

Peachum:

Se ĉiuj bonus, regus Lia nom',
volonte donus ĉion la riĉul'.
Se ĉiuj bonus, regus Lia nom'.
pri Lia lumo ĝojus la okul'.
Ja ĉiu ŝatus esti bona hom'.
Sed bedaŭrinde sur ĉi tiu stelo
la homo, povra, vivas en brutal'.
Ja ĉiu ŝatus vivon de anĝelo,
sed cirkonstancoj spitas al ideal'.

Polly kaj sinjorino Peachum:

Li bedaŭrinde pri ĝi pravas.
La mond' mizeras, homo mavas.

Peachum:

Mi kompreneble pri ĝi pravas.
La mond' mizeras, homo mavas.
Surteran paradizon volas ĉiu.
Sed cirkonstancoj estas kontraŭ tiu,
permesi ĝin ili ne pretas.
La frato, ja al vi amanto,
se ne sufiĉas la viando,
sur vian kapon tuj li tretas.
Al fideleco ĉiu pretas.
Ja la edzino vin tre amas,
sed se en am' vi iel lamas,
sur vian kapon tuj ŝi tretas.
Kaj al dankemo ĉiu pretas.
Sed se vi ĉe l'infano plendas,
ke l'porvivaĵ' plibonigendas,
sur vian kapon tuj ĝi tretas.
Jes homaj esti ĉiuj pretas.

Polly kaj sinjorino Peachum:

Ja estas tre domaĝe
kaj tre malavantaĝe.
La mond' mizeras, homo mavas,
Li bedaŭrinde pri ĝi pravas.

Peachum:

Mi bedaŭrinde tute pravas.
La mond' mizeras, homo mavas.
Preferus ni ja bonon al brutal',
sed cirkonstancoj spitas al ideal'.

Ĉiuj tri:

Jen kial ne prosperas ni
kaj ĉio restas utopi'.

Peachum:

La mond' mizeras, homo mavas.
Mi bedaŭrinde tute pravas.

Ĉiuj tri:

Ja estas tre domaĝe
kaj tre malavantaĝe.
Kaj tial ne prosperas ni
kaj ĉio restas utopi'.

(Tr. K. Schulze)



Arno Mohr: Portreto Bertolt Brecht.
Foto: Zentralbild

Mozaiko pri Brecht

En Portugalio

Laborista teatro de portugala ŝtaluzino jam 70-foje estis ludinta „La pafiloj de sinjorino Carrar". Ĝin vidis pli ol 25 000 spektantoj.
Pri unu prezentado raportas la direktoro de la Brecht-Centro el Berlin, Werner Hecht:
„Estis vera familia festo ĉi-dimanĉe posttagmeze. La prezentado havis tian efikon, kiel mi tion ankoraŭ ne povis travivi ĉe tiu spektaklo. La homoj interesiĝis pri la afero: Dum la diskuto inter Pedro kaj la padre (pastro) ili sin enmiksis laŭtvoĉe dirante ke la argumentoj de la padre estus malĝustaj.
Post la prezentado estis ŝtorma aplaŭdo. La artistoj aliris la podian randon kaj ekkantis la Internacion. La publiko kunkantis. Sekvis duhora diskuto."

En Ĉilio

Sub la prezidenteco de Salvador Allende la kultura vivo de la Anda lando kulminis. Ĉie ekestis novaj profesiaj kaj laikaj ensembloj, kiuj kun siaj etaj trupoj travagis la 4 000 kilometrojn longan landon. Ververe ĝis la lasta sekundo de sia libereco la ĉiliaj artistoj estis laborintaj. Je la 11-a de septembro

BRECHT

1973 en Santiago devis komenci la unua provludo por la spektaklo „La pafiloj de sinjorino Carrar".
Dum tiu tago, malmultaj minutoj antaŭ la naŭa, falis sur la ĉefurbon la unuaj bomboj de la aviadilaro de Pinochet. Komenciĝis la arestigoj. Ankaŭ artistoj estis inter ili.

Modesteco

Oni pridiskutis, ĉu sufiĉus la reĝisoroj por la kreskanta bezono de filmo kaj teatro. Oni menciis la reĝisorojn, kiuj estus konsidereblaj. Ankaŭ s-ro B. diligente pripensis „Ekzistas nur du reĝisoroj sur la mondo", li poste diris: „La alia estas Chaplin."



Fiksigo

Kunlaboranto demandis s-ron B., kiun koloron devus havi iu difinita kuliso. S-ro B. grandanime respondis: „Konvenas al mi ĉiu koloro. Ĉefe, ĝi estu griza."



„La nelibera, nescia, liberecama kaj sciavida homo de nia jarcento, la torturita kaj heroa, misuzita kaj inventema, la ŝanĝebla kaj la mondon ŝanĝanta homo de ĉi-tiu terura kaj grandioza jarcento, kiel li povas ricevi sian teatron kiu helpos al li majstri sin kaj la mondon?"

(El prelego de Bertolt Brecht en studenta scenejo de Stockholm, 4-an de majo 1939)

„Trigroŝa Romano"

1. Al niaj legantoj en nesocialismaj landoj

La „Trigroŝa Romano" de B. Brecht por vi nur estas akirebla per viaj libroservoj aŭ rekte ĉe Bleicher-Verlags-KG, Postfach 70, Holderäckerstr. 14, D - 7016 Gerlingen 1, FRG. (Informo laŭ peto de Edition Leipzig).



2. Al niaj legantoj en GDR

„Trigroŝa Romano" estas havebla pere de ĉiu librovendejo. Bv. ne sendi la prospekton en la nesocialisman eksterlandon, ĉar ĉiujn vendorajtojn en tiuj landoj havas la Bleicher-Verlag.

3. Al la legantoj en socialismaj landoj

Vi povas mendi la romanon pere de via internacia librovendejo aŭ rekte ĉe la eldonejo Edition Leipzig, Postfach 340, DDR - 701 Leipzig.

Eĉ tio okazis

Ĉu mankantaj butonoj?
Stockholma gazeto „Svenska Dagbladet" konsilas la sinjorojn: „Se viaj jakoj, sinjoroj, malhavas butonojn, ni rekomendas aŭ geedziĝon aŭ divorcon!"

Nova mondrekordo
Novan mondrekordon rilate kuŝadon sur najlolito akiris la anglo Tim Robinson. La 25-jara prezentanto de sensacioj eltenis 40 horojn sur kuŝejo kun 220 najloj 15,2 centimetrojn longaj.

Nia tempo
Noto en Amsterdama gazeto: „Nia tempo ne estas malpli morala ol tiu de niaj prapatroj. Ni nur pli ofte forgesas fermi la kurtenojn."

Pika
Senbrue kiel pantero „malfruiĝinta" edzo post meznokto kaŝiris tra la antaŭĝardeno de sia domo, proksime de Bruselo. La ŝuojn portante en la manoj li sukcesis nerimarkite ascendi la unuajn ŝtupojn de la ŝtuparo. Subite terura krio disŝiris la silenton de la nokto. La edzo estis surpaŝinta erinacon. Ridis ne nur la najbaroj sed escepte eĉ la edzino.

Sufiĉe plaĉe
En Coventry sinjoro aperis en policejo kaj petis, ke oni helpu al li retrovi sian edzinon. Laŭ liaj indikoj ŝi estis forkurinta antaŭ preskaŭ 25 jaroj, tuj la tagon post la geedziĝa festo. Demandite, kial nur nun li serĉas ŝin li diris: „Nu, mi pensas, ke eble estus sufiĉe plaĉe kune festi la arĝentan geedziĝfeston."

V. Subiĥin

Spertinterŝanĝo

Kolja Ivanov, juna inĝeniero, edziĝis antaŭ nelonge. La junaj geedzoj vivas tre harmonie kaj ĉiujn semajnfinojn ili iras al la foiro ĉiam komune.

Iutage oni vokis Kolja-n al la Laboreja Sindikata Estraro.

„En nia klubdomo hodiaŭ vespere okazas prelego, kiu temas pri ‚Sana edzeco – sana familio'", klarigis al li la estro. „Nepre vi devas paroli dum diskuto."

„Kial mi?" miris Kolja, „parolas ja kandidato de sciencoj. Kion ankoraŭ mi diru pri tio?"

„La sciencisto parolas pri ĝeneralaj principoj de reciprokaj rilatoj interne de familio, kaj vi informu pri viaj spertoj!"

„Sed mi ankoraŭ ne havas spertojn. Mi ja edziĝis nur antaŭ tri monatoj!"

„Nu, ne estu tiel modesta! Mi ja vidis vin, kiam vi revenis de foiro kune kun via edzino, vi portis ŝian mansakon plenan da nutraĵoj. Nun vi simple rankontu, kiel vi helpas vian edzinon en la dommastrumo. Estas ja edzoj, kiuj absolute ne volas porti sitelon da karbobriketoj, timante, ke ili perdus siajn virajn dignojn."

Kolja fine konsentis. – Post longedaŭra leciono de la kandidato de sciencoj parolis do la juna edzo, kiu ja estis nesperta parolanto, sed tre baldaŭ vekis kaj emociigis la laciĝintajn aŭskultantojn per sia vigla maniero. Li ricevis frenezan aplaŭdon.

Sekvontan tagon la laboreja radiofono disaŭdigis per sonbendo la diskutkontribuon de Kolja, kaj la laboreja ĵurnalo aperigis ĝin kiel ekstran eldonon sub la superskribo: „Kiel ni helpu niajn edzinojn."

Rezulte de tio Kolja-n oni petis paroli pri „paŝoj por firmigi la familion" okaze de sindikata aktivkunveno de la tekskombinato. Unu invito sekvis la alian. Kolja videble plimaldikiĝis, kaj li dormis ne pli ol kvar horojn ĉiutage, ĉar daŭre li devis prepariĝi por nova referaĵo. Kutime post laborfino aŭtomobilo jam atendis lin antaŭ la fabrikpordego por konduki lin al nova spertinterŝanĝo.

Pasintan semajnfinon mi denove renkontis Kolja-n. Ĉifoje li revenis sola de la foiro, portante aĉetmansakon. Kiam mi demandis lin pri Galja, li suspiris:

– „Ŝi forveturis al sia patrino en Odessa, ĉar ŝi ne plu povis vivi tiamaniere... Mi mem ankaŭ devas rapidi, mi ankoraŭ devas prepari min por referaĵo. Hodiaŭ vespere mi parolados en la klubo por ministoj pri la temo: „Kiel ni fondas feliĉan familion".

Tr. H. Buth
(Schweriner Volkszeitung 16. 12. 75)

Okaze de la 110-a reveno de la morto de

MAKSIM GORKIJ:

Kanto pri

I

Alten en montojn Kolubr' enrampis kaj kuŝis tie en montfendejo,
bule volviĝis, observis maron.
Kaj altĉiele la suno brilis kaj montoj sian varmon elspiris
kaj ŝtormaj ondoj frapiĝis sube kontraŭ ŝtonoj...
Kaj en fendejo al mar' renkonte torento kuris,
disĵetis ŝprucojn, tondris impete ke ŝtonoj oldaj...
Griza kaj forta, en blanka ŝaŭmo, ĝi tranĉis
monton falante maron, kolere muĝis.
Jen en fendejo apud Kolubro el firmamento
aperis Falko kun brust' vundita, kun sang' sur plumoj...
Kun krio kurta li falis teren kaj kontraŭ
ŝtonoj frapiĝis mute per brust' senforta...
Kolubr' estimis, forrampis vigle, sed tuj komprenis,
ke Falko vivos du-tri minutojn.
Rampis Kolubro al bird' vundita kaj siblis rekte en la okulojn:
– Ĉu mort' alvenis?
– Jes, venas fino, – respondis Falko sopirĝemante. –
Mi vivis arde... feliĉon spertis... sentime luktis!...
Ĉielon vidis... Vi ne ekvidos ĝin tiel klare! Ho vi, povrulo!
– Mi ne bezonas ĉielon vian! Por mi ĝi estas vakuo
plena, kiel mi rampi povos ja tie? En la fendejo bonege
estas – varme, humide!....
Jen kion diris Kolubr' mizera al bird' kuraĝa
kaj en animo li nur ridetis la deliraĵojn.
Li pensis tiel: „Por la fluganto kaj por rompanto
la sorto samas – la morto faros el ĉiuj polvon..."
Sed Falk' libera neatendite dolorektremis,
piedleviĝis kaj pririgardis la montfendejon.
Tra grizaj ŝtonoj la akvo gutis, en la fendejo
sufoke estis kaj la putrado malbonodoris.
Ekkriis Falko dolore, ĝene per plena forto:
– Ho, se mi povus ĉielon flugi eĉ unu fojon! Tuj
malamikon alprenus forte... al brust' vundita...
en sango mia mi lin dronigus! Ho, luktfeliĉo!
Vidante tion Kolubr' ekpensis:
„Kredeble vere en la ĉielo agrable vivi, se Falk' lamentas..."
Kaj li proponis al bird' libera:
– Vi vin ekmovu al rand' profunda de l'montfendejo
kaj tuj vin ĵetu en la abismon. Flugiloj, eble,
vin povos levi kaj iomete vi vivos brave, ĝuante
plene medion vian.
Kaj Falk' ektremis, kun kri' fiera deklivon
iris tra muk' de l'ŝtonoj persiste glitis.
Kaj alveninte etendis vaste flugilojn siajn, per
plena brusto li eksopiris, okulbrilante malsupren rulis.
La Falk' fiera, al ŝton' simila, rapide falis,
al rokoj firmaj rompante korpon, perdante plumojn...
Torent' tempesta lin ekkaptinte la sangon lavis,
per ŝaŭmo vestis, forfluis maron.
Kaj ondoj maraj kun muĝ' malĝoja ŝtonaron frapis...
Jen birdkadavro plu ne videblas en marvasteco...

Maksim Gorkij (28. 3. 1978)

la falko

II

En montfendejo kuŝante longe Kolubro pensis
pri mort' de l'birdo, pri la pasio al la ĉiela.
Kaj jen subite li ekrigardis en tiun foron, kiu
okulojn karesas reve, feliĉon dolĉan al ni promesas.
– Kion, li vidis, mortinta Falko, en ĉi dezerto
sen fin' kaj fundo? Pro kio tiaj, al li similaj, eĉ
jam mortinte konsternas koron per sia amo al la
ĉielo? Kion nur ili tie ja serĉas! Kaj mi ja povus
ekkoni tion, se mi ĉielen eĉ por momento nun suprenflugus.
Dirinte – faris. Ringvolviĝinte li saltis supren
kaj kiel bendo sub sun' ekbrilis.
Naskita rampi – ne povas flugi!
Kolubr' forgesis pri ĉi destino kaj falis teren,
sed ne mortiĝis, nur ekridegis . . .
– Jen estas ĉarmo de la flugado al la ĉielo! Ĝi – en
la falo! Ridindaj birdoj! Pri ter' ne scias, sur ĝi
sopiras kaj jen pro ili aspiras ĉielon flugi,
vivcelon serĉi en la dezerto.
En ĝi – vakuo! Multe da lumo, sed apogilo por
korpo viva forestas tute, same nutraĵo forestas
tie. Kial fieri? Kial riproĉi? Por ke vi kaŝu frenezon
vian, kaj netaŭgecon por vivagado? Ridindaj birdoj . . .
Sed nun paroloj de frenezuloj min jam ne trompos!
Mi scias ĉion, ĉielon vidis . . . Mi suprenflugis,
mi ĝin mezuris, ekkonis falon, sed ne rompiĝis,
kaj nun pli forte al mi mi kredas.
Per trompo vivu kiuj la teron ne povas ami.
Mi scias veron. Kaj mi ne kredas alvokojn viajn.
Kreaĵ' de l'tero – sur ter' mi vivas.
Kaj sur la ŝtono li bulvolviĝis fieroplena.
La maro brilis en lumo hela kaj bordon krutan
la ondoj batis.
En muĝ' leona la kanto sonis pri bird' fiera kaj
tremis rokoj de tiuj batoj, ĉielo tremis de kant' minaca:
„Al kuraĝuloj ni kantas himnon!
Aŭdac' ilia – jen kio estas saĝec' de l'vivo! Ho
Falk' kuraĝa! En lukt' severa kun malamikoj vi
sangoperdis . . . Sed temp' alvenos – kaj ĉiu guto de
via sango kiel fajreroj en la mallumo de l'viv'
ekflamos kaj multajn korojn kuraĝajn, ardajn bruligos
tiam per la soifo al lum', libero!
Jes, nun Vi mortis! . . . Sed en la kanto kuraĝa,
forta Vi ĉiam estos ekzemplo viva, alvoko
flama al la libero!
Al sentimeco de l'kuraĝuloj ni kantas himnon.

El la rusa lingvo:
Nadia Andrianova, Kievo – Ukrainio

Maksim Gorkij

Feino (Legendo)

Fein' en arbar' iam vivis.
Ŝi ofte sin banis rivere.
Sed, pri singardem' forgesinte,
Fiŝreton kaptiĝis iele.

Ŝin ege fiŝistoj ektimis.
Nur Marko-junul' senhezite
Ekkaptis la belan feinon
Kaj kisis ŝin arde, ravite.

Fein', kiel branĉo fleksebla,
En brakoj herkulaj glitante,
Al Mark' en okulojn rigardis,
Mallaŭte pri io ridante.

Taglonge ŝi Markon karesis,
Sed jus nigra nokto aliris,
Fascina fein' malaperis . . .
l'animo de Mark' eksopiris.

Kaj tagon kaj nokton vagadas
Li en la arbar' ĉe Danubo
Kun ĝem': „Ondoj, kie – l'feino?"
Responde: „Ne scias ni, bubo!"

Li kriis al ili: „Mensogo!
Vi mem kun ŝi ludas, sekrete!"
Kaj stulta junul', por ŝin trovi,
Riveren sin jetis impete . . .

Plu plaŭdas fein' en Danubo,
Samkiel antaŭe ĝi estis.
Sed Mark' jam malestas . . . kaj tamen
Pri l'brava la kanto ja restis.

Kaj vi sur la ter' travivaĉos,
Blindverme rompante sen cel':
Nek sonos pri vi iam kanto,
Kaj nek rakontiĝos fabel'.

Trad. N. Fedotov

Okaze de la 20-a reveno
de la morto de Johannes R. Becher (11. 10. 1978)

Je memoro de Johannes R. Becher

Doni al sia vivo riĉan enhavon, uzi siajn spiritajn fortojn por sia patra lando kaj popolo, resti fidela al ĝi ĝis la lasta spiro – tio estis la fiera devizo de la plej granda socialista poeto de Germana Demokratia Respubliko.

Joh. R. Becher naskiĝis la 22-an de majo 1891 kiel filo de altranga bavara oficisto. Post la studado de filozofio kaj medicino la filo publikigis 1911 siajn unuajn poeziajn verkojn. Dum la unua mondomilito li aliĝis al USPD (= sendependa socialdemokratia partio) fariĝis membro de „Spartakus-Ligo" kaj poste de KPD (= komunista partio). 1924 la „Reichsgericht" (plej alta germana tribunalo) akuzis lin pro la poemaro „La kadavro sur la trono". Amasego da protestoj el la kultura mondo haltigis la proceson. Malgraŭ amnestio, antaŭvidante teroron de la Hitler-faŝistoj li elmigris 1933, fine 1935 al Sovetunio; tie li estis ĉefredaktoro de „Internationale Literatur, Deutsche Blätter" (= Internacia Literaturo, Germanaj Folioj). 1945 li revenis al Berlino.

El lia fruktodona kaj honorplena vivo ni resume citas, ke Joh. R. Becher fariĝis prezidanto de „Kulturbund zur Demokratischen Erneuerung Deutschlands" (origina formo kaj nomo de „Germana Kulturligo"), membro kaj pli poste prezidanto de „Germana Akademio de l'Artoj", 1954 ministro por kulturo.

Tro frue, la 11-an de oktobro 1958, Joh. R. Becher mortis. Hodiaŭ li estus atinginta la aĝon de 80 jaroj. Pli ol 45 jarojn lia poeta spirito kreis dramon, romanojn, eposon, aforismojn, paroladojn kaj – precipe – poemojn, gran-

---

Ernst Kahler

Ĉiela rolo

Ne estas dubo – mi surgrimpis la plej altan punkton de mia kariero. Mi pendas je alteco de ĉirkaŭ dek du metroj en la superscenejo kaj atendas la komencon de la prezentado de Faust I. Anstataŭante malsaniĝintan kolegon, mi ludas unuafoje la Sinjoron. Pli alten mi ne trafos! Ekzistas pli grandaj roloj, ekzistas pli belaj roloj – sed, kio koncernas la hierarkian statuson, neniu povas egaliĝi al tiu de la Sinjoro.

Kio koncernas la eksterajn cirkonstancojn, tiuj ja estas tute ne belegaj. Mi sidas sur mizere malgranda, damne malmola taburetaĉo, kiu evidente estis konstruita por dioj pli dikpugaj ol mi. La tabureto staras sur tabulo ĉirkaŭ unu kaj duonan kvadratmetrojn granda, kiu estas pendigita per kvar dratkabloj. Tre labile pendigita. Ĉe fortika spirado aŭ vigla pensado ĝi admone ekŝanceliĝas. Sed ankaŭ super la Plejpotenco regas la laborprotektaj reguloj. Per sekurzono de Interflug*) mi estas fiksita ĉe fera paliso, kiu estas alŝraŭbita al la tabulo. Inter paliso kaj zono mi havas antaŭe kaj malantaŭe po du kaj duona centrimetrojn da dia movlibereco. La piedoj staras strikte ĉe la antaŭa tabulrando, kaj oni admonis min teni ilin trankvilaj, se mi ne volas riski, ke okaze de la veturado malsupren kelkaj piedfingroj restas en la superscenejo. Sur la tutaĵo – tabureto, paliso, zono kaj mi – estas etendita blankora mantelo de kristana mizerikordo, por ke la publiko ne vidus kia katenita bedaŭrindulo estas la kara Dio. Antaŭ mi, dekstre kaj maldekstre de mi la ĉielo estas najlfermita per tabuloj, malantaŭ kaj super mi krepuskas la superscenejo, en mi estas, krom la morala leĝo, la teksto de mia rolo (espereble) kaj la deziro, ke la afero finfine komenciĝu. Sed la tempo ankoraŭ ne venis. El la spektantejo ankoraŭ supreniĝas al mi la babilado de la publiko. Vane mi serĉas en mi la senliman paciencon, kiu laŭ la atesto de la teologoj el ĉiuj konfesioj estas unu el la plej elstaraj ecoj de la Sinjoro, kiun mi devas prezenti.

Maldekstre, du metrojn sub mi, sur tabulo simila al la mia, kaŭras tri kolegoj alivestitaj kiel ĉefanĝeloj. Ankaŭ ili estas ligitaj al palisoj. Sed ili devas genui. Tion ili faras jam dum kvaronhoro, ĉe tio elbuŝigante nedecajn diraĵojn, ĉefanĝele. Mi rikanas antaŭ mi kaj iomete levas mian plejaltan postaĵon. Diferencoj de la rango devas ekzisti, ni ja ne estas en la komunismo, sed en la ĉielo.

Komenciĝas. Per la antaŭludo sur la teatro. La teatrodirektoron ludas nia teatrodirektoro, ĉar tie li rajtas diri la unuan kaj la lastan vorton. Tio estas afero al li kutima. La poeton ludas unu el la reĝisoroj de la teatraĵo. Reĝisoro estas, kiam iu ne scias, ĉu li pli ŝatas esti aktoro aŭ poeto. Li formas la dramajn produktojn de aliuloj tiel, kiel li skribus ilin, se li scipovus skribi. Al ĉi tiu plenumiĝas la revo de sia vivo: li rajtas aktori poeton! En propra reĝio! La tria en la rondo estas aktoro, dramskribisto kaj nia partia sekretario en unupersona unuiĝo. Li ludas la gajan personon. La tri faras ne mallongan interparolon pri la naturo kaj tasko de la teatro. Post kiam montriĝis, ke sub tio ĉiu komprenas ion alian kaj opinias siajn partnerojn kompletaj idiotoj, ili ekagas por la tuja prezentado de teatraĵo. Ĉio ĉi ŝajnas al mi tre konata.

La duapotenca teatrodirektoro fermas la antaŭludon per la versoj:

Kaj de l'ĉielo li tra l'tero
Hezitrapidas al l'infero.

Jen la gvidvorto por mia sursceniĝo! En la laŭtparolilo tondras, la lumĵetiloj estingiĝas, en la mallumo mi hezitrapide glitas de la superscenejo, ne – kiel oni povis timi laŭ la teksto – tra la mondsignifaj tabuloj en la subscenejon: ne, mia lifto haltas ĉirkaŭ kvin metroj super la scenejo, dum la lumo denove eklumas kaj aŭdiĝas muziko.

La ĉefanĝeloj, ankoraŭ genuante, glorkantas al mi. Per artismaj aludoj ili laŭsence diras, ke mi, la Sinjoro, faris ĉion tute bonege. Laŭ mia gusto ili iomete troigas, kvazaŭ kulturagantoj strebantaj al ordeno. Sed ĉar, laŭ la eldiro de nuntempa dramisto, estas preskaŭ neeble opinii idioto iun, kiu ĵus laŭdis min, mi decidas trovi la kolegojn simpatiaj kaj montras kontentan mienon. Dum la himnaj ĉefanĝeloj ankoraŭ ĉarpentas pri sia kariero, el la nuna interkulisejo dekstre venas dika lamaĉulo, eligante fumegon. Mi antaŭsentas malbonaĵon. La dikulon mi konas. Delonge ni havas mondkonceptajn diferencojn. Ni ne povas interkonsenti pri tio, ĉu pli sanigaj estas duoblaj

Johannes R. Becher

„En via lingvo..."

(„In deiner Sprache...")

1. La vorto via iam kante lulis,
Karesis min. Ho dolĉa panja son'!
Tra multaj muroj via vorto rulis,
Sekreta flustro kaj intima ton'.

2. En via lingvo verkis mi poemojn,
Mi sonĝis, amis, pensis ĉiam mi.
La vorto dia donis altajn temojn,
La vorto via, ĝoj' ridetis ĝi.

3. En via lingvo, Germani', mi cede mortos.
Plej bone min komprenos certe vi.
Plej bonajn vortojn vi herede portos.
Se suno lumas, estas via sunradi'.

En via lingvo oni skribatestos:
„Popole skribis li; memore restos!"

(Trad. Ernst Wichert)

dan poemaron. Ilia formo kaj enhavo konstante pliprofundiĝis, pliriĉiĝis je alta ideologio kaj atingis vere socialisman nivelon.
En la tempo de lia emigracio speciale menciindaj estas la eposo „Deutschland" (= Germanlando), la romano „Abschied" (= Adiaŭo), la poemvolumoj „Ein hohes Lied" (= Alta kanto), „Deutschland ruft" (= Germanlando vokas), „Die hohe Warte" (= La alta belfrido), „Wiedergeburt" = Renaskiĝo). Post 1945 li donacis al la germana popolo longan vicon da verkoj: eposo, „Romane in Versen" (= Romanoj en versoj), dramo „Winterschlacht" (= Vintra batalo), poembukedoj „Heimkehr" (= Hejmreveno), „Volk im Dunkeln wandelnd" (= Popolo migranta en mallumo), „Sterne unendliches Glühen" (= Steloj, senfina ardado) kaj multaj, multaj aliaj, 1949 „Nacia himno de Germana Demokratia Respubliko" (komponita de Hanns Eisler). – Ne estas eble, en malmultaj linioj respekte kaj inde pentri bildon de nia granda socialista poeto. La fama germana verkisto Thomas Mann karakterizis Joh. R. Becher per jenaj vortoj:
„... lia strebado al la servo por la komuneco, por la popolo... estas unue kaj laste la varmega deziro, servi al sia popolo, la germana, kaj esti al ĝi amoplena, fidela konsilanto laŭ plej bona scio kaj konscio. Mi kredas, ke la tago venos, kiam la germana popolo en sia tuteco dankos al li pro tia amo."

E. Wichert

---

vodkoj aŭ duonaj litroj da pilzena biero. De tempo al tempo ni faras kompromison kaj ambaŭ trinkas ambaŭ. La sekvan tagon, mute kolerante, ni suferas pro la sekvoj de la ideologia kunekzistado.
Kiel mi timas, la dikulo tuj ekkverelas. Li asertas, ke la kerno de mia produktado, la homo, estas ege sub mondnivelo, en plej bona okazo duaklasa kvalito. Kiel oni reagas tiuokaze en mia pozicio? Ĉu ofendite? Unuflanke la aĉulo fuŝas al mi la tutan senlaboran semajnfinon, kulture tiel bone ĉirkaŭitan. Aliflanke mi scias ĉion – kaj krome ĉion pli bone – kaj povas milde ridetmortigi la kritikon de malsupre. Kiel ajn mi ludos tion, oni kulpigos min pri malĝusta ekzegezo de la sankta teksto. La dubindeco de ĉiu artinterpretado forte pezas sur mia animo. „La longviveco de la majstroverkoj baziĝas sur ege mizeraj spiritaj proceduroj, ĉe kio la babilado de la lernejaj fervoruloj iras mano en mano kun la naivaj arlekenaĵoj de la mildanimaj artistoj." Diras Anatole France. En tiu punkto de mia pensvagado mi rimarkas, ke sur la scenejo etendiĝis silento bonfara, sed ne planita. Estas mia vico! Kion mi devas diri? Tiel estas – homo pense progresas, Dio rolon forgesas! Nur en la lastlasta momento, por povi kredigi la publikon, ke mia memortruo estas efektcela paŭzo, la teksto ree ekbrilas en mia kapo.
Inter la dikulo kaj mi evoluas kadrula diskuto pri la perspektivo de la kolego Faŭst, kiu dume malantaŭ la kulisoj jam plenpumpas sin per aero, ĉar li estas lanĉenta kilometrolongan konversan monologon. Denove ni malsamas en niaj opinioj, mia pacienca konvinklaboro resaltas de la skeptika dikulo, kiu havas sur sia flanko la ridemulojn en la publiko. Mi rapidas interkonsenti kun li pri veto kaj lastmomente elturniĝas el la afero, afable helpate de la sceneja tekniko. La lumo estingiĝas, la lifto glitas supren, dum la dikulo sur la scenejo familiariĝas al la laboruloj en la partero, eligante malicajn rimarkojn pri la nun forestanta ĉefo.
Sur galerio de la superscenejo Günther, vestgardisto laŭ funkcio, atendas la finon de mia ĉieliro. Kia bonŝanco, ke ni bonege interrilatas kaj ke Günther estas absolute fidinda kolego. Ne elpenseble, kio okazus, se li ne venus por malfermi al mi la surdorse butonitan mantelon. Mi devus stufi ĉe mia paliso de torturo kaj – kio estas pli malbona – aŭskulti, kiel miaj kolegoj ludas la ĉefrolojn. Sed ĉio funkcias, kvankam ni neniam provis. Eble pro tio. La mantelo depreniĝas, mi malfermas la sekurzonon, mia rolo estas finludita. Nun komenciĝas la malsupreniro al la privata vivo. La superscenejo estas nur mizere lumigita, kaj ĵus eskapinte de la lumĵetiloj, mi estas kvazaŭ blinda. Nur pene mi ekkonas la konturon de Günther, kiu antaŭiras. Laŭ feraj eskaloj supren kaj malsupren, turniĝante dekstren kaj maldekstren laŭ lignaj irejoj kaj ŝtuparoj; ideala trejnejo por vespertoj. Jen – ĝuste kiam mi prenas la decidon ellabori direktivojn por profunda reformo de la superscenejo, mi stumblas sur trabo, post kio Günther diras: „Atentu, trabo!" Trafa rimarko. Nun prudentiĝinte, mi fulmrapide levas la kruron ĉe dua averto kaj trafas per la kapo kontraŭ trabon, kiu ĉiufoje supre baras la vojon. Ĉio ĉi estas iomete troa por unuopa Sinjoro. Preskaŭ nokaŭtite mi finfine atingas mian vestejon, eksidas ĉe la ŝminktablo kaj suspire diras: „Ho, vi bona Dio!"

El „Berliner Zeitung"
de la 1-a de jan. 1976
trad. D-ro Karl Schulze, Berlin

Lina Kostenko

Okulojn havis mi en infanec'

tiele bluajn,
ke en rememoro
tre ofte ŝajnis, ke la mond'
en blua vivis helkoloro.
Kaj tiam estis en ĉi mond'
nek nigra ombro,
nek makulo, –
nur bonkoreco kaj konfid',
nur suno hela sen nebulo.
Alvenis tamen al infana tag'
ĝis tiam nekredebla,
nevidita –
koloro nigra de malĝoj',
kaj sanga ruĝkoloro de l'milito.
L'okuloj iĝis grizaj, kiel fum',
kiam la teron ruinigis bruloj,
kaj kugloj malamikaj kun trankvil'
disdonis morton fridan al junuloj...
Enprenis la okuloj tien ĉi
kaj iĝis ili malserenaj plene,
vidante, ke al paco de la hom'
minacas ĉie kirlovent' malbene.
Futuro,
metu finon al malĝoj, –
vivantan ne mortigu plu vivanta.
Kaj por generacioj de la Ter'
montriĝas mondo nur bluanta.

El la ukraina:
Aleksandr Logvin

Berta Waterstradt

Se mi ne sentus tiom da skrupuloj ...mi skribus belan noveleton.

„Nenio estas pli facila ol tio" mi diris al mi, kiam mi ekvidis ĉe la tajpilo; „nenio estas pli malfacila ol tio", mi suspiris, post kiam mi longe fiksrigardis la internbandon. Kial ni tiom malviglas pri noveletoj? Eble, ĉar ni pli ŝatas longajn rakontojn? Ĉu niaj krimiverkistoj ne ŝatas procedi senceremonie? Ĉu oni eble ne ŝatas fordonaci beletan ideon pri noveleto? Cetere, ideo! Da nekutimaj ideoj mi havas sufiĉe, sed ĉu ili estas taŭgaj? Jen kelkaj sugestoj.

Temo 1:
Junulo helpas al patrino supreniĝi kun sia infanĉareto sur la ŝtuparo de la urba fervojo. Fotoreportero fotas la beletan, maloftan bildon kaj sendas ĝin al multlegata gazeto kun la subskribo „Supreniro de familio". Juna knabino, kiu nur antaŭ nelonge dum kantvespero interkonatiĝis kun la junulo, nun kantadas en liajn orelojn, ke li estas bigamiulo, kvankam li estas nek parenco nek biparenco al la infanĉareta panjo. Helpserĉe li turnas sin al nia gazeto, la kompetenta redakcio sentas kompaton al li kaj pere de alvoko eltrovas la patrinon de la infano. La malfidema knabino konvinkiĝas pri la senkulpeco de la amiko, nun ili denove kantas kune kaj post antaŭvidebla tempo eĉ lulkantojn. Kontraŭ tiu rakonto mi sentas fortajn skrupulojn, nome pro jena kaŭzo:
Se la junuloj legas, kiaj malagrablaĵoj estas ligitaj al simpla helpado, ili krios: Manojn for de fremdaj infanĉaretoj! Tiam la helpo al panjoj kun dolĉa sonĝo restas lasata al ni nejunaj virinoj.

Temo 2:
Maljuna sinjorino transloĝiĝas en maljunulejon. Ĉi tie ŝi renkontas iaman lernejan kamaradinon, kiun ŝi ne vidis de post multaj jaroj. Ŝi ne havas bonan opinion pri „la infano el sia klaso", kiu iam, antaŭ kvindek kvin jaroj, forkaptis de ŝi danclecionan adoranton. Tiu adoranto, konata scienculo, ja plurfoje ekiris al la edziĝa registrejo, sed al iu el la du li ne edziĝis. Li ne troviĝas en maljunulejo, sed sub la bona gardo de sia edzino tridek kvin jarojn malpli aĝa ol li. Okaze de la sepdekkvina datreveno de lia naskiĝo la iamaj danclecionaj partnerinoj gratulas la scienculon, kompreneble unuope, la unu ne scias pri la letero de la alia. La kortuŝita viro profitas la foreston de sia edzino por viziti siajn junaĝajn amikinojn. Li sukcesas interpacigi la du maljunajn sinjorinojn, triope ili renovigas la amikecon kun ovolikvoro kiel en la feliĉega tempo de siaj danclecionoj. La scienculo promesas refoje veni vizite, sed petas rezigni pri ĉia korespondado, ĉar lia edzino inklinas al troa ĵaluzo. (Mi opinias, ke ankaŭ tion oni ne povas skribi. Mi volas riski streĉitajn rilatojn nek al la sciencularo nek al ĵaluzaj virinoj. Ĉiu el tiuj du ebloj estus same malbona.)

Temo 3:
Juna sinjorino sidas en la restoracivagono de la trajno Berlin–Erfurt kaj plendas al la kelnero pri la kvalito de la kafo, kiu esceptokaze atingis nur nesufiĉan forton. La alparolito, beleta, freŝa knabo, rapidsprite respondas, ke „korfrapado senpage" estas specialaĵo de la televizio, sed „neniu korfrapado por unu marko" estas specialaĵo de Mitropa*). Ambaŭ ridas. Kiam la blanke antaŭtukita junulo forprenas la tason, li incidente diras, ke li loĝas en Erfurt (strato tiu kaj tiu) kaj scipovas prepari bonegan kafon. Mokrifuze la juna sinjorino rebatas, ke ŝi ne estas sufiĉe senhonta por viziti fremdajn virojn en ties kabanoj. Tamen ŝi estas. Kelkfoje miaj samseksulinoj ne estas tre logikaj. La kelnero ornamas sian ĉambron per floroj (mi supozas, ke en la florurbo Erfurt bukedfloroj haveblas en ĉiu sezono), kaj li tute forgesis havigi al si kafon. Li ja estas pasia tetrinkulo. (Tia oni fariĝas, se oni devas ĉirkaŭportadi kafon dum la tuta tago.) La juna sinjorino venas, la floroj odoras nerezisteble, kaj la pluaĵon ĉiu leganto povas imagi. Nelonge antaŭ la matena krepusko la juna sinjorino kaj la kelnero ekstreme rapidigis siajn piedojn por atingi la ekspresan trajnon Erfurt–Berlin. Kaj la kafo, kiu en la restoracivagono estas surtabligata antaŭ la knabino, odoras tra la tuta trajno, tiel ke la pasaĝeroj opinias veturi fervoje en Brazilo, do en lando, kie la kafo kreskas sur la arbedoj kiel ĉe ni la grosoj.
Ankaŭ rilate tiun historion mi sentas fortajn skrupulojn. Mi tre ŝatas veturi en restoracivagono, tiuokaze mi sentas min kvazaŭ mondumano resp. -anino. Sed la plezuro estus fuŝita por mi, se Mitropa sendas al mi protestleteron, kiu pruvas min mensogulo, ĉu,

1. la kafo en la restoracivagonoj ĉiam estas bonega.
2. la kolegoj de la gastronomia profesio neniam ekligas tenerajn rilatojn dum la deĵorado.

Mi nur havigus al mi ĉagrenon per tiu afero, ekhavus stomakajn tumorojn kaj tute ne plu havus la permeson trinki kafon (eĉ ne tiun de Mitropa), kaj tio estus tre malbona por mi. Do mi preferas ne skribi noveletojn aŭ nur tiajn, kiuj agadas en malproksimaj landoj, kie la respektivaj profesiaj grupoj ne povas entrepreni ion kontraŭ mi.

Trad. D-ro Karl Schulze, Berlin
(El „Von Jahr zu Jahr", Jahrbuch der Frau, Berlin 1976)

*) Mitropa = nomo de la trafikilrestoracia entrepreno en GDR

DISKUTETO:

Pri la vorto „preso"

Mi multfoje renkontis en E-gazetoj, precipe el slavaj landoj, la uzadon de la vorto „preso" en senco „gazetaro". Tia uzo estas evidenta miso, konfuzanta la leganton. „Preso" povas signifi nur la agon presi, aŭ presaĵon. Sed ne ĉiu presaĵo kaj neniu pres-ago povas esti gazeto. Ni ne rajtas aŭtomate preni el naciaj lingvoj la vorton „presi" en ĝia origina senco, ĉar la radiko „pres" estas jam okupita de alia signifo.

Pri la neologismo „koordini"

Oni renkontas nemalofte en niaj gazetoj la vorton „koordini". Tiu vorto ne ekzistas en Esperanto, kaj neniu ĝin bezonas, ĉar esperantistoj havas belan, „leĝe naskitan" vorton – „kunordigi".

R. Griŝpan
(El „Bulgara Esperantisto" 5/77)

*

La lasta volapukisto

Laŭ „La Brita Esperantisto", septembro–oktobro 1977 (p. 72) la 8-an de januaro 1977 mortis Johann Schmidt, la lasta germana volapukisto (aŭ ĉu de tuta Eŭropo aŭ eĉ mondo??) en malsanulejo en Weiskirchen, Taunus, FRG.

E. A. Bokarjov

La spontana kaj la konscia en la lingvo

Boris Kolker el Ufa havigis al ni en Esperanta vesto la tre interesan kaj apenaŭ inter esperantistoj konatan studon de E. A. Bokarjov pri spontaneco kaj artefariteco en lingvo. Bokarjov, eĉ ne mensciante la t.n. „artefaritajn lingvojn" pledas per lingvistikaj argumentoj por la konscia (t.e. „artefarita") reguligo de lingvoj, eĉ de novkreo de lingva materialo. La pritraktita problemo estas de principa graveco por la kompreno de la planlingva fenomeno. Pro tio ni publikigas tiun studon sur la paĝoj de nia revuo. *La red.*

La demando pri la spontana kaj la konscia, pri la natura kaj artefarita, el la vidpunkto de la marksisma metodologio, estas tute klara. La homo influas al la ĉirkaŭanta medio konscie por plejeble bone utiligi fruktojn de la ĉirkaŭanta „medio". Marks en „Tezoj pri Feuerbach" tre nete formulis: „Filosofoj nur diverskaraktere klarigadis la mondon, sed la afero konsistas en tio, ke necesas ŝanĝi ĝin".

En la historio de la komunista partio de Sovetunio la batalo kontraŭ adorado de la spontaneco kaj kontraŭ malgravigo de la principo de konscia influo al la socia influo ludas tre gravan kaj principan rolon. Efikeco de la marksismo-leninismo manifestiĝis en la evoluo de la soveta scienco kiel en la sfero de naturhistoriaj, tiel en la sfero de sociaj sciencoj.

La konscia, celdirektita agado de la homo ĉirkaŭprenas ĉiujn sferojn de la vivo. Ĉio, kio nin ĉirkaŭas, rekte aŭ malrekte, estas kreita fare de tiu agado. Kio estas „natura" por la homo kaj kio „nenatura"? Por la homo estas „nenature" esti vestita (la vesto estas produkto de la homa agado), por la homo estas „nenature" manĝi tion, kion li manĝas, estas „nenature" veturi en trolebuso k.t.p. Fakte ni vivas en la artefarita mondo. Ĉio, kion ni nomas kulturo, civilizo, ĉio ĉi estas frukto de la celdirektita homa agado.

B. M. Kedrov en la artikolo „La ‚natura' kaj la ‚artefarita' en la ekkono kaj agado de la homo" („Voprosi filosofii", 1958, n-ro 11) skribis: „. . . la ‚artefarita' . . . estas io konscie preparita fare de la homo el la ‚natura' en siaj interesoj, konforme al siaj bezonoj." Jen kial la artefarita en nia praktiko, diference de la natura, signifas atingon de pli alta ŝtupo de la scienca, teknika kaj ĝeneralkultura evoluo de la homo. Kontraŭmeto de la „natura" al la „artefarita", strikte parolante, estas nekorekta, ĉar tiujn epitetojn oni povas uzi nur konvencie. Okazas, ke la „natura" estas pli bona ol la „artefarita", ekzemple, naturaj floroj estas pli bonaj ol la artefaritaj. Sed ja la rozo estas ankaŭ iomgrade artefarita floro, rezulto de daŭra kaj zorge pripensita selekto. Oni povas doni senfinan kvanton da similaj ekzemploj. Kaj plej ofte, se „artefarita" produkto en io cedas al la „natura", do tio nur atestas pri nefiniteco de la krea procezo. Ekzemple, en iu aspekto lano estas pli bona ol sintezitaj ŝtofoj, sed en io pli aventaĝaj, pli utilaj por ni estas sintezitaj ŝtofoj, kaj principe ili nepre estos pli bonaj ol lano.

Ĉi-rilate estus interesa komparo de artefaritaj kaj naturaj satelitoj de la tero. Certe, luno staras pli alte ol ĉiuj artefaritaj satelitoj, sed nia tempo estas nur komenco de kreo de artefaritaj satelitoj. Ni ne scias, kion prezentos tiuj satelitoj estonte, sed ankaŭ nun iurilate artefaritaj satelitoj donas al ni pli, ol la naturaj, ekzemple, por studi kondiĉojn, en kiuj okazos kosmaj flugoj k.s.

Ĉu oni povas paroli pri la konscia, artefarita rilate al la Lingvo? – Sendube, jes.

Ni rememoru diversajn teoriojn pri deveno de la lingvo. Por ĉiuj teorioj estas komuna tezo, ke la lingvo ne aperas kaj ne ekzistas per si mem, sed ĝi ekzistas nur en homa agado, kreiĝas per homa agado, t.e. ĝi ankaŭ estas produkto de la kulturo, produkto de la civilizo.

Rilate al la lingvo la nocioj „natura" kaj „artefarita" ankaŭ estas konvenciaj kaj estas uzataj kun plej diversaj signifoj. Ekzemple, multaj konsideras literaturajn lingvojn artefaritaj. A. J. Fomson en sia kurso „Ĝenerala lingvoscienco" (Odessa 1910) rilatigas al artefaritaj lingvoj la literaturan kaj la parolan tutpopolan lingvojn diference de „artefaritaj" dialektoj kaj subdialektoj. Same H. Paul („Prinzipien der Sprachgeschichte", Halle, 1880) konsideras la literaturan lingvon kiel specon de artefaritaj lingvoj ĝenerale.

Multaj lingvistoj de la pasinteco skeptike rilatis al ebleco influi al la lingvo. A. Schleicher („Die deutsche Sprache", 1869) reprezentanto de la naturhistoria skolo en la lingvoscienco, neis eblon de homa influo al la lingvo, kvankam, allasante rimarkon: oni ne povas influi al la lingvo kiel al la objekto de la lingvistiko. La lingvo povas esti objekto de la lingvistiko kaj filologio. La lingvisto studas la lingvon en ĝia natura stato, la lingvon, kiu ankoraŭ ne fariĝis literatura; la filologo konsideras la lingvon kiel produkton de arto. La lingvisto studas la lingvojn, samkiel la botanikisto studas la plantojn, por kiu ajna herbaĉo povas valori multe pli ol belega rozo kaj rarega lilio. La rolo de la filologio estas alia, la filologo aŭ la verkisto povas ion preferi, selekti kaj ŝanĝi, lin oni povas kompari kun ĝardenisto, kiu serĉas en la plantoj belecon de formoj, de koloro, de odoro.

Tiamaniere Schleicher mallarĝis agadkampon de la lingvisto, forigante el ĝi la literaturan lingvon. Li ne neas komplete eblon influi al la lingvo, sed, unue, li limigas tiun eblon per periferiaj regionoj, malproksimaj de plej esencaj, konsistigaj flankoj de la lingvo. Due, per tio li opinias, ke tiaspeca influo havas nenion komunan kun la scienca lingvistiko, ke tio ne estas afero de la scienco.

Poste iaman neglekton de la normiga influo al la lingvo estis eldironta J. Vendryès; li allasas tiun eblon, citante kiel ekzemplon la normigitan francan lingvon, sed li limigas ĝin. Proceson de la formiĝo de skribaj lingvoj li komparas kun proceso de la formiĝo de glacio sur la surfaco de rivero. La malvarmo, produktanta la glacion kaj strebanta reteni la riverfluon, estas fortostreĉoj de gramatikistoj kaj instruistoj. La suno, liberiganta la lingvon

el katenoj, estas vivoforto, venkanta regulojn kaj rompanta forton de tradicioj („Le langage", Paris, 1921).
Ŝajnas, ke en la nuntempa lingvistiko estas malfacile trovi tian lingviston, kiu konsekvence, pripensite parolus pri neeblo influi al la lingvo. Sed post restaĵoj de tiu vidpunkto ekzistas kaj originas, kiel oni povas supozi al la naiva vidpunkto pri la lingvo flanke de la romantika filosofio. La romantika filozofio tre influis la formiĝon de la lingvistiko komence de la 19-a jarcento. Por la romantika filosofio de la lingvo estas tipa la strebo deiri for de la nuno al la malproksima pasinteco. La pasintecon ĝiaj adeptoj konsideris kiel oran tempon. Al la racio la romantikuloj kontraŭmetis la sentojn, la instrukton. La lingvo por ili estis senpera formo de enkorpiĝo de spirito, manifestiĝo de iaj misteraj, tre ofte ne ekkoneblaj fortoj; la romantikuloj idealigis la naturajn lingvojn, ne tuŝitajn per literatura prilaboro. Laŭ ilia opinio, provoj iel influi lingvoevoluon, fiksi iujn lingvajn normojn kaj regulojn estas profanado. Ili admiris ĉian malordon, ĥaoson en la lingvo. Regado de tiu filosofio estas multagrade kaŭzo, ke dum longa tempo, en la 19-a kaj komence de la 20-a jarcentoj, lingvistoj okupiĝis precipe pri la historio de la lingvo, kaj nur dum la lastaj jardekoj sinkrona esploro de la nuntempaj lingvoj ekhavis amuzan karakteron.
Estas dubinde, ĉu nun iu povus konsideri la romantikan filosofion kiel gvidideon. Ĝia tempo forpasis. Tamen postrestaĵoj de tiu filosofio en tiu aŭ alia formo ankoraŭ konserviĝas en la lingvistiko. Tiu naiva romantikeco manifestiĝas precipe en popularige filologia literaturo. Ekzemple, ĉe A. K. Jugov („Sudjbi rodnogo slova", Moskvo, 1962) tiu nevenkita romantikeco estas sentebla ĉiupaĝe. Sed mem A. K. Jugov, malgraŭ ke li havas multon, kio igas konsideri lin kiel kontraŭulon de la parolkulturo, estas tamen iugrade normigulo. Ankaŭ li rekonas lingvan politikon, rekonas eblon influi al la lingvo, sed nur en tute inversa direkto: iujn vortojn li rekomendas, iujn neas. Tio manifestiĝas ĉe li en la defendo de dialektvortoj, arkaismoj, elementoj de nenormigita lingvo, en la malŝato de nova libro-literatura kaj terminologia leksiko, precipe prenita el aliaj lingvoj.
Ni ekzamenu konkrete la demandon pri eblo influi al la lingvo. En la kreo kaj asimilo de literaturaj lingvoj manifestiĝas elemento de konscieco kaj intenco: plivastigo de la vortarkonsisto, alpreno de fremdvortoj, fikso de prononcaj normoj. Kiel ekzemple de la konscia influo al la lingvo estas lernejo. Eblo influi al la lingvo estas senduba. Sed la ĉefa demando estas: kia estas la ebla grado de konscia, artefarita elemento en la lingvo. Plej facile estas influata la leksika tavolo de la lingvo.
Ĉu oni povas citi en la lingvo iun absolute artefaritan, ekzemple, elpensitan novan vorton, tute ne ligitan kun elementoj konataj al la lingvo? Tio estas malfacila, ĉar la artefarita estas preskaŭ ĉiam prilaboro de la natura. Kutime, kiel ekzemplon de la artefarita oni citas la vorton „gaso", elpensitan de Van Helmont en la 17-a jarcento. Sed eĉ ĝi estas nur relative artefarita, ĉar ĝi estas rezulto de nevola hibridigo de kelkaj vortoj: germanaj „Geist" (spirito) kaj „Blase" (veziko), greka „ĥaos" (ĥaoso). Kiel alian ekzemplon oni citas la vorton „kodako" – origine nomon de fotoaparato. Evidente, tiu ĉi „artefarita" vorto estas onomatopeo, imito de klako de fotoaparato dum fotado.
Sed aliflanke da elpensitaj vortoj en ĉiuj lingvoj estas tre multe, sed ili kreiĝas, kutime, per uzo de natura materialo, de vortoj kaj radikoj, jam ekzistantaj en tiu ĉi lingvo aŭ en fremdaj lingvoj.
Bezono pri novaj nomoj konstante kreskas. En unu el finnlandaj gazetoj estis publikigita ĉi-sence kurioza anonco: „Ni proponas al vi diversajn nomojn, necesajn por diversaj celoj. Ĉu vi ion inventis? Kiel tion nomi? Ni havas ĉirkaŭ 25 000 ankoraŭ ne uzitajn nomojn. Prezo laŭ interkonsento." Efektive, novaj nomoj estas necesaj, kiam estas kreita io nova. Evoluo de la socia vivo, scienco, tekniko postulas novajn vortojn, kaj tiaj nomoj estas konstante kreataj grandkvante. Multaj el ili post tempopaso enradikiĝas kaj rapide eniras la literaturan lingvon, ekzemple, nomoj de novaj sintezitaj ŝtofoj: porolono, laosano, kaprono kaj multaj aliaj, kiuj ricevis ĝeneralan disvastiĝon.
Precipe multas tiaj vortoj en la sfero de terminologio. Kvanto de la terminoj de diversaj sciencoj multe superas nian ĉiutagan vortaron. Nur en la organika ĥemio estas pli ol tri milionoj da terminoj. Ĉiuj ili estas konscie kreataj, speciale elpensataj. Oni povas renkontiĝi kun la opono, kvazaŭ tiuj terminoj ne povas esti konsiderataj kiel parto de la tutpopola lingvo. Tiu opono estas ĝusta nur parte, ĉar limo inter la terminologia kaj ĉiutaga leksikoj estas tre ŝancela kaj nestabila; la terminologia leksiko ĉiam pli penetras en nian ĉiutagan lingvon. Tio rilatas al medicinaj terminoj (nomoj de malsanoj kaj medikamentoj), al nomoj de kemiaj elementoj, al diversaj specoj de la tekniko k.s. Tiuj terminoj, kiel: piramidono, hipertensio, aluminio, fokuso, atomo, molekulo, bakterio, terkonekto, karburilo kaj multaj aliaj, delonge penetris en la ĉiutagan leksikon. Originon de pliparto da similaj artefaritaj vortoj oni povus precize dokumenti, ekzemple, la nomo „aluminio" estas kreita en la 1812-a jaro de la angla ĥemiisto H. Davy.
Terminoj ofte estas kreataj laŭ skemo en kompletaj sistemoj: etano, metano, butano, propano; etilo, metilo, butilo, propilo; etileno, metileno, butileno, propileno k.t.p. Ekzistas eĉ bone pripensita „Bazela sistemo", laŭ kiu saloj de la sulfata acido estas nomataj sulfatoj, de la sulfita acido – sulfitoj, kaj saloj de la sulfurhidrogena acido – sulfidoj.
Oni povas citi ankaŭ tiajn sufiĉe interesajn okazojn, kuriozaĵojn, kiam artefarita enkonduko de nova vorto estis bazita sur eraro. Tiel aperis la vorto „zenito". En vortaroj ĝi estas konsiderata kiel araba laŭ origino. Sed en la araba lingvo mankas tia vorto. Tie estas vorto „semt" (vojo) aŭ en hispana transskribo „zemt", samradika kun la vorto „azimuto" (kiu estas pluralo de „zemt"). En iu manuskripta verko pri astronomio, aperinta en Hispanio, muŝo metis punkton super la tria bastoneto de la litero „m". La vorto estis tralegita kiel „zenit" kaj en tiu formo ĝi eniris en ĉiujn kulturajn lingvojn de la mondo.
Ankoraŭ unu malpli konata ekzemplo: en la hungara lingvo estas vorto „minta", kiu signifas „modelo". Ĝi sonas hungarece, sed ĝi estis enkondukita en la 1770a jaro de la hungara leksikologo F. Faludi el la laplanda lingvo (nun tiu lingvo nomiĝas sama). Trarigardante vortaron de la laplanda lingvo, F. Faludi atentis tiun vorton, ĝi al li plaĉis, ĉar ĝi sonsimilis al hungaraj vortoj. En la laplanda vortaro, pro teknika eraro – delokiĝo de linioj, kontraŭ tiu vorto troviĝis la signifo „modelo, ekzemplo", kvankam fakte ĝi signifas „monero". Tiel kun la erara signifo tiu vorto trafis en la hungaran lingvon.
Per tiaj ekzemploj de konscia pliriĉigo de la leksiko ni vidas, ke la homo povas influi al la lingvo. Novajn vortojn iu kreas, iu enkondukas. Ofte la aŭtoro devas defendi tiujn vortojn.
Sed nia kapablo influi al la lingvo ne estas senfina. En la 1926a jaro en Tbiliso en la revuo „NOT i ĥozjajstvo" aperis artikolo de amatora lingvisto A. P. Andrejev sub la titolo „Nia parolo kiel objekto de raciigo". Pri la sama temo A. P. Andrejev faris en la Tbilisa universitato prelegon, kies teksto estis transdonita poste al A. V. Lunaĉarskij (tiama karhomo = ministro de kulturo. – noto de la tradukinto). Andrejev asertis, ke, bedaŭrinde, la lingvo ĉe ni ne estas dece normigata, ĝi estas nesufiĉe racia por esti ilo de la tutlanda komunikado, estas tre grave, ke ĝi estu bone pripensita, bone prilaborita kaj facila por ĉiuj popoloj de la soveta lando. Kien do, laŭ lia opinio, necesas fari en la lingvo? Li opiniis, ke estas neracie

konservi en la rusa lingvo tri genrojn – necesas likvidi la kategorion de genro en la rusa lingvo; necesas likvidi en la verbo esprimon de la nombro kaj de la persono per fleksio. Kompreneble, tiuj proponoj de Andrejev ne povis esti aprobitaj. Dum iu konferenco en Dagestano oni metis la demandon: „Ĉis kiam ni toleros en la laka lingvo tian nekulturan fenomenon, kiam la vorto „fraŭlino" rilatas al la klaso de animuloj kaj nur la edziniĝinta virino – al la virina klaso?" (klaso estas la samo kiel genro). Sed tiu propono havis nenian sukceson.
Principe ankaŭ tiel oni povas influi al la lingvo, sed ĉia lingva novaĵo devas esti subtenata per la vasta socia kampanjo. En la 1938a jaro dum kunveno, dediĉita al transiro al la rusa alfabeto, reprezentanto de la Tuva respubliko en sia raporto rakontis pri simila lingva novaĵo. En la tuvan lingvon oni enkondukis desupre novan vorton por signi virinon. Ĉis tiam ekzistis vorto, kiun oni ne povis toleri: la virinon oni nomis per vorto, kiu signifis „maltaŭga, nenecesa". Por anstataŭigo estis trafe selektita la vorto „ĵen", ĝi jam estis konata kiel parto de la rusa vorto „ĵenotdel" („virina fako"). Dank' al granda organiza laboro, al kunordigitaj agoj de multaj institucioj, tiu vorto firme enradikiĝis en la tuva lingvo.
Tiamaniere, konscia influo al la lingvo povas esti sukcesa, se ĝi estas limigita per negranda kvanto da objektoj. Sed se tiu agado estas direktita al granda nombro da lingvaj unuoj, tia influo estas embarasata.
Eble, en malproksima estonteco la homo povos pli bone regi sian lingvan mastrumon, kaj la fantazia por nuntempo plano de Andrejev kaj aliaj similaj planoj iĝos realaĵo. Sed antaŭdiri estontecon estas nefacile, kaj rilate la lingvon – des pli malfacile, ĉar la lingvo dependas de multaj eksteraj faktoroj, kiujn konsideri estas neeble. La nuntempa angla fizikisto D. Tomson en la libro „Antaŭvidebla estonteco" skribis, ke, restante sur la grundo de realo, oni povas fari supozojn ne plu, ol je cent jaroj antaŭen. Kompreneble, oni povas fari iujn prognozojn ankaŭ pri tio, kio okazos al la lingvo post cent jaroj. Evidente, malfortiĝos aŭ tute malaperos dialektoj, multe pli grandan lokon en la ĉiutaga lingvo okupos la terminologio. Sed la ĉefa, kion oni povas kuraĝe supozi, estas, ke pligrandiĝos la rolo de la normigo kaj de la racia, konscia regado al la lingvo.

Trad. Boris Kolker
el la revuo „Russkaja reĉ"
(„Rusa parolo") 1967, n. 2, p. 10–15

Radio Moskvo en Esperanto!

Kun agrabala surprizo multaj esperantistoj eksciis pri la esperantlingvaj disaŭdigoj de Radio Moskvo. La 4-an kaj 5-an de februaro en la kadro de la itallingva programo la moskva stacio parolis ĉirkaŭ 15 minutojn en la internacia lingvo. Oni inter alie respondis demandojn de italaj esperantistoj. Paroladis la veterano de la sovetunia Esperanto-movado kaj de MEM, prof. S. N. Podkaminer el Leningrad pri la historio kaj nuntempo de la sovetunia movado. Plue oni eksciis, ke Esperanto ludos rolon dum la Olimpikaj Ludoj 1980 en Moskvo kaj ke eldoniĝis la nova Sovetunia Konstitucio ankaŭ en Esperanto. La itala parolisto, kiu cetere enkonduke informis, kio estas Esperanto, dum la disaŭdigo kelkfoje menciis (en la itala) „parolas Radio Moskvo en la internacia lingvo Esperanto". Ni esperu pri pluaj disaŭdigoj, ĉar ili sendube kontribuos al la diskonigo de faktoj pri Sovetunio.

N. Danovskij

Aktiveco kaj „aktivecoj"

Lastatempe oni tre ofte povas renkonti sur paĝoj de diversaj Esperanto-gazetoj la esprimon „aktivecoj", kies semantikon oni komprenas kiel publikaĵojn, publikajn aranĝojn de variaj specoj, niveloj, celoj kaj destinoj (kunvenoj, artvesperoj, ekskursoj, studrondoj, renkontiĝoj, prelegoj, lekcioj, tendaroj, eldono de plej variaj materialoj ks, k.t.p. . . .) unuvorte ajnajn elmontrojn kaj manifestojn de aktiveco.
Do, lige kun tio antaŭ ĉio venas la unua demando: ĉu povas la vortoj kun ec-sufikso havi multnombron? Nu, komencante de la primara „ecoj", oni vidas, ke ekzistas okazoj, kiam la ec-vortoj povas havi multnombron. Tio okazas tiam, kiam en efektivo tiuj ec-vortoj entenas en si tutan kategorion de aliaj ec-vortoj, unuvorte, kiam ili alprenas iun klasigan aŭ grupigan funkcion. Sed tamen ĉiuj apartaj nocioj entenataj sub tiaspeca kategorieca, grupa aŭ klasa aro jam prezentas ĉiu per si mem unu „econ" tute unikan, t.e. abstraktan nocion, kiu per forto de logiko kaj sia naturo jam ne povas havi multnombron. Tiamaniere en multnombro estas uzeblaj: grandecoj, samecoj kaj malsamecoj, unikecoj, belecoj, egalecoj, specifikecoj kaj similaj.
Venas la dua demando: ĉu ĉiuj ec-vortoj povas havi multnombron?
Evidente, ne.
Ekzistas klaraj situacioj, kiam la ec-vorto ne povas havi multnombron. Kaj ĝi povas esti uzita nur en ununombro. Tio rilatas, evidente, al tiuj unikaj esencaj vortoj, al kiuj reduktiĝas la eroj de la klasigaj grup-vortoj de la suprenomita kategorio (t.e. la kategorio, kiu povas havi multnombron). Al tiuj unikaj vortoj apartenas, ekzemple: *bonkoreco, kuraĝeco, virineco, moŝteco, stulteco, vireco, morteco, aktiveco, juneco, spriteco* kaj multaj, multaj aliaj, entenantaj en si plenesprimitan universalan koncepton, ekskludantajn plian vastigon per multnombro.
Tamen venas la tria demando. Se *aktiveco* estas uzebla nur en ununombro tiam kiel oni povus klarigi la aperon de la bizara formo „aktivecoj"? T.e. kiel oni povas klarigi aperon de evidente kontraŭfundamenta formo? Kiel mi klarigus tiun fenomenon?
Jen tiel:
Pro nesufiĉa scio de la fundamentaj leĝoj de la lingvo oni atribuas al la sufikso „ec" nenaturan kaj ne apartenantan al ĝi signifon. Nome, oni forigas la abstraktan nocion de la sufikso, anstataŭigante per nocio de la konkreta sufikso „aĵ". Kaj post tiu operacio la abstrakta nocio „aktiveco" ricevis apud si konkretajn manifestiĝojn de tiu eco en formo de konkretaj agoj – „aktivecoj" –. Tiu nocio jam perdis la primitivan aŭ primaran signifon kaj akiris novan: konkretan manifestiĝon de energio, alta laboremo de individuo aŭ kolektivo. Tiuj konkretaj manifestiĝoj de la unika „aktiveco" en formo de koncernaj agoj (rezultoj, aranĝoj, objektoj, materialoj ks) oni devus nomi konforme kun fundamento „aktivaĵoj", simile al petolo, petoleco kaj petolaĵo. Sed oni bonvolis nomi „aĵoj" per „ecoj".
Sekve, enkondukante „aktivecojn" en senco „aktivaĵoj", oni metas la signon de egaleco inter „ec" kaj „aĵ" kun tendenco vastigi tiun praktikon disfluigi la sencaron de „ec" je konto de „aĵ". Kun perspektivo eble entute anstataŭigi „aĵ" per „ec" kaj tiamaniere plivastigi, aŭ eble plene dissolvi la signifon de klare monosemantika sufikso.
Fine, laste laŭ ordo sed ne signifo la kvara demando. Kiel esprimi la nocion, entenatan en la vorto „aktivecoj", ne atencante kontraŭ radikaj principoj de Esperanto? „Aktivecoj", kiel manifestiĝoj aŭ manifestado de konkretaj formoj, specoj, aspektoj de AKTIVECO estas sendube kaj senrezerve AKTIVAĴOJ. Kaj sekve, uzante „aktivecoj"-n en la indikita senco de „aktivaĵoj", oni enkondukas ĥaoson en distribuon de signifo-nocioj de la sufiksoj. Kaj sekve tiu sendube kontraŭfundamenta bizara vorto estas nepre malaprobinda kaj kondamnenda.

K. Kalocsay

La mezepoka Esperanto

Vere, estas granda neglektemo de mia flanko, ke mi ankoraŭ ne prezentis al vi mian amikon C. E. R. Bumy. Ĉar li estas tre originala homo, kun siaj eternaj problemoj, eterna senkombeco, eternaj tri libroj sub la brako. Kio estas lia profesio? Mistero. Eĉ tion mi ne kuraĝas aserti decide, ke li manĝas, kiel la ordinaraj homoj. Eble el antikvaj kaj mezepokaj poemoj li elsuĉas por si ian ambrozion. Eble pro tia etera nutraĵo li estas tiel diafane malgrasa.

Li estas espisto. Mi varbis lin jam antaŭ longe. Tuj li ekinteresiĝis kaj eksprese li ellernis la lingvon, laŭ sia maniero: li lernis la gramatikon, poste la vortaron, poste li ellegis mian bibliotekon. Post ok semajnoj li jam liveris al mi – tute pretan reformprojekton. Mi priridis lin, klarigis, ke Esperanto estas vivanta lingvo, havas popolon, oni ne plu povas ĝin tondi kaj glui laŭplaĉe. Mi demandis, ĉu li kuraĝus reformi vivantan nacian lingvon, ekzemple la hungaran?

– Kial ne? – li respondis.

– Kaj ĉu vi sukcesus akceptigi vian reformon?

– Eh! Ĉu tio gravas? – li mansvingis, tute malŝate pri mia „naŭza realismo".

Tamen, ĝis nun li ne liveris al mi la grandan reformon de la hungara lingvo, kaj enterigis ankaŭ sian Esperantan reformon. Li komencis labori literature. Kompreneble dum tio li inventis kelkajn aferojn. Mi menciu nur la prepozicion graŭ, kiel „senmaligon" de malgraŭ, kaj la adjektivon ica, kiel „senmaligon" de malica. Liaj lingvaj konsiloj ĉiam estis frapantaj, vere kapfrapantaj. Foje oni diskutis pri la tro longaj vortoj: estinteco, estanteco, estonteco. Iu insistis pri la formoj: pasumo, nuntempo, futuro, alia riskis: itempo, atempo, otempo.

– Azenoj vi estas! – interkriis nia C. E. R. Bumy. – Jen la sole ĝusta solvo: timpo, tampo, tompo!

Jes, tia li estas. Ĉiam li havas geniajn ideojn, kaj ĉiam li malprosperas kun ili. Sed tio ne interesas lin. Li ja ne estas „abomena realisto".

Lastatempe li ŝajne elreviĝis pri Esperanto, ne sufiĉe taŭga por naski problemojn. Mi longe ne vidis lin en la grupo. Hazarde ni renkontiĝis sur la strato.

– Nu? – mi demandis riproĉe. – Kial vi perdiĝis?

– Mi estas tro okupita.

– Problemo?

– Jes. Sed nun ne literatura. Mi laboras pri teknika problemo.

– Teknika problemo?

– Jes. Sed tio ne interesas vin, vi, versvermo!

– Eĉ, tre interesas min, vi, realisto! Rakontu do!

– Nu, mi provos al vi komprenigi la aferon.

En la tuta mondo, vi scias, estas granda ekonomia krizo. Kial? Ĉar oni ne povas tiom konsumi, kiom oni produktas. Kial? Ĉar oni produktas per maŝinoj kaj konsumas per homfortoj. Jen la granda malegaleco! Kompreneble homo ne povas konkuri kun maŝino, sekvas troproduktado, laborĉesigo, senlaboreco. Ĉiu homo scias tion, kaj, ho, la azenoj, tamen ne trovis la solvon. Mi devis alveni rekte el la paĝoj de mezepoka fablolibro por solvi la problemon. Kvankam ĝi estas ja ovo de Kolumbo. Maŝinon oni devas meti kontraŭ maŝino. Mi jam projektis preskaŭ komplete.

– Kion?

– Homo! eĉ nun vi ne divenas? La konsummaŝinon!

– Ko ... ko ... kons ...

– Kial vi balbutaĉas? Jes, la konsummaŝinon.

Oni simple ekirigos mian maŝinon kaj ĝi konsumos. Ho, kiel ĝi konsumos! Per centoj kaj miloj da ĉevalpovoj ĝi konsumos! La magazenoj malpleniĝos fabelrapide! Oni ree devos produkti, la fabrikoj ree eklaboros, la senlaboreco ĉesos. Mia maŝino forblovos la krizon! La mondo estas savita!

– Mi gratulas! Kara Bumy! Mi gratulas! – mi kriis entuziasme premante lian manon. – Vi estas geniulo! Ĉiam mi sciis tion!

– Mi dankas. – Li diris memfide. – Nu, kaj kion vi faras? Ĉu vi ankoraŭ esperantas?

– Jes. – Mi diris tre modeste. – Ekiros ree Literatura Mondo.

– Eh! – Li mansvingis malŝate.

– Kial eh? Vi ofendas min per ĉi tiu eh.

– Kion fari? Mi devas diri eh. Kion komenci per lingvo, kiu ne havas arkaikajn formojn. Mi tradukis mezepokan fablon kaj ĝi fariĝis moderna, kvazaŭ gazetartikolo. Al la diablo tiun lingvon, en kiu oni ne povas traduki la Groteskajn Rakontojn de Balzac, ne farante el ili enuajn modernajn trivialajn klaĉaĵojn.

– Sed, kara Bumy! – mi diris. – Esperanto estas juna lingvo! Ankaŭ Dante apenaŭ estus povinta siatempe uzi arkaikajn formojn. Sed la lingvo evoluas, iom post iom kelkaj ĝiaj elementoj eluziĝos, elmodiĝos, kaj tiam ...

– Dankon! – li interrompis krude. – Ĉu mi atendu kelkajn centjarojn? Mi ne havas tiom da tempo. Cetere – mi tute ne havas tempon. Adiaŭ.

– Haltu! – mi postkriis lin malespere. Li haltis.

– Nu?

– Kara Bumy! – mi subpremis rideton. – Se tiel mankas al vi la arkaika Esperanto, faru ĝin mem.

– Ĉu mi? Kiel? – kaj la brilo de „problemo" akfajreris en liaj okuloj.

– Nu, simple. Esperanto estas, ĉu ne, ĉefe latinida lingvo.

La arkaikaj formoj de la latinidaj lingvoj propre estas kvazaŭ transiraj formoj inter la nuna lingvo kaj la pura latino. Elcerbumu do tiajn transirajn formojn ankaŭ por Esperanto kaj vi havos, kion vi bezonas.

– Jen la unua saĝa vorto, kiun mi aŭdas de vi! – li kriis kaj sensalute eksvingis siajn longajn piedojn. La manoj en la poŝoj, la kapo profunde klinita, kvazaŭ sub la ŝarĝo de la „problemo", li velis for.

Post kelkaj semajnoj subite malfermiĝas mia ĉambropordo kaj tempeste enflugas C. E. R. Bumy.

– Jen – li diris sen enkonduko kaj ĵetis sur mian skribotablon dikan kajeron. Mi rigardis.

Grammaticu kay vocabularu antiques mundales lingues Sperantu.

– Jen! – li ripetis triumfe. – Vi povas ĝin eldoni. Oni povas el ĝi lerni la Esperanton de la mezepoko, la Esperanton de la Rolandkanto, de Vogelweide, de Francisko de Assisi. Vi estis mizere senpovaj, malriĉaj, nun vi riĉiĝis. Esperanto estas savita!

– Ne koleru, kara Bumy, – mi diris, – sed tio ne estus ĝusta sinsekvo: fari antaŭe arkaikan gramatikon, kaj poste serĉi al ĝi arkaikajn tekstojn. Trovu kelkajn tiajn fosilajn tekstojn kaj poste komentariu ilin per tiu ĉi grandioza verko.

– Ho, ĉi tiun pretekston mi antaŭvidis! – li triumfis. –

Jen, kion vi volas! Eterna gloro de Hungarlando estas, ke ĉi tie, en la antikva monaĥejo de Utop, mi trovis ĉi tiun pergamenon, devenintan el la fino de la dekdua jarcento. Sur ĝi vi

trovos en la mezepoka Esperanto la laŭvortan tekston de la Primorta Prediko; la unua prilingva dokumento de la hungara lingvo. Legu kaj miru!

Mi legis. Sur flaviĝinta pergameno, kun belaj ruĝaj inicialoj, kun la splitaj gotikaj literoj de la mezepokaj manuskriptoj, tie antikvis la teksto. Pene mi deĉifris:

Widats wui, confratruy, quio nui estams? Ya pulvu kaj cindru estams. En quiomt graceu principe Diu creays nuialn praun Adamun kaj donnays ad llui paradisun quiele domun. Kay ell omn fructuy trovibiluy en paradisu dirays al llui wiwir. Solel interdirays al llui unes arbores fructun. Sed Llui dirays al llui, pro quio llui ne mandduz. Ya, quiudie tui manddors ell fructu, tui mortors mortes mortun. Avdays suialn mortun de creatoru Diu, sed oblivays. Llui cedays diaboles tentun kaj manddays ell fructu kay en fructu manddays mortun. Colerays Diu kay lluin jectays ad istiunci laborosun mondun. Kay llui fiays nestu mortes infernesquay. Kay totu lluial gentu. Quiuy estas istiuy? Nui estams, quiele powats wui widir per wuialy occuluy. Ya nec un homu povas ewitir istiun cavun. Ya nui chiuy estams irantuy ad iddi. Nuy pregiumz pro favoru siniores Diu por istiu animu, que Llui habuz al llui indulgun kaj misericordun kaj pardonnuz al llui lluialyn culpuyn. Kaj nui pregiumz sanctan mullverun Maria kaj beatun archangielun Michaelu kaj chiomt angielun, que illi pregiuz por llui. Kay pregiumz sanctun siniorun Petru, ad quiu donnatis potentu kay ligir kay solwir, que llui solwuz chiomt lluialyn culpuyn. Kaj nui pregiumz chiomt sanctuyn, que illi estuz al llui auxilu coram nuial sinioru Diu. Que Diu pro illialy pregiuy pardonnuz lluialyn culpuyn kay libericuz lluin de diaboles persecutuy kaj infernes turmentuy. Kaj Llui conducuz lluin ad paradisaln tranquilun kay donnuz al llui voiun ad cielun kaj partun ell chiomt bonu. Kay clamutz tri foiuyn: Kyrie eleison!

Amatuy fratruy! Pregiumz por animu isties povres homnes, quiun Sinioru ell falses mundes carceru hodie salvays, quies corpun hodie nui entericams. Que Sinioru lluin locuz cum favoru en sinun de Abrahamu, Iacobu kay Isacu, que en ultimo jugiu Llui rewiwicuz lluin por commandir lluin dextre inter Lluialy sanctuy kay electituy. Kay anch wuin. Clamate ter: Kyrie eleison!

– Nu? – li demandays, pardonon, demandis, kiam mi estis fininta la legon.

– Mi gratulas! – mi kriis entuziasme. – Tiu ĉi malkovro certe tute konfuzos ĉiujn esperantologojn, kiuj kredis ĝis nun, ke Esperanto estas la verko de Zamenhof. Jen, la embrio de la lingvo ekzistis jam en la mezepoko kaj kaŝe ĝi evoluis sur ĝis nun netrovitaj pergamenoj. Ĉu vi ne serĉos ilin? Ĉu vi ne volas trovi ekzemple la lingvon de la dekkvina jarcento?

– Eble mi trovos ĝin, – li diris reve. – Kaj tiam mi eklaboros! Mi tradukos en la trovotan lingvon la tutan Rabelais kaj la tri dekojn da Groteskaj Rakontoj de Balzac. Ĉu ne, Literatura Mondo eldonos la librojn?

– Ne! – mi diris tute decide.

(El „Lingvo stilo formo")

Ferenc Szilágyi:

Koko krias jam! (originala novelaro)

2-a eldono, Hungara Esperanto-Asocio (1976), 198 p.

Multaj el la pli novaj esperantistoj ne plu havas eblecon akiri verkojn de klasikuloj de la Esperanto-literaturo. Des pli dankinda estas la fotoreproduktado de la majstro-noveloj de Ferenc Szilágyi, aperintaj 1955 ĉe STAFETO, La Laguna, Kanariaj Insuloj. Vilmos Benczik verkis postparolon, el kiu la leganto ekscias riĉajn detalojn pri la aŭtoro, lia vivo kaj verko. (Vidu ankaŭ „Hungara Vivo" 5/1975).

Ferenc Szilágyi (1895–1967) naskiĝis en Budapest, travivis mizeran junaĝon kaj devis elmigri 1938 al Svedio. Sian literaturan karieron li komencis kiel poemtradukisto, sed baldaŭ li famiĝis pro originala prozo, kiu estas interesa simbiozo el beletro kaj ĵurnalismo. Li observas la vivon kaj priskribas la realajn fenomenojn de la mondo sen perdiĝi en mondsavaj filozofioj.

La kruelaĵoj kaj suferoj kaŭze de pluraj militoj kaj la problemoj de elmigrinto forte impresis la aŭtoron kaj liveris la kadron por multaj noveloj. En la centro staras la titola novelo „Koko krias jam", kiu priskribas la animan barakton de Henri Dunant, fondinto de la Ruĝa Kruco.

En la dua parto de la novelaro ne mankas sufiĉe amuzaj okazintaĵoj, parte ligitaj kun Esperanto, ekzemple pri la friponaĵoj de la preserara diablo aŭ pri la strangaj travivaĵoj de hungaro en la nokto de la sveda Luĉia-festo.

La stilo de Szilágyi meritas apartan atenton, sed eĉ komencanto helpe de vortaro certe facile kaj plezure povas legi tiun novelaron kiun mi rekomendas al vi

Linde Knöschke

(Havebla ĉe CLE, 15 markoj)

Recenzo

Duoblan jubileon povis festi la eldonejo „Eesti Raamat", en la 1975-a jaro. Antaŭ 450 jaroj aperis la unua estonlingva presaĵo, kaj nun tuj post la 1975-a jaro la unua ampleksa esperantlingva romano „La Mastro de Korboja" de A. H. Tammsaare, el la estona lingvo tradukita de Benita Kärt kaj redaktita de Henrik Seppik. Antaŭ la okuloj de la leganto estiĝas vivoplena lirika bildo de la Nord-Estonia kampanara vivo dum la jaroj post la unua mondmilito. Sur praarbara fono estas pentrita la emociiga amo inter Villu de Kathu, Evi el la kabano de Kuusiku kaj Anna de Korboja. Oni ne scias, kiun pli kompati, ĉu Evi, la malriĉan junulinon, havanta infanon de Villu, ĉu la mastrinon de Korboja jam ek de la junaĝo senkonscie amanta Villun, aŭ Villun kiu ne kapablas decidiĝi inter la du amindaj virinoj.

La ravigaj priskriboj de la naturo kaj de la brile multkolora johantaga fajro iom mildigas la dramecan evoluon de la tragedio. La romano ricevas per oftaj ripetadoj (kvazaŭ refrenoj) popolkantajn trajtojn, kiuj bone adaptiĝas al la poezia pentrado de la vivo. La klareco de la traduko estas laŭdinda. Tamen mirigas min la uzado de la prepozicio „de" post la verbo „demandi", kio jam delonge ne plu estas kutima. Laŭ socia kaj etnografia vidpunktoj tiu ĉi verko estas inda kontribuo al la Esperanto-literaturo. Mi tre ŝatus ankaŭ konatiĝi kun aliaj romanoj de Tammsaare, kiuj estas „Vivo kaj amo" (1934), „Mi amis germaninon" (1935), „La nova satano de ursangulo" (1939).

A. H. Tammsaare (kun civitana nomo Anton Hansen), diversflanka epikulo, naskiĝis 1878 en nordestona kamparana familio. Post gimnaziaj jaroj en Tartu li komencis sian literaturan agadon kiel prozisto kaj ĵurnalisto, kaj studis juron. Kiel unu el la plej famaj estonaj prozistoj li mortis 1940 en Tallinn. Liaj sociaj kaj filozofiaj konceptoj, profunde influataj de la kriza stato dum la unua mondmilito, kapabligis lin, forte spirite kritiki la burĝan socion kaj poste akre opozicii kontraŭ faŝismo.

H. Sauerbrey

Lingvaj problemoj en Unuiĝintaj Nacioj

La organizaĵoj de Unuiĝintaj Nacioj elspezas milionojn da dolaroj ĉiujare por lingvaj servoj. Lastatempe eldonita UN-raporto[1]) kalkulas, ke en 1976 organizaĵoj en la UN-sistemo sume elspezis $ 105 297 000 por konstantaj kaj laŭbezonaj lingvaj servoj, kio ne inkluzivas nerektajn kostojn kiel oficejojn, ekipaĵon, presadon k.t.p. Unu el la pli malgrandaj organizaĵoj taksis, ke, se ĝi uzus nur unu laboran lingvon anstataŭ kvin, ĝia totala buĝeto estus nur 30 ĝis 40 % de la nuna.
Kiu pagas la lingvajn servojn en la UN-sistemo? Plejparte, la rimedoj disponiĝas el la ordinaraj buĝetoj de la organizaĵoj, kvankam iam tiujn servojn financas koncernaj registaroj. Tio kutime okazas rilate la germanan lingvon, kaj la araboj financis la unuajn tri jarojn de la efektivigo de la Rezolucio 3190, kiu oficialigis la araban en 1973.
La problemoj, tamen, estas ne nur financaj. Ekzistas grava manko de interpretistoj kapablaj traduki el la araba aŭ la ĉina en aliajn lingvojn, precipe en la hispanan aŭ rusan. Oni kutime devas interpreti en tiujn lingvojn „tra" la angla aŭ la franca, kun sekva multobliĝo de eraroj kaj miskomprenoj.
La konkludoj de la raporto estas iom pesimismaj, kaj plej verŝajne la situacio pli malboniĝos. La rekomendoj temas pli pri manieroj regi la problemojn, ol pri manieroj trovi veran solvon; la verkintoj de la raporto proponas, ke la organizaĵoj klopodu limigi la produktadon de dokumentoj je traktebla kvanto kaj rezignu la provon provizi plenajn interpretajn servojn (laŭ la nunaj reguloj, ĉio parolata aŭ skribita interne de UN devas esti tradukita en ĉiujn ses oficialajn lingvojn). Alia propono estas la starigo de „centra provizejo" de interpretistoj kaj tradukistoj, sed ĝi estus tre multekosta afero, ĉar la stabanoj kompreneble devus ofte vojaĝi. Krome estas malfacile antaŭvidi la bezonojn, pro la konstanta ebleco de subitaj ŝanĝoj en la programo de konferencoj. La plej grandan esperon por la estonteco prezentas modernaj metodoj de „faksimilsendado", kiuj ebligas preskaŭ tujan kopiadon de dokumentoj tra iu ajn distanco. Tio ŝparus la elspezon de sendado de granda grupo de tradukistoj al konferencoj.
Malpli kostan kaj pli simplan solvon proponis R. L. Harry, la aŭstralia ambasadoro al UN, parolante al la ĉi-jara kongreso de Asocio por Internacia Studoj en St. Louis, Missouri. Li proponis, ke UN adoptu unu solan interlingvon kaj prezentis 5-jaran planon por la enkonduko de la internacia lingvo Esperanto.
Pliajn informojn liveras laŭbezone UEA.

(Internacia gazetara servo, decembro 1977, n-ro 71)

[1]) UN-dok. A/32/237

Novaĵoj el Rumanio

Kvankam ankoraŭ neoficialigita, la E-movado en Rumanio disvolĝiĝas kontentige, se oni farus komparon kun la situacio de antaŭ kelkaj jaroj.
El la agado dum la lasta tempo oni povas citi jenon:

1. Funkciis kursoj en la urboj Bukureŝto, Braŝov, Kluj-Napoka, Timiŝoara. La kurso en Timiŝoara kaj unu el la bukureŝtaj kursoj funkciis en la lokaj universitatoj.
2. En revuo „Napoka Universitară" aperas E-kurso de Adrian Krengăliŝ.
3. La e-stoj en Kluj-Napoka estigis sekcion de E-biblioteko ĉe la granda urba biblioteko.
4. La 28-an de aŭgusto en Braŝov, okazis simpozio je temo „Lingvo kaj kulturaj rilatoj". Pri diversaj objektoj parolis ses kompetentuloj. La simpozion ĉeestis 50 e-stoj el Bukureŝto, Braŝov k.a. Ĝi estis gvidita de C. Apriotesei, universata lekciisto el Timiŝoara.
5. En la konferenco de E-medicinistoj, okazinta en julio 1977 en Krakovo (Pollando), el Rumanio partoprenis d-ro Konstantin Kornesku, kiu ricevis specialan diplomon pro sia parolado. Prelegon sendis al la konferenco ankaŭ s-ano d-ro Gabor Lazar el Kovasna.
6. Ĉi-jare en la jubilea Pupteatra Internacia Festivalo (PIF) en Zagrebo partoprenis du rumanaj pupteatroj: el Kluj-Napoka, gvidata de Julia Sigmond, kaj el Bakau, gvidata de prof. Aurel Boia.
7. En septembro 1977 la Bukureŝta Radiostacio disaŭdigis intervjuon kun la universitata lekciistino Ioana Apriotesei pri la E-kurso, okazinta ĉi-jare en la Bukureŝta Universitato.

(Bulgara Esperantisto 12/77)

Recenzo:

„el Streĉita Kordo"

de K. Kalocsay

„. . . forpasis la poet' giganta –
forpasis nia Kalocsay!
Sed ne! Per siaj versoj-flamoj
eterne vivos la poet' . . .
Per siaj kantoj – brilaj perloj –
kun ni surtere vivos li! . . ."

Tiel prikantas poeto Asen Grigorov sian forpasintan poeto-kolegon. Kiel li pravas! Kalocsay vivas kun ni surtere. Des pli, ke Hungara Esperanto Asocio nun prezentas al ni modestan kolekton el lia dua, 1931 aperigita, poemlibro „Streĉita Kordo".
Sur 26 paĝoj troviĝas 10 poemoj, kiuj estas laŭ V. Benczik „ne nepre la plej bonaj pecoj de tiu verslibro – la elekto simple respegulas la personan preferon de mi". . .
La titoloj de ili tekstas jene:

Mortis Grabowski
Kongresa Runo
Versoj leoninaj
En amara horo
Iras abiturient'
Ŝi amas min
Patrineco
Familiopatro
Maljuna fraŭlo
Infanoj ĉe montrofenestro.

Senteblas, ke la streĉita kordo ankoraŭ vibras. La nuna juna generacio povas ekkoni, ke la „poet' giganta" jam frue disponis pri pasia, akra, komprenema, realisma kaj amara esprimkapabloj. Lia poezia talento ankaŭ montriĝas en la „ne nepre plej bonaj specoj".
Oni ne postulu klasifikadon de la 10 poemoj!
Ĉu klasifiki laŭ majstra lerteco?
Ĉu laŭ animsento aŭ tutsimple laŭ traktita enhavo?
La esperantistoj mem legu la poemojn! Certe iu kordo en ĉies animo estos vibrigota.
Mia patrina koro estas tuŝita de „Infanoj ĉe montrofenestro".
Sed aliflanke ankaŭ ravigas min „Maljuna fraŭlo".
La legantoj mem juĝu!
Sed neniu preteratentu la liniojn el la „Versoj leoninaj":
„Revu ne sonĝe kaj pale,
sed revu agante, reale . . ."
Danke ni akceptas la kolekton.

H. Sauerbrey

Forpasis Rudi Graetz, la prezidanto de la MEM-Sekcio de GDR



Rudi Graetz, kiu estis membro de la Packonsilantaro de GDR, subskribis la Alvokon de Stokholmo.

La nomo Rudi Graetz estas intime ligita ne nur kun la Esperanto movado en GDR sed ankaŭ kun MEM.
Rudi Graetz, kiu forpasis neatendite la 1-an de oktobro 1977, jam kiel juna laboristo, en la kadro de la germana laborista esperantista movado agadis kontraŭ imperiisma milito, por paco kaj humanismo. Kiu ne memoras liajn paroladojn kaj diskutkontribuojn dum la internaciaj MEM-kunvenoj kadre de la Universalaj Kongresoj aŭ dum la Ĝeneralaj Konferencoj de MEM? Ĉiam trankvila, neniam altrudema, li esprimis sian opinion pri gravaj aktualaj taskoj de la pacbatalo. Ofte li kontribuis en la GDR-numeroj de „Paco". Lia speciala kampo estis la arabaj landoj, kien li ankaŭ havis profesiajn ligojn.
La MEM-laboro por li estis korafero. Li bone komprenis la aktuale daŭre graviĝantan agadon kaj prestiĝon de MEM kaj kelkfoje povis persone paroli pri MEM-aferoj kun la prezidanto de la Monda Packonsilantaro Romesh Chandra.
Impresa estis tiu persona ĉarmo en la personeco de Rudi Graetz, tiu mildeco kun samtempa serioza celdirekteco. Rudi Graetz ne plu estas inter ni, sed nia memoro pri li restos hela.

MEM-sekcio de GDR

Recenzo

W. Auld, J. S. Dinwoodie, J. Francis, R. Rossetti: Kvaropo; dua eldono, Hungara Esperanto-Asocio, Budapest 1977, 256 p.

Per la dankinda reeldono de la ĉi-supre indikita libro, kies unua eldono farita 1952 de la fama eldonejo „Stafeto" jam delonge ne plu haveblis, Hungara Esperanto-Asocio havigas al la nuna generacio de esperantistoj la eblecon konatiĝi kun la verkoj de kvar poetoj, kiuj elstaris baldaŭ post la dua mondmilito kaj formis la ligilon al la antaŭmilita periodo, daŭrigante kaj pluevoluigante ties plej gravajn poeziajn valorojn. La kvaropo sin mem prezentas en enkonduka „Manifesta Balado" kiel skota skolo. Sed ĉar la kvar aŭtoroj post la apero de Kvaropo ne plu publicis ion komunan kaj ĉar krome ili tre diferencas laŭ karakteroj, temaro, politika kaj mondkoncepta pozicio kaj efiko al la Esperanto-literaturo, ekzistas duboj, ĉu vere oni povas paroli pri „skolo". Verŝajne Vilmos Benczik, kiu aldonis al la dua eldono tre legindajn postvortojn, pravas en sia pritakso, ke tiu ĉi skolo estas nur fikcia.
La esperantiston, kiu nun ekprenos la libron, tia literaturhistoria rezonado ne tuŝos, ĉar nun kiel antaŭe lin kaptos la enhava beleco kaj profundeco kaj la formala kaj lingva majstreco de la poeziaĵoj, kiujn li trovos en Kvaropo. Tio certe ne surprizos lin rilate la poemojn de W. Auld (Spiro de l'pasio; preskaŭ unu duono de la libro), ĉar post Kvaropo W. Auld ja evoluis al unu el la plej elstaraj personoj en la Esperanto-literaturo kaj estas konata tra la tuta Esperantujo. Sed jam en tiu ĉi komenca verko li montriĝis tiel, kiel lin konas la nuna generacio, kiel esence socia poeto kun simpatio al la politika maldekstro, kiu reprezentas novtipan modernan esperantismon kiel parton de sia mondkoncepto.
De John S. Dinwoodie en la libro troviĝas la poemaro „Kastelo el revoj", kies eroj ĉerpas el du fontoj, el la kristanismo kaj el la amo al la naturo kaj la homo. La poemoj distingiĝas per lirikeco kaj, speciale la ampoemoj, per tenereco kaj ofte pritraktas etikajn temojn. Certe estas bedaŭrinde, ke tia talenta poeto ne plu verkis originale post la apero de Kvaropo.
„La Kosmo", poemaro de John Francis, estas himno pri la grandiozeco kaj senfineco de la universo. Tiun himnon, en kiu la homo ludas ja gravan, sed ne regantan rolon, la poeto prezentas en tre preciza kaj samtempe elvokiva lingvo, kiu karakterizas lin kiel intelektan kritikeman verkiston.
En la poemaro „Oazo" de Reto Rossetti la leganto trovas poemojn de tute alia karaktero, kiuj prezentiĝas kiel ludo kaj fonto de belo kaj ĝuoj, intence evitante intelektecon kaj profundecon, sed ne socian engaĝiĝon, kaj distingiĝas per lingva majstreco. Menciinde estas, ke gravan parton de tiuj poemoj Rossetti jam verkis inter la du mondmilitoj, per tio pruviĝante kiel la „patro de la skota skolo" kaj demonstrante la kontinuecon de la literatura procezo en Esperantujo.
Entute Kvaropo estas nepre rekomendinda al ĉiu, kiu ŝatas poezion kaj scipovas aprezi kaj ĝui lingvajn frandaĵojn.

D-ro Karl Schulze

Eminentulo de Esperanta tradukarto – Sergej Grigorjeviĉ Rubljov

Li naskiĝis en Odeso la 14-an de januaro antaŭ 77 jaroj. Entuziasmigite de sia patro, kiu mem estis kemiinĝeniero, post la gimnaziaj jaroj li studis kemion ĉe la universitato de Odeso ĝis la jaro 1924. Post tio li mem instruis tie ĝis la jaro 1929. Tiam li komencis labori en la uzino por lakoj kaj farboj, kie li dum 20 jaroj gvidis la centran laboratorion. Ĝis la pensiuliĝo li estis aktiva noviganto, faris multajn inventojn kaj sciencajn publikigaĵojn. Pro tio la registaro de Ukraina Socialisma Sovetrespubliko en 1964 distingis lin per la titolo „Merita Inventisto de la Respubliko".

Sed tiu meritplena sciencisto fariĝis ankaŭ eminenta esperantisto. Kiel 17-jarulo li trovis en la libroŝranko de sia patro la lernolibron de Zamenhof, kaj tiu lingvo tiom impresis lin, ke li ellernis ĝin dum du semajnoj. Jam de 1921 ĝis 1929 li estis unu el la gvidantoj de la Esperanto movado en Odeso. De 1925 ĝis 1928 li estis membro de la Centra Komitato de Sovetunia Esperantista Unuiĝo (SEU) kaj de ties Lingva Komitato, kaj en 1929 li eĉ fariĝis membro de Internacia Lingva Komitato.

La ĉefa kampo de lia Esperanto-agado estis kaj estas la tradukado, sed li skribis ankaŭ lernolibron, vortarojn, prilingvajn artikolojn. Lia plej granda sukceso laŭ la eldonkvanto estis la lernolibro „Kruĵok Esperanto" („Esperanta Rondeto"), kiu aperis en du partoj (la I-a por lernantoj kaj la II-a por instruistoj). La rusa eldono de la I-a parto atingis de 1927 ĝis 1936 ok eldonojn kun entute 110 000 (!) ekzempleroj. Tiu ĉi libro, kiu ricevis i.a. favoran mencion de la Internacia Pedagogia Instituto „Jean Jacques Rousseau" (Svislando), aperis ankaŭ en ukraina, germana, franca kaj bulgara eldonoj. Interesa por la interlingvisto certe estas liaj prilingvaj artikoloj, kiel ekzemple „La Esperantaj radikoj" (ruse) en „Meĵdunarodnij jazik", Moskvo 1925–26, n-roj 5, 6, 7; „La provo pri kvanta analizo de Esperanto" (ruse) en „Izvestija CK SESS" (informilo de CK de SEU), Moskvo 1926–27, n-roj 5–6, p. 166–173; „Pri la problemo de grafiko en Esperanto-instruado" (ruse) en „Mejdunarodnij jazik", Moskvo 1926–27, n-roj 3–4, p. 127–128; „Paĝetoj de sistemvortaro" en „Izvestija CK SESS", Moskvo 1926–27, n-roj 2–12.

Kiel sciencan literaturon, tradukitan de li, ni menciu nur du librojn de la fama soveta mineralogo Aleksandr Jevgenjeviĉ Fersman, kunfondinto de la moderna geokemio kaj tiama vicprezidanto de Soveta Akademio de Sciencoj, nome: „La kemio de universo", Lajpcigo 1925 kaj „La vojo al scienco de estonto", Parizo 1928. Ambaŭ esperantlingvaj eldonoj entenas specialan antaŭparolon de Fersman.

En 1929 aperis la esperantlingva eldono de la romano „Ruĝa stelo" de A. Bogdanov, kiun kolektive tradukis Rubljov kaj aliaj odesaj esperantistoj. Versaĵoj tradukitaj de li enestas en la verskolektoj „Per plena voĉo" de V. Majakovskij (1930), „Versoj elektitaj" de S. Jesenin (1965) kaj „Liriko" de L. Ukrainka (1971).

Bedaŭrinde la plej multaj verkoj de tiu eminenta tradukisto ankoraŭ atendas la eldonon, i.a. pli ol 500 versaĵoj el la ĉirkaŭ 600 de li tradukitaj el la rusa klasika poezio (ekzemple de Lermontov, Nekrasov, Majakovskij, A. Tolstoj kaj multaj aliaj). Same atendas la eldonon ĉiuj fabloj de Krilov, pri kies eldono interesiĝas la eldonejo STAFETO, la „Kupra Rajdanto" kaj „Eŭgen Onegin" (5 200 verslinioj!) de Puŝkin, la romano „Malvivaj animoj" de Gogol, „Struktura vortaro de Esperanto", entenanta preskaŭ 6 000 radikvortojn, „Laŭsona vortaro de Esperanto", entenanta pli ol 30 000 vortojn laŭ nova alfabeta ordo kaj „Leksikono de proksimaj formoj". „Laŭ siaj poeziaj eblecoj Esperanto estas mirinda lingvo", diris Rubljov. „Majakovskij povus envii nin, ĉar ni havas senlimajn eblojn de vortfarado. Pro tio oni povas trovi vortojn por la traduko, kiuj ekzakte respegulas la nuancojn, kaj oni povas transpreni harmonion kaj sonon de la verso." Tion li pruvas per brilaj tradukoj, kiel ekzemple jena fablo de Krilov:

La Fringelo kaj la Kolombo

Kaptilon pro hazard' ektrafis la
fringel'.
La malfeliĉa bird' baraktis kaj
batalis.
Sed la kolomb-junul' al ĝi kun mok'
moralis:
„Jen kia hont'! Dum tago hel'
kaptilon falis!
Ne trompus min simila malfidel'.
Mi tion garantias ĝuste!"
Sed jen kolombo mem baraktas en
kaptil'.
Do juste!
Al fremda malfeliĉ' ne moku kun
facil'!

Ni gratulas al la jubileulo elkore okaze de la 60-a datreveno de lia esperantistiĝo kaj esperas plejeble baldaŭan eldonon de pluaj liaj tradukoj.

Kompilis K. D. Dungert

Recenzo

SLOVAKA ANTOLOGIO; Slovaka Pedagogia Eldonejo, Bratislava 1977; 538 p.

Laŭ la difino en PIV antologio estas kolekto da mallongaj aŭ mallongigitaj prozaj aŭ poeziaj pecoj, kompilita el la beletra vidpunkto. Certe la supre anoncita libro estas tiusence antologio, sed ĝi estas multe pli multe, ĉar la prezentitaj pecoj estas kompilitaj ne nur laŭ beletra, sed ankaŭ kaj antaŭ ĉio laŭ historia, speciale literaturhistoria vidpunkto. Tiel rezultiĝis kompleta superrigardo super la slovaka literaturo de ĝiaj komencoj en la 9-a jarcento ĝis en la nuntempo. Krome, kaj jen la speciale alta valoro de la libro, la elektitaj literaturaĵoj estas prezentitaj ne nur per si mem, sed ilin akompanas informoj literatursciencaj, literaturkritikaj kaj biografiaj. Tiuj informoj estas donitaj en formo de enkonduka eseo „La slovaka literaturo en kunligo kun la monda" kaj en formo de t.n. medalionoj, koncizaj prezentadoj de la unuopaj aŭtoroj, ties vivo, evoluo, verkoj kaj signifo. Per tiuj informoj la Slovaka Antologio prezentiĝas kiel kompendio de la slovaka literaturo kaj, ĉar la literaturo estas traktata ne izolite, sed ĉiam en ĝiaj koneksoj kaj interrilatoj kun sociaj kaj politikaj cirkonstancoj, eventoj kaj strebadoj, ankaŭ kiel kompendio de la slovaka historio ĝenerale. La valoro de tia prezentado por la ne-slovaka leganto estas tute ne supertaksebla. Ja en la mez- kaj okcidenteŭropaj popoloj kaj certe ankaŭ aliloke la konscio pri la slovaka popolo kiel memstara etna unuo kun propra historio, kulturo kaj literaturo estas nur tre malforte evoluita, certe kiel sekvo de la fakto, ke la slovakoj dum pli ol mil jaroj estis ŝtate ne memstaraj kaj ankaŭ poste eniris la novan etapon de sia historio je la flanko de siaj ĉeĥaj fratoj, tiel ke en la mondan publikon ja eniĝis la konscio pri la unueco de tiuj du frataj popoloj, sed ne la scio pri la fakto, ke ambaŭ popoloj nun formantaj la ĉeĥoslovakan ŝtaton dum longaj jarcentoj evoluis apartigite kaj dife-

rence kaj pro tio eĉ nun ekzistas diferencoj en kulturo, literaturo kaj alikampe.
La ekesto de la Slovaka Antologio ŝuldiĝas al grupo da slovakaj esperantistoj-aktivuloj, kies agado, tamen, povas esti vidata kaj ĝuste pritaksata nur sur la fono de la jam ofte pruvita, alta kultura aktiveco de la slovaka esperantistaro entute. En tiu grupo de aktivuloj specialan lokon evidente okupas Jozef Vel'ký, kiu ne nur elektis la prezentitajn literaturaĵojn, sed krome verkis la menciitan eseon kaj ĉiujn (91!) medalionojn, konsterne ampleksa, sed ege merita laboro. Ĉar mankas alidirektaj indikoj, oni devas supozi, ke Velký verkis la eseon kaj la medalionojn originale en Esperanto. Do oni povas prave vidi en tio valoran kontribuon al la originala Esperanto-literaturo, ĉi-foje en la kampo de la literaturhistorio.
La traduko de la prozaĵoj kaj poeziaĵoj en la Slovaka Antologio estas grandfaro de la kolektivo el sep tradukintoj, kiuj meritas esti prezentataj ĉi tie: Jiří Kořínek, Štefan R. Seemann, Pavel Rosa, Magda Šaturová-Seppová (samtempe redaktorino), Miloŝ Lukaŝ, Eduard V. Tvarožek, Jan Valaŝtan-Dolinský. Ili ĉiuj plenumis sian ampleksan kaj ne facilan taskon de la tradukado kun granda sukceso, prezentante al la legantoj modernan, fluan lingvaĵon. Ja estas kelkaj apartaĵoj, kiuj iomete frapas la atenton, ekz. la regula uzado de ‚konatulo' (anstataŭ simple ‚konato'), de ‚aliu' (jam de Zamenhof nomita kontraŭregula), de ‚ĉagrenigi' (‚ĉagreni' jam estas transitiva), de ‚pli poste' (pleonasme, ĉar ‚poste' jam havas komparativan sencon – pli malfrue). Krome troviĝas kelkaj nenecesaj naturalismaj neologismoj, ekz. ‚protekcio' kaj ‚koncepcio' (anstataŭ ‚protekt(ad)o' resp. ‚koncept(ad)o'). Kaj oni povus disputi, ĉu la neceso trovi rimon pravigas tiajn formojn kiajn ekz. ‚larmsena' (inverso de ‚senlarma'!) kaj ‚vagulas' (anstataŭ ‚vag(ad)as'). Sed ĉio ĉi estas bagateloj laŭ nombro kaj graveco, kiuj tute ne malplialtigas la kvalitan nivelon de la enorma traduklaboro.
Entute oni nepre devas varme bonvenigi la Slovakan Antologion kiel veran, tre dankindan pliriĉigon de la Esperanto-literaturo. Ĝi estas plia pruvo pri la efikeco, per kiu Esperanto povas plenumi sian kulturan mision interkonatigi kaj alproksimigi la popolojn per perado de iliaj kulturaj manifestiĝoj.

D-ro Karl Schulze

Redakta komitato

Violin Oljanov (Bulgario) – ĉefredaktoro
D-ro Detlev Blanke (GDR)
Kimiaki Kurita (Japanio)
William Gilbert (Francio)
Stanislaw Świstak (Pollando)
Oldrich Knichal (ĈSSR)

Kien skribi?

Prezidanto: Nikola Aleksiev, str. Nezabravka 1, vhod II, 1113 Sofia, Bulgario

Vicprezidantoj: D-ro Magomet Isaev, Prosp. Kalinina 14, Moskva K-9, USSR
D-ro Renato Corsetti, Via Strabone 1, 00176 Roma, Italio

Ĉefredaktoro: Violin Oljanov, str. Bojanski Vodopad 24 I E, 1680 Sofia, Bulgario

Generala sekretario: William Gilbert, 30 rue Croix-Montoire, 37100 Tours, Francio

Sekretarioj: Hideo Kumaki, Minamihara 1213–4, Ninohukuro, Togane-si, 283 Japanio
Drahomir Kočvara, str. Hasičska 50, 70500 Ostrava-Hrabuvka, ĈSSR

Centra administrantino: Vasja Petrova, Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 Sofia, Bulgario

Centra kasisto: Pierre Jouvin, 14, rue Thiers, 76120 Grand Quevilly, Francio, Poŝtkonto CCP – Rouen 102–45 P

Grave:

Abonpagojn el socialismaj landoj sendu al 1303 Sofia, bulv. Ĥristo Botev 97 – (por „Paco"). El nesocialismaj landoj – al la adreso de la Centra kasisto.
Pri eldonotaj landaj numeroj de la revuo turnu vin al Helmut Fuchs, Hohe Str. 33, 83 Pirna, GDR.

Abonprezo:

Por nesocialismaj landoj – 20 fr. fr. aŭ egalvaloro. Por socialismaj landoj – laŭ la subaj indikoj:

Aŭstrio:
A. Sindl, A-3108 – ST.-PÖLTEN, Wagram, Altmanngasse 22

Belgio:
Glady Claude, 21, Rue Kessels, 1030 BRUSELO

Britio:
P. Hewitt, Saltram cose, Nythe, Wilts. SN3 3PH. SWINDOW

Bulgario:
Bulgara MEM-Komitato, bulv. Hristo Botev 97, 1303 SOFIA 3 levoj.

Ĉeĥoslovakio:
Ĉeĥa Esperanto-Asocio, MEM-sekcio, Jilska 10, 110 00 PRAHA 1 30 kr.

Danlando:
Egon Starup, Brovaenget 26, DK 2700 KOPENHAGO BRH.

FRG:
Roland H. Hegen, Schloßgasse 30, D-6731 ELMSTEIN 2 (Igelbach)

Finnlando:
Erkki Järvinen, Ukonkivenpolku 2-1-68, 00440 HELSINKI-44

Francio:
Fédération Espérantiste du Travail, 179, rue Ordener, 75018 PARIS (p. ĝ. k. Paris n-ro 902-52)

Germana Demokratia Respubliko:
Centra Laborrondo Esperanto en Kulturligo, Charlottenstr. 60, 108 Berlin 10 M

Okcidenta Berlino:
S-ano Manfred Kossolobow, 1 BERLIN, Tapiauer Allee 2

Hungario:
Hungara MEM-Komitato, H-1368 BUDAPEST, 5, pf. 193 36 f.

Italio:
Mauro La Torre, via de Carolis 119, I-00136 ROMA (p. ĝ. k. 1/44162).

Japanio:
Ĉe Yasuo Satoo, 777 OOIZUMIGAKUENTYO, Nerima-ku. 177 (Japana Pacdefenda Esperantista Asocio).

Kubo:
Oscar Otero, Havana Esp.-rondo, Poŝtkesto 314, HABANA 1.

Norvegio:
Olav Reiersol, Minister Ditleffs vei 20 – OSLO 8

Pollando:
RUCH – WARSZAWA.

Rumanio:
S-ino Irma Fülop, str. Calan 12, etj. 1, SIBJU

Socialisma Respubliko Vjetnamio:
Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, 68 Ly Thuong kiêt, HANOJ.

Sovetunio:
Unuiĝo de sovetaj societoj pri amikecaj kaj kulturaj rilatoj kun aliaj landoj, prosp. Kalinina 14, MOSKVA K-91.

Svedio:
Tomas Jansson, Studentstaden 15-235, S-752 33 UPPSALA

Usono:
Jim Deer, 11905, SW Settler Way Beaverton, Or. 97005

Aliaj landoj:
Bv. turni vin al unu el la ĉi-supraj adresoj, aŭ al Pierre Jouvin.

Redaktoro de la GDR-numero 1978:
d-ro Detlev Blanke

Eĉ tio okazis

Tentistino

Regule ĉiumonate la leterportisto al 41-jara vendistino Rita en New York transdonis 3 000 dolarojn. Je scivolema demando de sia najbaro la damo respondis malkaŝe, ke oni partopage pagas al ŝi pli grandan heredaĵon. Rita nelonge poste decidis edzigi sian najbaron. Post la edziĝa festo ŝi konfesis al li, ke tiuj 3 000 dolaroj estas tuta ŝia ŝparaĵo. Ŝi transpagis ilin ĉiam denove al si mem por provoki atenton.

La novedzo kolere hastis al divorca juĝisto kaj plendis pri malica trompo. Sen sukceso. La juĝejo decidis: Virino rajtas uzi iun ajn armilon por kapti edzon.

Ofic-ofendo

En Toulouse, Francio, Jean Garnier absolute malsukcesis en la buŝa parto de la ekzameno por la ŝofora licenco. Je la demando „kio estas movebla obstaklo?" li estis respondinta: „Trafikpolicisto."



Ĉi-tiu numero estas bulteno de la MEM-sekcio de Germana Demokratia Respubliko, DDR - 108 Berlin, Charlottenstr. 60, telefono 2 20 29 91

Bulgario

Nadejda Demireva 4230 Asenovgrad, str. „Ilinden" 28, 40j., dez. kor. pri literaturo, kol. bk.

Gesamideanoj el 8600 Jambol, dez. kor.: Miroslava Nedelĉeva Koeva, str. Stidovska 11

Mitoŝka Stojanova Buhova, str. Proletarska 35

Zafira Ivanova Stoeva, str. Stidovska 20

Galja Georgieva, str. Kovaĉite 3

Radka Georgieva Janĉeva, str. Rosica 67

Vesa Kostova Krâsteva, str. Alen Mak 22

Galina Stojanova Petkova, str. Gr. Ignatiev 70, vh. 5, ap. 35

Todorka Iv. Stefanova, str. Gr. Ignatiev, bl. 74, vh. A, ap. 14

Krasimira Banova, str. Strahil 2, vh. 5, ap. 16

Denĉo Koev, str. N. Petrini, bl. 38, vh. 8, ap. 50

Angel Kânĉev, str. Ĉepelare 7

Posica At. Ruseva, str. Rakovski 41, ap. 9

Krasimira St. Todorova, str. Marin Brinov 12

Snejana Georgieva, str. Gr. Ignatiev 40-A, vh. B, ap. 62

Dorina Iv. Todorova, str. Gr. Ignatiev 40-A, vh. 5, ap. 27

Nadejda Stoilova Ivanova, str. Orava 29

Jivka Dimova Gospodinova, str. Mramorno More 34

Snejana Hristova, str. Tolbuhin 173

Dimitrina Popova, str. Prof. Nojkov 67

Mladenka Geĉeva, str. Buzluĝa 5

Germana Demokratia Respubliko

Komencanto, 34j., poŝtisto, dez. kor. pri ĉ. t. kun ĉ. l.: Horst Isensee, Klara-Wieck-Str. 32, DDR - 7024 Leipzig

Hungario

Lernanto, 14j., dez. kor., kol. bk, insignojn: Béla Faragó, 5123 Jaszárok Szállás, Szamuely u. 5

Lernantino, 14j., dez. kor. k. gejunuloj, kol. bk, insignojn, librojn: Eva Faragó, H-5123 Jászárok Szállás, Városkert ut. 22

Kuba

Esperanto-rondo, Mezlernejo V. I. Lenin, Carretera las Guasimas km 3½, La Habana, dez. kor. k. gejunuloj de socialismaj landoj p. ĉ. t., prec. pri la XI-a Monda Festivalo de la Junularo.

Portoriko

Consuelo Gotay, Apartado 22915 – U.P.R. San Juan, Puertorico-00931, gravuristino, dez. interŝanĝi kopiojn de gravurajoj, librojn kaj informadon pri grafikartoj k. plastiko alilande.

Pollando

90 gejunuloj, 16–19j., de la Skolta Esperanto Klubo ĉe urba Kulturdomo Lubeltschi Dom Kultury, str. Pstrowskiego 12, 20-007 Lublin, dez. kor., interŝanĝi bk

Leszek, Remus, ul. Strzelecka 8 F/2, 77-330 Czarne, 15j., dez. kor. kun germanaj esp., kol. bk, prospektojn

Terese Surmacz, 20-711 Lublin, ul Launy 5, dez. kor. k. gejunuloj

Lernanto, 19j., dez. kor. pri aŭtomobiloj, motorcikloj, kol. prospektojn, fotojn de aŭtomobiloj: Zbigniew Grzeszczak, 58-200 Dzierzoniow, ul Okrzei 16/11, woj. Walbrzych

Maria Kasperkiewicz, 34-130 Kalwana Zebzydawska, ul Bernardynska 9, reg. Bielsko Biala, 17j., dez. kor. pri muziko, kol. bk.

Romuald Lis, 99-400 Łowicz, os. Bohaterow Walk n/Bzuraj 1939r, st. 9, m 23, 19j., dez. kor. pri matematiko, fiziko, sporto, muziko, kun geesp. el GDR

Michal Cwirbut, Powstr. Slask 9/51, Bl. 4, 85-665 Bydgoszcz, dez. serioze kor. k. filatelisto el GDR

Helena Borecha, ul. Radosna 22/1, 53-336 Wroclaw, 26j. dez. kor. k. geesp. el GDR pri muziko, biologio, arkeologio, turismo

Waldemar Kozlowski, str. A. Rewol. Paźdz. 230, 43-100 Tychy, dez. kor. tutmonde pri ŝako

Ryszard Stempień, 59-840 Zawidów, ul. C. Sklodowskiej 9, 24j. dez. kor. pri sporto, filatelio, filmo, moderna muziko, turismo

Komencanto, 27j., dez. kor.: Andrzej Kosinski, ul. Sieniawska 17/13, 68-200 Zary

26 jaraĝa studento, aktivulo de junulara esp. mov. dez. serioze kor. tutmonde pri ĉ. t. prec. k. sovetanoj: Walter Zelazny, Obr. Stalingradu 43 I m. 118, 35-078 Rzeszów

Mieczysław Porowski, ul. Dambionia 133/15, 45-774 Opole, 31j., dez. kor. tutmonde pri muziko, turismo, kol. pm, bk, gramofondiskojn

Instruisto, 29j., dez. kor. pri sporto muziko, filmo: Teper Zygmunt, Nałeczow 24-140, ul. Lipowa 11

Lernantino, 16j. dez. kor. pri muziko, libroj, turismo, kol. pm. bk, diskojn: Charlotta Kutnik, Os. Wieczorka 31/9, 42-640 Piekary Slaskie

Krzysztof Starbis, 23-400 Bitgonoj, ul. B. Prusa 38a, woj. Zamojskie, dez. kor. pri sporto, literaturo kun germanaj esp.

Małgorzata Gendera, ul. 1 maja 5/1, 63-400 Ostrów WLKP, 19j. dez. kor. pri libroj, filmoj, turismo, muziko, kol. fotojn

Grazyna Kopańska, ul. Bobrownicka 30, 57-330 Dzczytna, 23j., dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, turismo, sporto, pentroarto, kol. bk

Stawomir Ruszkiewicz, ul. Kossaka 19/6, 67-100 Nowa Sol, 18j., dez. kor. tutmonde

Ryszard Spempień, ul. C. Sklodowskiej 9, 59-840 Zawidów, dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, sporto, kino, turismo, filatelio, kol. pm, bk.

Ryszard Szczygiek, ul. Szeroka 24, 67-115 Bytom Odrzański, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. turismajn prospektojn, pm, bk

Miroslas Gonciarz, Ninków 15, 26-422 Borkowice woj. Radom, 27j., dez. kor. k. germanaj esp. pri sporto, turismo

Lernanto, 17j., dez. kor. tutmonde: Ryszard Urbanowicz, ul. Rewolucii 1905 r. nr. 82/95, 95-100 Zgierz

Tom Mańkowski, ul. Armii Czerwonej 11, 81-849 Sopot, 18j., dez. kor. pri ĉ. t. prec. sporto, kol. bk

Dez. kor. Robert Wydornik, 93-247 Lodzo, str. Felinskiego 13/24, 16j.

Zbigniew Niewiadomski, Gdansk-Lipce, ul. Jedności Robotniczej, 334/2 dez. kor. k. germanaj geesperantistoj pri moderna muziko, literaturo

Edvard Drozd, str. Orzeszkovej 9 E/11, 83-110 Tczev, 17j., dez. kor. k. esp. el GDR pri muziko, kol. bk

Elwira Podleś, ul. Kościelna 1, 07-200 Wyszków, 21j. dez. kor. k. germanaj geesp. pri muziko, literaturo, sporto, teatro

Lernantino, 15j., dez. kor. pri naturo, muziko, kol. pm, bk: Beata Bienik, Przemyslów 4, 99-441 Ztaków Kóścielny, woj. Skierniewice

Malgorzata Botner, 22-300 Krasnystaw, ul. Okrzei 24a, bl. 3/7, 18j., dez. kor. pri moderna muziko, kol. bk

Junulo, 20j., dez. kor. k. germanaj fraŭlinoj 18–21j. pri belarto, junularaj aferoj, kol. pm, bk, sonbendojn: Wojczech Chruszcz, 02-143 Warszawa, ul. Zwirni 1 Wigory 17a m 6

Oficisto dez. kor. kun geesp. el GDR pri ĉ. t. kol. bk: Wladyslaw Brodnicki, 80-366 Gdansk, ul. Lumumby 44R/4

Maria Stramor, 31-733 Pikulice, Kupiatyĉe 44, 23j., dez. kor. k. germanaj esperantistoj.

Lucyna Koczka, Równia 30, 38-700 Ustrzyki D., 14j., dez. kor. k. gejunuloj

Zofie Kozokiemicz, Barszczónke 34, 18-121 Trypucie woj. Bialystok, 22j., dez. kor. k. germanaj esp. pri muziko, sporto, literaturo, filmo, teatro

Małgorzata Flis, ul. Rutkowskiego 10/34, 20-243 Lublin, 17j., dez. kor. pri biologio, literaturo, sporto

Oficisto, 24j., dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, kino, teatro, kol. pm, bk: Ryszard Cieslik, 59-414 Dobromierz, str. Kościelna 1a, woj. Walbrzych

Komencantoj dez. kor.: Jadwiga Pionkowska, 13-200 Działdowo, str. Sportowa 6, 23j.

Janina Wozniak, 13-200 Dzialdowo, str. W. Jagiely, 46 m 4, 20j.

Miroslawa Gawlinska, 13-200 Dzialdowo, str. Jagielly 34 m 1, 24j.

Daniela Maleryk, 13-200 Dzialdowo, str. Jagielly 42A, pr. 1, 22j.

Maria Maleryk, 13-200 Dzialdowo, Polskie Koleje Panstwowe, woj. Ciechanov, 24j.

Mark Truszkowski, 09-500 Gostinin, ul. Gabinska 39, woj. Plockie, dez. kor. k. germanaj geesp.

Marek Ulanowski, 42-640 Piekany 51, ul. Bytomska 92/22, 20j., dez. kor. k. geesp. el GDR

Jolanta Dorozińska, ul. 1 Maja 25, 97-500 Radomsko, 15j., dez. kor. pri moderna muziko

Aleksander Niziolek, ul. Bohaterów Warszawskich 1a, 41-800 Zabrze, Techn. Przem. Garow, 20j., dez. kor. k. germanino pri literaturo, muziko

Anna Grosicka, ul. Piastów 3/12, 86-050 Solec Kujawski, 19j., dez. kor. k. gejunuloj pri sporto, moderna muziko, turismo

Krystyna Adamek, Siemianowice 3, ul. Pokoju 3, 41-103, 22j. dez. kor. k. germanaj geesp. pri muziko, literaturo, filmo

Edward Matysiak, 42-573 Bedzin, ul. Łaptosa 42/1, 23j., dez. kor.

Elzbieta Salata, Kozia Wola 197, 26-220 Staporków, woj. Kielce, 17j. dez. kor. tutmonde

Elzbieta Grebicka, 87-616 Radomice, woj. Włocławek, 19j., dez. kor. tutmonde

Andreo Pydiys, 20-128 Lublin, ul. Bieruta 18/82, 22j., dez. kor. tutmonde k. esperantistinoj pri sporto, muziko, teatro

Zbigniew Szczudlak, 62-041 Puszczykowo, ul. Gajowa 13, dez. kor. kun germana junulino pri sporto, literaturo, muziko

Stanislawa Romaszkan, Debina 27, 05-152 p. ta Czosnów, 46j., dez. kor. tutmonde

Instruisto, 23j., dez. kor. tutmonde pri moderna muziko, sporto, turismo, kol. pm. bk, gramofondiskojn: Henryk Porowski, ul. Wroclawska 52/8, 45-701 Opole

Junulo, 19j., dez. kor. k. germanaj geesperantistoj pri historio, kol. pm, bk: Stanislaw Pavlikowski, Józefóv 28, 97-561 Ładzice

Małgorzata Suchowirkska, ul. Spacerowa 17/17, 20-425 Lublin, dez. kor. pri muziko, pentroarto, arkitekturo, turismo

Laboristo, 28j., dez. kor. k. geesp. el GDR pri ĉ. t., kol. bk: Eugeniusz Görny, Ratno-Dalne 13, 57-411 Wambierzyce

Junulino, 18j., dez. kor. k. gejunuloj tutmonde pri ĉ. t.: Alicja Pachnicka, 93-523 Łodz, ul. Gagarina 33 m 57

Familio, 41, 43, 18j., dez. kor. k. germana familio: Wanda Świder, 21-350 Miedzvrzec Podl, ul. Warszawska 35/X/12, woj. Biala Podlaska

Ed. Dembski, skr. p. 47, 73-110 Stargard, dez. kor. k. esp. el Berlin

Studento de ekonomio, 20j., dez. kor. pri ĉ. t.: Leszek Putyński, ul. Powst. W-wy 3/14, 98-200 Sieradz

Honorata Wojno, woj. Łomza, 18-210 Szepietowo, Wojny Pogorzek 43, 21j., dez. kor. k. germaninoj

Stanislaw Paziewski, VG III ul. Pokojn, 43-143 Ledziny, 19j., dez. kor. k. germanaj geesp. pri muziko, nuntempa literaturo

Studento, 21j., dez. kor. tutmonde pri sporto, kol. pm: Roman Jarosz, Otrocz, 23-305 Chrzanów

Romuald Leda, 69-800 Chodziez, ul. Plac Kopernika 2, 21j., dez. kor. pri muziko, teatro, eksterlanda kulturo

Jerzy Gralak, 04-015 Warszawa, al. Waszyngtona 37 m 76, 41j., dez. kor. k. serioza esp-ino el Berlin

Krystyna Pilave, ul. Leśna 65, 41-807 Zabrze 7, 21j., dez. kor. k. germanaj geesp. pri sporto, muziko, libroj, teatro

Junulino, 16j., interesiĝas pri dancmuziko: Janina Zarkowska, 36-105 Gurdas 416, Rzeszow

Bernard Pytlewicz, skrytka 54, 85-810 Bydgoszcz 10, 39j., dez. kor. tutmonde pri sociaj aferoj, historio, literaturo, kol. pm, bk.

Junulino, 19j., dez. kor. k. germanaj esp. pri geografio, antikva historio: Berdel Lucyna, 38-521 Rymanów-Zdroj, woj. Krosno

Flegistino, 29j., dez. kor. pri vivo en aliaj landoj, literaturo, medicino, turismo, brodaĵo: Urszula Królikowska, Mieckiewicza 46/3, 38-500 Sanok

Rumanio

Komencantino dez. kor. k. geesperantistoj el GDR: Victoria Isabela Popescu, str. Columbelov 7, ap. I, parter, sect. 4, 70098 Bucuresti

Soveta Unio

Kaktokolektantino dez. kor.: Tanja Aŭderskaja, ul. Korolenko 5-B, kv. 26, 270 100 Odessa

Grupo de komencantoj el Litovio (18–19j.) dez. kor. tutmonde k. interŝanĝi pk, prospektojn: skribu al Regina Ŝlehite, Birjai, Jovaro 87

Vilija Straznickaite, Topoliu 4-41, 234580 Alytus, Litovio, (15j.) dez. kor. tutmonde, kol. bk, fotojn de gekantistoj

15jara hungara lernantino, dez. kor. tutmonde pri ĉ. t.: Judit Panulin, SU-295 510 Beregovo, ul. Stefanicka 98

Evgenij Kononenko, 445031 Toljatti-31, Primorskij bulv., dom 228, kv. 210 dez. havigi al si lernigaj kursoj de hispana lingvo en sondiskoj

Inĝeniero, 30j. dez. kor. pri literaturo, libroj, lingvistiko: Vladimir Prokopenko, 310064 Harkov-64, Komsomolskoe ŝoseo-71, loĝ. 22

Studento, 19j. dez. kor. tutmonde pri ĉ. t., kol. pk., pm: Vladimir Ŝvidzij, 252040 Kiev 40, ul. Krasilovskaja 8-4

Denaska esperantisto, 12j., dez. kor. k. samaĝuloj tutmonde pri foto, kol. insignojn, bk, pm.: Ilia Gercikov, 483310 Talgar-2, Komunistiĉeskaja 278

Lernantino, 17j., dez. kor. tutmonde pri junularaj problemoj, literaturo: Annely Saru, 202900 Viljandi, pk 60, Estonio

Mezlernejanoj el Beregovo k. Vinogradov (15–18j.) dez. kor. tutmonde, bv. skribi al la kursestro Fotul Nikolao, 295540 Vinogradov, ul. Gorkij 84, Zakarpatje

Evgenij Balandinu, Talgar 2-2, Bajkalskaja 28a, Kazaĥa SSR, (14j.), dez. kor. k. samaĝuloj, kol. bk, pm, insignojn, poŝkalendarojn

Lernantino, 18j., dez. kor. tutmonde pri muziko, kol. pm: Dace Kalnina, Latvio, Limbaju reg. p/n Tuja, „Graudiros"

Junaj esperantistoj, komencantoj, de samarkanda E-klubo dez. kor. tutmonde, bv. skribi al Jurij Petroŝeviĉ, ul. Gagarina, pr. 2, d. 1-2, Samarkand 703003, Uzbekio

Dez. kor. nova E-grupo ĉe scienc-esplora instituto pri kolormetalurgio (12-persona, diversaĝa), adreso: Vniipvtorcvetmet-Interklubo, ul. Lagutenko 14, 340103 Doneck

Dez. kor. pri div. temoj 23j. laboristo: Leonid Golovin, ul. Moldavskaja 20/24, kv. 8, 339003 Makeevka

Studentino, 22j. dez. kor. pri tekniko, maŝinkonstruado: Ludmila Zelenskaja, ul. Rodnikovaja 19, 340078 Doneck

Inĝeniero, 22j., dez. kor. pri muziko, filatelio: Aleksandr Giller, blv. Ŝaĥtostroitelej 16-A, kv. 51, 340052 Doneck

Studentino, 19j., dez. kor. pri div. temoj: Svetlana Ŝkvarovskaja, blv. Ŝaĥtostroitelej 8, kv. 43, 340059 Doneck

Dez. kor. pri div. temoj: Larisa Koŝlakova, ul. Universitetskaja 8/21, 340055 Doneck (20j. studentino),
Svetlana Soprunova, ul. Rozi Luksemburg 12, 340094 Doneck (19j. studentino)

Laboristo, 21j. dez. kor. pri historio de rusa literaturo k. div. temoj: Stanislav Zelenskij, ul. Rodnikovaja 19, 340078 Doneck

Laboristo, 28j., dez. kor. pri radio, minejkonstruado: Vladimir Medvedev, ul. Karnaŭhova 49, 340003 Doneck

Laboristino, 18j., dez. kor. pri arto, muziko, historio, arkitekturo: Ludmila Russkih, ul. Niĵnekurganskaja 3, kv. 17, 340092 Doneck


Lernanto, 13j., dez. kor.: Andrej Popov, Melitopolska 4–12, Berdjansk-8, SU-332440

Komencantoj de la Esperanto-Klubo, 614057 Permj-57, ab/k 1958 dez. kor.

Studentoj dez. kor.: Minĉenko Dmitriju, 614024 Permj-24, str. Zakamskaja 2–26, Trofimov Sergej, 614032 Permj-32, str. Jampolskaja 12b – 20, Ĵdanov Aleksandr, 614024 Permj-24, str. Kirovogradskaja 40-4

Lernantino, 17j., dez. kor. pri muziko, filmo, teatro, literaturo: Tüu Lond, 202950 Abja-Palvoja, Oru 2–10, Estonio

Leili Linnas, 202900 Viljandi, Estonio, str. Riia 28e-4, 28j., dez. kor. k. geesperantistoj el GDR pri literaturo, turismo, filmo, kol. bk, pm, kalendaretojn.



Komencantoj dez. kor.: Dom uĉitela, Esperanto, 248600 Kaluga, Lenina 103

Vilbrantiene Danute, Kaunas 9, Zvangueus gre nr. 11 lt. 1, Litovio, dez. kor.

Gelernantoj (15–20j.) de Esperanto-Klubo, 235800 Klaipeda, Litovio, poŝtkesto 179, dez. kor. pri junulara vivo k. interŝanĝi bk, pm, fotojn de kinoaktoroj

Instruistino, 24j., dez. kor. pri muziko, sporto, turismo, kol. bk: Rudite Dubro, 229493 Latvio, Saldus raj. Jaunauces 8-jara lernejo

Dace Ogrena, 226006 Latvio Riga, str. Lielvärdes 13-5, (17j.), dez. kor. pri turismo, sporto, muziko, lingvoj, kol. bk

Dez. kor. k. seriozaj gesamideanoj el GDR: Vasilij Grigorenko, 314028 Poltava-28, ul. Ciolkovskogo 67, kv. 197

Rimantas Nowilas, 235700 Kretinga, str. Klaipedos 55, Litovio, 15j., dez. kor. k. geknaboj tutmonde, kol. bk, pm

Junulo, 17j., dez. kor. tutmonde, pri literaturo, arto, moderna muziko, lingvoj: Jakov Voldemar, 627110 Tjumena regiono, Zavodovska distr., vil. Novaja Zaimka, str. Sadovaja 1 (Sibirio)

Studento, 19j. dez. kor. pri lingvoj k. popmuziko, kol. bk, pm, diskojn, insignojn: Laimus Straznickas, Topoliu 4–41, 234580 Alytus, Litovio

Inĝeniero: 40j., dez. kor. pri muziko, arkitekturo, arto, teatro, kol. bk.: Viktor Stecenko, 310091 Ĥarkov, str. Tankopija 3/1, kv. 70

Studentino, 17j., dez. kor. pri sporto, muziko, filatelo, numismatiko: Nadja Kozlova, 344010 Rostov-Don, Sokolova 50, kv. 25

Teknikisto, 38j., dez. kor. pri turismo, foto, lingvoj, kol. bk, insignojn: Heino Metsamärt, pk. 60, 202900 Viljandi, Estonio

Nijole Rudzinskaite, 234442 Jurbarko raj. Stakiai, Litovio, dez. kor. tutmonde pri literaturo, muziko, naturo.

Venezuelo

Centro Universario de Esperanto, Universidad central de Venezuela, Apartado 76626, Caracas 107

Eldoninto de tiu ĉi numero:

GDR-MEM-sekcio, Kulturligo de GDR / asocia sekretariejo (Centra Laborrondo Esperanto). Redakcio: 108 Berlin, Charlottenstrato 60, Telefono: 2 20 29 91. Respondeca redaktoro: D-ro Detlev Blanke. Redakcia komisiono: Otto Bäßler, Ludwig Schödl, Rudolf Hahlbohm, Werner Pfennig. Redakcia fino: 28a de Februaro 1978. Presejo: Grafischer Grossbetrieb Völkerfreundschaft Dresden, Betriebsteil Meissen.

8407 - 36



Lasta paĝo:
Friedrun Bondzin: Larissa

Frontpaĝo: Soveta memoriga monumento Berlin-Treptow, funebranta patrino.